



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista  
 Unu numero : 6 FF. Unujara abono kun adresaro : 30 FF  
 Ĝiri al la poŝtkonta numero 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :  
 Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut

\*\*\*\*\*

VALO :

NI PRENU NIAN BIENON,  
 KIE NI ĜIN TROVAS

En esperantigo de nacilingvaj tekstoj, ofte ni ricevas la impreson, ke nia lingvo estas malriĉa kompare kun la aliaj, "naturaj" lingvoj kun longa tradicio. Por konservi en traduko subtilajn nuancojn, ni estas tentataj iniciati neologismojn, aŭ uzi neologismojn kreitajn de aliaj. Tio estas solvo de trofacilo, al kiu inklinas nia natura malpenemo. Ĉar, se ni penus esplori la latentajn eblojn de esperanto, ni eltrovus, ke nia propra grundo enhavas minon da riĉaĵoj ankoraŭ ne aŭ nemulte ekspluatataj, iafoje eĉ nesuspektataj. Ni tro kutimas limigi nin al malriĉa vorttrezoro konsistanta el malmultaj ŝablonaj dirmanieroj. Por pliampleksigi ĝin estas utile frekventadi la bonajn aŭtorojn, kiuj ne mankas en nia literaturo, tiel ke oni vane provus ilin ĉiujn nomi. Ne temas pri servuta kopiado de tiuj lertaj verkistoj, sed ĉiu el ni nur sin inspiru de ilia ekzemplo, por ĝin imiti laŭ sia propra temperamento.

Ni ofte kulpas mistradukojn pro nekonscia influo de nacilingvaj kutimoj.

Responde al erara neo, aŭ dubo, iuj francaj esperantistoj diras : "se! se!" (si! si fait!), kaj germanoj diras "do! do!" (doch!) anstataŭ la ĝusta "jes ja!". Iel simile, multaj el ni uzas la vorton "korekta" en la senco de "ĝusta", "regulkonforma", ne konsciante, ke en esperanto tiu uzado estas erara, do evitenda. Por eviti tiajn misojn, ni ne hezitu ofte malfermi PV aŭ

PIV, kaj kontroli la ekzaktan signifon de la uzota vorto. Kaj por "kutimiĝi al eksternacia penskapablo", ni strebu ĉiam pensi senpere en esperanto. Ni malfidu la "falsajn amikojn", tiujn vortojn, kiuj similas al aliaj, sed ne estas samsignifaj. Ni memoru, ke en du lingvoj malofte la diversaj sencoj de similaj vortoj koincidas. Tre multajn ekzemplojn oni povus citi.

Pri esprimoj, parolturnoj, plejofte laŭvorta traduko ne estas komprenebla. En ĉiu nacia lingvo svarmas idiotismoj. Sub la ofte alloga pitoreska formo, ni provu eltrovi la logikan kernon, kaj logike ĝin traduki. En tiu provado povas nin efike helpi la zamenhofa Proverbaro, kaj la bonegaj didaktikaj libretoj de nia karmemora Faulhaber, de Lentaigne, de Bourgois\*.

Mi diris, kaj tio estas gurdita vero, ke laŭvorta traduko de nacilingva esprimo estas plejofte malbona. Tamen en kelkaj okazoj ĝi povas liveri taŭgajn formulojn: nome, kiam ili elvokas senpere kompreneblan figuran sencon, prezentantan trafan bildon.

(Kompreneble ni devas esti tiurilate tre singardemaj. Tiaj esprimoj, kiaj "rabia hundo", "voluptaĉa vipuro" aŭ "viskoza rato" ne estas dubsencaj. Sed se franco nomas iun "bovino" aŭ "kamelo", verŝajne hinda aŭ araba samideano ne komprenos, sub tiuj vortoj la insultan intencon.)

Eĉ tute metaforaj frazoj povas esti kompreneblaj en laŭvorta traduko. Mi citos kelkajn.

- el la angla (adoptita ankaŭ en franclingvio):

"Ne elĵetu la bebon kun la akvo de la bano"

- el la franca:

"li eliris sur la piedpintoj"

"kial vi serĉas pedikojn sur mia kapo?"

"Vi ne instruos maljunan simion pri grimacarto"

Ĉiu el ni povas eltrovi tiajn en sia gepatra lingvo, kaj per ili riĉigi sian internacilingvan trezoron. Ni fosu nian sulkon kaj kultivu nian ĝardenon, sed ne neglektu ankaŭ pluki en aliaj. Ni ĉerpu el nia fonto, sed ankaŭ pruntu de aliaj. Al ĉiu el ni esperanto fariĝu tiel familiara kiel la gepatra lingvo.

(fino sur la antaŭlasta paĝo)

\* Faulhaber: "Ne tiel, sed tiel ĉi"; Lentaigne: "Kiel diri?", "Tiel diru!"; Bourgois: "Laŭ la fluo de l'interparolo", "Proverbaro franca-esperanta", "Esprimoj sankciitaj de l'uzado".

# rompoj

El "Ĉu riskas danĝeron la scienco?" \*  
de Albert Jacquard

Esperantigis D.C.

[Albert Jacquard estras la genetikan fakon en Nacia Instituto por demografiaj studoj, instruas en diversaj universitatoj parizaj kaj alilandaj, kaj grave partoprenas en grandaj nuntempaj debatoj pri la socia rolo de la scienco, speciale per siaj libroj: *Eloge de la différence* (Laŭdo al la diferenco), *Moi et les Autres* (Mi kaj la Aliaj), *Inventer l'homme* (Inventi la homon).]

Ĉiuj sciencaj kolokvoj elvokas la gravecon kaj baldaŭecon de la danĝeroj riskataj de la homaro pro ties nuntempa dinamiko. Ŝajnas strange, aŭdi tiom da rigoraj spiritoj anonci, ke la kataklismo estas jam morgaŭa, kaj tuj transiri al la tagordo. Ĉu ne estus utile modifi la kuronde tiu ŝipo, kiu rapidegas al la rifoj, prefere ol daŭrigi niajn bagatelajn distraĵojn? La intelektuloj de Bizanco pludaŭrigis, laŭ la legendo, siajn pasigajn diskutojn pri la sekso de l' anĝeloj, dum la turkaj armeoj pretiĝis sub iliaj okuloj por la definitiva sturmo. Ĉu ni plue pliigos la efikecon de la strukturoj kaj maŝinoj, kiuj proksimigas la datfalon, kaj forlasos la lucidecon al kelkaj senpovaj Kasandraj, kies antaŭdiroj ne havas alian efikon ol delican tremon angoran, kiu donas eĉ pli da valoro al la komforta momento nuna?

Malrapidaj cedoĵoj de la nuntempa dinamiko homa riskas esti senutilaj; iliaj efikoj sentiĝus nur post longa tempo; estos tro malfrue; brutalaj rompoj suferitaj aŭ organizitaj necese okazos.

La ekstrapolo de la nunaj tendencoj rezultigas nur "scenarojn de la neeblo". La fizikaj limoj de nia planedo malebligas konsideri, por la dua duono de la venonta jarcento (tiel proksima! niaj genepoj ne estos multe pli aĝaj ol ni hodiaŭ) unu homaron el ĉirkaŭ 12 miliardoj da homoj ĝuantaj la samajn nutradajn aŭ energidonajn eblojn kiel la nuntempa mezklasa

\* "Au péril de la Science". Pridemandoj de genetikisto.  
Eld. Seuil. Parizo. Kolekto "Points".

Franco. Sociaj limoj intervenos eĉ pli rapide : la antaŭvid-eblaj disvolvotraj finvenos en la jaro 2000, t.e. morgaŭ, al monda dispartigo atribuanta la du trionojn de la produktaj riĉaĵoj al la 1,2 miliardoj da loĝantoj de la industriigitaj landoj (Eŭropo, Sovetio, Japanio, Nordameriko), kaj unu kvaronon al la 1,8 miliardoj da loĝantoj komencintaj sian industriigon (Meksikio, Brazilo, Ĉinio...) ; kaj la 3 miliardoj da ceteraj homoj, la t.n. "subevoluintaj", ricevos nur unu dekduonon de la totalo, dum ili reprezentas la duonon de la tutmonda loĝantaro (taksadoj de A.Danzin, cititaj de J.M.Legay\*). Ĉu diferenco de 1 ĝis 30 aŭ 40 inter la mezaj vivniveloj (eĉ sen elvoki la individuajn diferencojn multege pli grandajn) estos longatempe eltenata de tiuj havantaj la multnombrecon, fronte al tiuj posedantaj riĉecon kaj povon ?

La reala scenaro neeviteble enhavos "katastrofojn" en la senco donita de la matematikistoj al tiu vorto, t.e. abruptajn modifojn de iuj niaj sociaj karakterizaĵoj. Prefere ol pasive ilin atendi, ĉu oni ne povas ilin antaŭvidi, kaj prepari kelkajn rompojn, kiuj anticipos la ukazojn truditajn de la neceseco, kaj ebligos al ni konservi ian regadon super nia destino ?

Kelkajn monatojn antaŭ Majo 1968, Robert Mallet rememorigis tiun konsilon de Rivarol al la Princo : "Se vi volas eviti la revolucion, faru ĝin!". Dank'al nia mirinda intelekta ilo, ni estas kapablaj anticipi la eventon, priskribi la eventualan katastrofon antaŭ ol tiu okazos, kaj do malhelpi ties realiĝon. Urgas uzi tiun rimedon por imagi la obstaklojn, kiujn ni renkontos, kaj se eble ilin eviti.

En tiu serĉado, ni devas atenti ne privilegii nian vidpunkton de Franco, de Eŭropano, de Blankulo, de riĉulo ; ni devas klopodi rezonadi kiel eble plej kiel "Terano". La homaro efektive suferas sub niaj okuloj mutacion similan al tiu de solvaĵo, kiu subite kristaliĝas, al tiu de likvaĵo, kiu pro malaltigo de temperaturo transformiĝas en solidaĵon. Longatempe la diversaj homgrupoj disaj sur nia planedo estigis inter si nur ligilojn nesufiĉe streĉajn ; ili antaŭ nelonge estis ankoraŭ sendependaj unuj rilate la aliajn. La disvolvado de la komunikiloj kaj la kreskigo de la trafpovo de niaj kondutoj kreis interligitecon, kiu igas ĉiun dependa de ĉiuj aliaj : la nomado de l'dezerto estas informita per sia transistoro pri la lastaj kvereloj inter petrol-produktantoj kaj -aĉetantoj ; la kapitalisto izolita en la grandegaj glaciigintaj teretendaĵoj de Labradoro ricevas pluvon

\* J.M.Legay. **Qui a peur de la science?** (Kiu timas la sciencan?). Paris, Editions Sociales, 1981.

acidigitan per la fumo de industrioj situantaj je miloj da kilometroj. Ne plu ekzistas neatingeblaj rifuĝejoj, kie ni povus ŝirmi nin kontraŭ alies agoj. Aperis opa rigideco de la tuto de nia planedo. Ĉu tion ni volas aŭ ne, ni estas solidaraj ; ja ĉies sorto estos decidita, dum la elektoj de ĉiu riskas investi la estonton de ĉiuj aliaj. Klopodi plej bone malimpliki nin, aŭ la grupon, kies membro ni estas, el alies damaĝo, estus nur tre malbona kalkulo.

Post malpli ol jarcento estos pli ol 12 miliardoj da homoj ; sed jam nun estas pluraj miloj da atombomboj stokitaj de regnoj, kiuj, ĉiuj, arde kaj sincere deziras la pacon sed estas pretaj "premi la butonon" por persvadi la alian ne tion ĉi fari. Ni devas samtempe timi esti tro multnombraj sur la Tero kaj timi ne plu esti.

Nia efikeco estas preskaŭ senlima, kiam temas pri detruado. Se selekta katastrofo malaperigus ĉiujn homojn, kaj nur ilin, la aliaj specioj povus eligi unu "uf!" pro faĉiligo. Ĉar nia ekzisto estas minaco por ĉio, kio vivas ĉirkaŭ ni ; pro ni la vivo povas estingiĝi.

La lamentoj, la malbenoj kontraŭ la kondutoj, kiuj kondukis nin al tia situacio estas egale senutilaj. Kontraŭscienca sinteno, forĵetanta la sciencan pro la riskoj, kiujn ĝi sekvigis, povas esti nur kondukado de struto enmetanta la kapon en la sablon por ignori la danĝeron. Ni ĝin rediru : la scienco ne estas unu produkto, inter aliaj, de la homa specio ; ĝi respondas al la sinteno de la homo, kaj nur de la homo fronte al la universo. Rezigni la lucidecon kaj sekve la efikecon, kiun celas la scienco, estus rezigni nian homan specifecon.

Ĉu estas eble imagi realisman vojon, kiu ebligus forigi la danĝerojn sen tuŝi la esencon ?

Fronte al tia demando oni povas ne multe pli ol proponi erojn da pripenso. La antaŭaj ĉapitroj provis priskribi, en kelkaj sektoroj de la biologio, la sciencan aktivecon tian, kia ĝi estas spertita de tiuj, kiuj ĝin praktikas : sekvo de provhezitoj, de rekonsideroj, de malfacila ellaborado de konceptoj pli bone adaptitaj al la realo.

La danĝeroj riskataj de la homaro atingis sian nuntempan gravecon nur pro la rezultoj de la scienca aktiveco ; estas do urĝa la studo pri statuto por tiu aktiveco en nia socio. En la sekvontaj paĝoj estos elvokataj sen logika ardo kaj sen graveca hierarkio (tio povus esti nur tromplogilo) kelkaj blindhezitaj vojoj, kelkaj rekonsideroj, kelkaj serĉadoj kun celo ankoraŭ malbone difinita, kiuj povus kontribui pli bone ĝin orienti.

## I. HOMAJ RAJTOJ

La homoj, ĉiuj malsamaj laŭ sia genetika haveco pro la mekanismo de la seksa reproduktado mikse knedanta la gepatrajn genojn kaj ĉiam kreanta novajn kombinaĵojn, estas iom post iom modifitaj de la personaj aventuroj, kiuj ankoraŭ pli akcentas la diferencojn. Meti signon = inter du homoj estas tutevidente neeble ; sed - pri tio ni insistis koncerne la "kaptilon de la nombroj" - ili ne povas pro tio esti klasifikitaj laŭ valor-skalo de la malplej bona ĝis la plej bona.

La egaleco, kiu figuras ĉe la frontonoj de niaj monumentoj, ne estas la egaleco de la individuoj, kio estus sensenca, sed la egaleco de la rajtoj al ili konsentitaj de la socio. La formulo estas bela, la frazo rapide dirita, sed kion oni devas kompreni per tio ?

Preskaŭ evidentas, ke la socia organizo plej rekte efika estas laŭtipe "elitisma" : 1 aŭ 2 % de la loĝantaro estas deklaritaj indaj regi, 4 aŭ 5 % estas ŝarĝitaj per la ordotenado, kaj la cetero plenumas la diversajn taskojn necesajn por la pluvivo kaj bonstato de la grupo, sub la ordonoj de la unuaj. "Civitanoj - soldatoj - sklavoj", **alpha - gamma - epsilon**, la terminaro varias laŭ la kulturoj aŭ la aŭtoroj, sed la strukturo estas la sama : eta nombro fiksas la celon kaj regas, iom pli granda nombro transdonas la ordonojn kaj voktas, la grandega plejmulto obeas kaj produktas.

La rimarkindan efikecon de tiu strukturo atestas, ekzemple, la restaĵoj de la grekaj civitoj. Kiel ne revu antaŭ la ruinoj de Sirakuzo, Agrigento aŭ de Selinonto, imagante la brilbecon de tiuj urboj ŝirmitaj per enormaj remparoj, ornamitaj per temploj nesupereble belaj, kie devis esti agrable en la vespero sur l' agoro diskuti kun kelkaj brilaj matematikistoj aŭ kelkaj profundaj filozofoj, kontemplante la sunsubiron ĉe la maro !

Se! ĉiuj el tiuj ŝtonoj terure pezaj, nun disfalintaj, devis esti el iafoje fora ŝtonmino eltiritaj, tajlitaj, transportitaj, lokmetitaj ; la vivoj de miloj da sklavoj estis dum jarcentoj dediĉitaj al realigo de tiuj perfektaj civitoj ; kiun rememoron endas asocii al tiuj ruinoj : ĉu la vivharmonion de la civitanoj, aŭ la ŝviton, sangon kaj morton de la sklavoj ?

Rezervi ĉiujn rajtojn pri decidado kaj ĝuado al iu limigita "elito" estas plejofte garantio pri efikeco. Tiu efikeco estas ŝuldata al la strukturo mem de nia socio kaj ne al la propraj meritoj de la membroj de tiu elito. La fakto, ke ĉi tiuj estas nomumataj pro siaj praavoj (hereda nobeleco), pro sia staturado (kiel ĉe la Tutsi en Ruando), pro sia haŭtkoloro (kiel en la amerikaj ŝtatoj sklavecpartianoj en la XIX-a jarcento, aŭ en

la nuntempa Sudafriko) aŭ pro simpla hazardo (kiel la dalailamao en Tibeto), neniel gravas ; tio grava estas iliaj malmultnombreco, persvaditeco pri sia "natura" alvokiĝo por regi, kaj kapableco pri ĉi tio persvadi la aliajn.

Bedaŭrinde, venas tago, kiam tiu persvadkapablo malvigliĝas ; subtila veneno korodas la kredon de la elito je la legitimeco de ties povo ; renversemaj ideoj diskonigataj de la disĉiploj de iu Jesuo aŭ de la legantoj de iu Rousseau, disvastiĝas ĉe la **epsilon** ; ili ne plu kontentiĝas per la eventuale komforta parto al ili atribuita ; ili postulas statuton de "egaleco" kun tiuj, kiuj posedas la povon.

La problemo ne estas scii, ĉu ilia depostulo havos favorajn aŭ malfavorajn konsekvencojn por la disvolvado de la civito aŭ por ilia propra materiala bonstato. La efikeco de elitisma strukturo eble estas tiel granda ke, eĉ fraŭditaj, la **epsilon** povas profiti pli da riĉaĵoj ol en strukturo agnoskanta ilian egalrajtecon. Sed la demando ne estas tiele metita.

La demando estas pri precizigo de tio, kio estas la alia por ni, kaj samtempe pri la bildo, kiun ni havas pri ni mem. Ĉu ĉiu el ni estas elemento de vasta maŝinaro, la socio, kies bona funkciado estas la ekstrema celo de la grupo ; ĉu male li reprezentas la superegan valoron (kiel "filo de Dio" aŭ kiel "individuo egalrajta al la aliaj individuoj"), kies disfloradon la socio devas favori ? Estas la respondo al tiu demando, kiu implicas la sekvon : ĉu la socio en la servo de la individuoj, aŭ la individuoj en la servo de la socio ?

Tiu respondo ne estas liverita de scienca rezonado ; ĝi povas esti starigita nur kiel aserto. Sed endas, ke ĝi estu klare starigita, kaj ke la konsekvencoj estu el ĝi senartifike tiritaj.

Ni klinu la orelon al ĉiuj paroladoj ; la unanimeco nuntempe estas perfekta : la homo estas la superega valoro, la socio estas tie nur por ebligi al li disfloriĝon en la respekto al la aliaj ; liaj rajtoj estas nepreskriptaj ; kaj ĉiuj sloganoj floras, kaj ĉiuj asembleoj paroladas kaj voĉdonas deklaraciojn pri la "homaj rajtoj", kaj UNO prirespondas tiujn deklaraciojn, kaj ĉiuj ŝtatoj solene konsentas.

Sed ni rigardu la realon : kiom valoras la miliardoj da homoj, kiuj ĉiutage penige elŝiras sian pluvivon fronte al la kelkaj popoloj, kiuj alproprigas al si la riĉaĵojn de la planedo ? En la sino mem de tiuj popoloj, kiom valoras la milionoj da homoj inside kaptitaj en la ĉiutaga sengusteco de la suferita laboro, de la informado kaj distrado pasive ricevataj fronte al la kelkaj "princoj", kiuj ilin regas ?

La "rajtoj", kiujn la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj aŭ la ŝtataj konstitucioj tiel grandanime konsentas, estas fakte malofte atribuitaj. Povas esti, ke tio necesas por la bono de la ekonomio aŭ por la bono de la sekureco, sed se tiel, kial pluigi la hipokritecon ?

La vortoj ĉi tie ludas plej pereigan rolon ; ili kontribuas en la pravigo kaj pluigo de realo, kiu respondas al la kontraŭo de la idealo, kiun ili esprimas.

Se la anseroj komprenus niajn paroladojn, ni sukcesus ne nur ilin persvadi, ke ansero kropŝtopita estas pli feliĉa ol ansero sovaĝa, devigata traserĉi sian nutraĵon, sed ankaŭ ilin igi fieraj pri la monstraj hepatoj, kiujn nia frandemo ilin devigas suferi. La nenombreblaj frazoj pri la homaj rajtoj sukcesis persvadi la homojn rezigni siajn rajtojn por pli bone ĉi tiujn defendi, igi ilin fieraj pri la vundoj suferitaj, kontribuante en la subpremo super siaj samuloj.

En niaj propraj socioj t.n. disvolviĝintaj la moktrompo vere estas tro neeltenebla : la teknikaj progresoj estis tiaj, ke nia kapablo produkti riĉaĵojn estas superabunda ; la efikeco de elitisma strukturo, kiu povis en la samaj kondiĉoj esti elvokita kiel pravigo de neegaleco de la rajtoj, perdis sian intereson ; unu maŝino facile anstataŭas mil sklavojn. Kio estis lukso, kiun la socio ne povis elteni, estas nun permane trafebla ; sed pro timo al tro profundaj rekonsideroj, ni lasas en sama stato la antaŭan ordon, dum ties pravigo malaperis.

Koste de kelkaj horoj da laboro ĉiu el ni kreas pli da riĉaĵoj ol niaj praavoj laborantaj ĝis la limo de sia rezisto ; ĝeneraligo de la informadiko estigos novan salton antaŭen ; anstataŭ ĝoji ni maltrankviliĝas, ĉar en tio ni vidas fonton de senlabor-eco. Ĉu ne estus tempo fine tiri la konsekvencojn de tiuj progresoj, organizante socion, en kiu ĉies rajtoj estus egaligitaj ?

Tute male ni spektas paroksismon de la konkurado, selektado, eliminado de la plej granda nombro je la profito de kelkaj ; dum estas pli multaj ol iam la deklarioj pri homaj rajtoj.

Tiu egaligo de la rajtoj neniel rilatas kun ĝenerala niveligo, seria fabrikado de individuoj ĉiuj konformaj al trudita tipo ; male, la celo estas ebligi plej diversajn individuajn disfloriĝojn, respekti la diferencojn, t.e. la neegalecojn, ne ligante al ĉi tiuj valorjuĝon. Facile estas trakti tiujn, kiuj batalas por egalrajteco, kiel "fanatikajn egalecistojn", kiuj puŝas al detruiva niveligo ; tio estas fari deturnon de senco same senhonorigan kiel deturno de fonduso. Tiaj lingvaj malbonuzoj, kiuj vojerarigas la legantojn, lumigas tion, ke la batalo por la "homaj rajtoj" komenciĝas per rigora difino de la vortoj, ĉar la vortoj estas

armiloj.

Tiuj rajtoj povas esti, se ni vere kredas je ili, objekto de scienca esplorado\* tiom valora kiom la "quarks" aŭ "kvazaroj". Ni provu imagi, ke sur la tuta planedo la tiel ofte proklamata egalrajteco estus respektata en la faktoj ; la tuta scienco de la ekonomikistoj, sociologoj, juristoj kaj multaj aliaj ne estus troa por provi antaŭvidi la konsekvencojn de tia rompo.

## 2. PROFESIISMO KAJ MALPROFESIIGO

Disvolviĝante, nia okcidenta socio orientiĝis al specialigo kaj profesiigo pli kaj pli kreskantaj. Ĉiuj sferoj de la homa aktiveco estis markitaj de tiu tendenco ; tre frue en la disvolvado de la infano, la instruado zorgas ĝin orienti al intelekta aŭ mana aktiveco bone difinita. Por enmetiĝi en la socion, tie ludi rolon, havigi al ni la neceson por nia pluvivo kaj nia disvolviĝo, endas ke ni akiru lertecon orientitan al bone precizigita aktiveco, ke ni fariĝu profesiisto.

Ni insistis en la ĉapitro 1 pri la danĝero de izoligo, fraŭdigo kaj eĉ kripligo de la individuoj, de fakiĝado kaj sklerozigo de la socio sekvigataj de tiu procezo. La avantaĝoj ja estas evidentaj ; estas la dispartigo de la taskoj kaj la specialigado tiel ebligata, kiuj estigis kreskadon de la efikeco kaj forigis for de ni la ĉiamajn angorojn ligatajn al la malsato, malvarmo, malsano.

Tiu specialigo ŝajnas aparte necesa en la scienca sfero, tiom rapida estas la kreskado de la konoj, sed ĝi estas ankaŭ aparte danĝera pro la fosaĵo, kiun ĝi profundigas inter la studobjektoj, kaj precipe inter la scienca komunumo entute kaj la publika opinio. Kiel provi elimini tiujn pereigajn konsekvencojn sen rezigni la avantaĝojn de la profesiigo ?

### Reala kazo en arkitekturo

Antaŭ ol ekzameni tion, kio povus esti provita por malprofesiigi la sciencistojn, ni elvoku ekzemplon, en kiu la samtempa batalo kontraŭ la malriĉiĝo estigata de la malprofesiigo, kaj kontraŭ la detruigo ŝuldata al la profesiigo, povis esti kondukata kun ia sukceso. Temas pri arkitekturo.

Konstruado de ensemblo tiel kompleksa kiel liceo por 1500 aŭ 2000 lernontoj tutevidente necesigas la intervenon de "profesia" arkitekto, kies kompetenteco estas nepre necesa, se oni volas respekti la sekurec-regulojn, apliki la normojn truditajn de la ministerio pri Nacia Edukado, certigi la ligojn kaj cirkul-

\* Vidi ekz. : "De l'idée d'universalité comme fondatrice du concept des droits de l'homme" (Pri la ideo de universaleco kiel fondinto de la koncepto pri homaj rajtoj), Antibes, Alpazur, 1980.

adojn, kaj eĉ (kio estas malofte realigita) sukcesi konstruaĵon, kiu kontentigas la estetikon.

Por la unua fojo, almenaŭ en Francio, la arkitekto ŝargita per la starigo de la planoj por tia liceo en granda okcidenta urbo, rifuzis liveri la projekton, al kiu lin kondukus liaj pripensoj, lia analizo de l' programo, lia kritika ekzameno de la antaŭaj realigaĵoj. Yona Friedman\* juĝis, ke lia rolo ne estis apliki siajn proprajn konojn, sed ĉi tiujn partigi inter la uzontoj de la liceo, kiuj efektive fariĝis la arkitektoj. Li redaktis "manlibron", specon de desegnita bendo, kiu estas la rigora resumo de liaj kursoj (ĉe MIT) ; tiu manlibro igas alireblaj por la laikoj la plej progresemajn metodojn koncerne arkitekturan koncepton. La estontaj "aŭtoplanizistoj" tiel estis pli bone informitaj ol multaj profesiistoj, dank'al konoj igitaj kompreneblaj por ili, t.e. formulitaj en ilia propra lingvaĵo ; poste li kunigis ĉiujn, kiuj interesiĝis pri tiu projekto inter la administrantoj, profesoroj, lernontoj kaj ties gepatroj, kaj petis ilin starigi mem la planojn laŭ la trudita programo ; lia rolo ne estis kritiki la alprenitajn opciojn, modifi la decidojn, kiuj iom post iom skiziĝis, sed simple atenti pri iliaj kohereco kaj konformeco al la ordonoj administraj, financaj kaj teknikaj. Post neevitebla periodo de ŝanceliĝo, iu dinamiko iom post iom distingiĝis, akordo aperis pri la ĉefaj elektoj, pri la artikado de la diversaj elementoj de la estonta ensemblo ; plano estis adoptita ; la konstruaĵo fariĝas.

Incidento evidentigis la efikecon de la procezo tiel starigita. La estonta liceo malmulte similas al ĉiuj aliaj, ofte tre samaspektaj konstruitaj de kelkaj jaroj en Francio. Ĝia nekutima karaktero surprizis iujn membrojn de la administraj oficoj, kiuj provis ĉion rekonsideri ; la reago de la arkitektoj-uzontoj estis unuanima, la komuna fronto (en kiu partoprenis ĉiuj aŭtoplanizistoj, ĉu "dekstraj" ĉu "maldekstraj", agadunueco kiu havas maloftan precedenton) ebligis la renverson de tiu opozicio per ministra decido. La liceo ja estos "ilia" liceo.

Tiu ĉi ekzemplo ŝajnas al mi signifa de sinteno, kiu lokas la problemon de la malprofesiigo en nova perspektivo.

En tio, la profesia arkitekto neniom abdikis sian rolon, li neniel kaŝis sian kompetentecon, siajn konojn, sian spertadon, sian lertecon ; male, li sciis ilin lumigi tiamaniere, ke ili povis esti komprenitaj, kunpartigitaj. Li precipe konsentis pri tio, ke

\* Aŭtoro, nome de : "Utopies réalisables" (Realigeblaj utopioj), Parizo, UGE, kolekto 10/18, 1975 ; "Comment vivre entre les autres sans être chef et sans être esclave" (Kiel vivi inter la aliaj sen esti estro kaj sen esti sklavo), Parizo, Pauvert, 1974 ; "L'architecture de survie" (La arkitekturo por pluvivi), Parizo, Casterman, 1978.

tia rolo ne estas tiu de gvidanto, sed tiu de instiganto al memgvidado. Laŭ biologia bildo, li estis nek la cerbo kiu pripensas kaj decidas, nek la okulo kiu vidas, nek la muskolo kiu agas, sed la endokrina glando kiu difuzas en la tutan organismon ian "estomanieron". Li ne "malprofesiigis", li konservis la tutan riĉecon de sia "profesiimo", sed li sciis eskapi el tiu prizono, kiu estas la nekunpartigita kompetenteco ; li spertis kolektivian aventuron, en kiu tiu ĉi riĉeco povis sinergie agi kun la de la aliaj alportitaj riĉaĵoj.

### La sciencula profesio

Ĉu tia eksperimento punkta, izolita, povas esti translokita en aliajn sferojn, kaj en kiuj kondiĉoj ? Estus iluzie serĉi rigoran respondon al tiu demando ; ni provu ĝin precizigi en la kazo de la scienca aktiveco.

La sub-ensomblo de niaj socioj reprezentata de la scienca komunumo estas kazo tre aparta, sed kazo tre interesa por nia temo, ĉar la procezo de pliriĉiĝo-detruigiĝo per la profesiigo estas en ĝi sufiĉe karakterizebla. La demandoj, kiujn oni povas meti al si pri tiu procezo, havas klaran sencon, kiam oni elektas kiel observobjekton iun specimenon de "scienculo"; kion faris el li lia specialiĝo, tamen necesa por ke li vere ludu sian rolon ? Kiel li scias uzi la povon, kiun donas al li lia aŭreolo de laika sanktulo ? Kiel li estas manipulata de la aliaj ? En kia mezuro li estas produkto (sub-produkto) de socio, kiu sekrecias la sciadon samkiel ĝi sekrecias amuzobjekton, en kia mezuro li male estas produkto de persona alvokiĝo ?

Ĉiuj ĉi demandoj povas konduki al ne trivialaj esploroj.

Antaŭ du aŭ tri jarcentoj estis eble fariĝi universala scienculo kun konoj en ĉiuj sferoj, ĉu astronomio aŭ ĥemio, botaniko aŭ medicino. La scienca eksplodo, ŝuldata precipe al alĝustigo de mezuriloj pli kaj pli perfektigitaj, sekvigis parceligon de la sciado. Eĉ interne de studobjekto kun relative difinitaj limoj, ekz. biologio, neniu povas vere informiĝi pri freŝdataj hipotezoj aŭ novaj observoj, kies rezultoj estas elmetitaj en nenombreblaj specialigitaj revuoj. Atenta legado de la nuraj revuoj, kiuj regule alvenas al mi, necesigus multe pli ol mian tutan labortempon. Iom post iom, pro neceseco, ĉiu rifuĝas sur branĉo pli kaj pli maldika de la sciadarbo. Tio ĉi estas kondiĉo ne nur de intelekta komforto, sed ankaŭ de efikeco.

Genetiko estas branĉo de la biologio, sed ĝi estas mem jam tro disbranĉigita, por ke oni povu supervidi ĉiujn diversajn aspektojn ; observi, ekzemple, la disvolviĝon de la nura "genetiko de la populacioj" estas ĉe la limo de tio, kion oni povas prudente esperi. Genetika kongreso fariĝis Babelturo, en kiu la diversaj sekcioj estas unuigitaj preskaŭ nur per la ekzisto de la "geno", kiu cetere ne plu havas la saman sencon por tiuj, kiuj okupiĝas pri molekula genetiko kaj por tiuj, kiuj traktas kvantan genetikon. Unueco de intereso kaj lingvaĵo estas retrovita nur en kolokvoj aŭ seminarioj kun limigita celo, en kiuj kelkaj specialistoj alektiĝas kaj kunvenas por kunigi siajn pripensojn.

Se mi elvokas la renkontojn, kiuj alportis al mi grandan profiton, kiuj daŭreme orientis mian aktivecon, mi citos neniun grandan kongreson sed, ekzemple, la kunvenon en Israelo de kvindekda genetikistoj de la populacioj studentaj dum du semajnoj la problemojn starigitajn per la ellaborado de matematikaj modeloj ; aŭ en Jovao, kunvenon de la plejparto de la aŭtoroj de artikoloj aŭ libroj dediĉitaj al la "heredobleco", cele al pripensoj pri la malfaciloj de tiu koncepto. Kiel la grandaj kongresoj plu estas nur vantaj mondumaj kunvenoj, kies ĉefa pravigo estas politiko-turisma, same tiel la kolokvoj kun limigitaj celoj kaj kunvenantaro estas fruktodonaj por la disvolviĝo de la pripensoj. Tiel, iom post iom, la solaj seriozaj sciencaj aktivecoj fariĝas tiuj de grupoj da "profesiistoj" alte specialigitaj.

Tiu konstato valoras, mi tion imagas, por la plejparto de la studobjektoj. Sciencisto fariĝas simila al tiuj radaroj, kies trafpovo estas des pli fora, ju pli ilia fasko estas mallarĝa. Li tipe estas "specialisto". Sed la evidenta efikeco de la scienco en ties tuto donas al la serĉisto aŭtoritaton, al kiu la publiko spontanee sin turnas. Li estas nur radaro kun mallarĝa fasko; oni postulas, ke li estu lumturo balaanta la horizonton.

Petite diri sian opinion aŭ interveni en diversaj sferoj, li volonte tion faras, eĉ se ne tute temas pri lia specialeco. Oni povas en tio vidi veran konfidekspluaton, titolarogadon. Sed ĉu la scienculo povas en tiaj okazoj rifuzi, kaj ĉu li pravus tion fari ?

### La scienculo "malprofesiigita"

Krom se li estas plene "polarizita", blindigita de sia studobjekto, la specialisto tiras konsekvencojn el la lecionoj liveritaj de lia serĉado. En la kazo de la genetiko de la populacioj, tiu konstato estas aparte evidenta. La pripensoj pri la procezo renoviga de iu ensemblo da vivantaj estaĵoj, pri la agantaj

mekanismoj, necese modifas nian rigardon al la aliaj, al la socio, al ni mem. La plejparto de la nocioj implice akceptitaj en niaj socioj, determinismo de la karakteroj, klasifiko de la rasoj, hierarkio de la individuoj estas rekonsiderataj. La evidenco de la kontraŭsencoj faritaj en la plejparto de la disvolvitaj rezonadoj pri tiuj temoj, la kondutadaj eraroj al kiuj ili kondukis, puŝas la scienciston interveni kaj partopreni en la polemikoj, kaj pograde en politikaj bataloj. Tion farante, li ja "malprofesiigas", sed ŝajnas al mi, ke li povas tion fari sen perdi la akiraĵon de sia specialiĝo, kaj eĉ pliriĉigante, valorigante tiun akiraĵon.

Ĉar, kio motivas lian intervenon, tio ne estas la akumulado de la informoj, kiujn li arigis (per sia propra observado aŭ dank'al siaj legaĵoj), tio ne estas la detalo de la matematikaj disvolvoj, kiuj ebligis la progresadon de la rezonado, tio estas la strukturo, kiu iom post iom konstruiĝis en li per tiuj donitaĵoj kaj rezonadoj. Nu, tiu strukturo povas ja esti subtenita per maniero multe pli simpla, facile transdonebla, ol sekvante necese zigzagan, heziteman, hazardan, personan vojiradon, kies finatingo ĝi estas.

Ĉiu konas la spritaĵon de Edouard Herriot pri la kulturo - "kio restas, kiam oni ĉion forgesis". Ne vere endas ĉion forgesi, sed rekonstrui, rearanĝi la ensemblon de la internaj konkludoj, kiujn ni atingis. Kiam farita tiu laboro, la transdono povas esti realigita sen la ĵargono de la profesiulo, la peno necesa por kompreni estas eta kompare kun la peno, kiu estis necesa por forĝi. La profesiulo tiam similas la ŝnurgrupan gvidanton, kiu koste de mil penoj kaj danĝeroj atingas la supron de la montopinto kaj streĉas la ŝnuron, por ke la kamaradoj suprenvenu sen granda klopodo.

Tia ŝnuro, en la scienca sfero, estas la konceptoj. Ĉia studobjekto klopodige progresas, strebante ĉiumomente kalkuli kun la tuto de la disponeblaj informoj ; laŭmezure kiel ĉi tiuj akumuliĝas, la teorioj, klarigaj modeloj fariĝas pli kaj pli kompleksaj ĝis la tago, kiam unuiga aŭ simpliga koncepto estas proponita, kiu ebligas ĝeneralan komprenon facile transdoneblan. Ni elvoku tri ekzemplojn : la plej klara estas la kazo de la **universa gravito**, koncepto, kiu malgraŭ sia abstrakteco, sia nekontestebla nerealismo ebligas eksplikon pri la falo de la korpoj kaj pri la movado de la planedoj. Pli grava estas la koncepto pri **hazardo** tia, kia ĝi estas enkalkulita en la probableca rezonado ; ĝi sola ebligas starigi realisman sintenon fronte al universo necese necerta kaj eble nedecidiga. Malpli disvastigata ĝis nun, sed probable destinita al larĝa

uzado, tiom ĝi ebligas pli bonan starigon de la demandoj, estas la koncepto pri **nedecidebleco**, kiu ekkonsciigas pri la limoj de la rigoro.

Nur post longaj serĉadoj tiuj nocioj povis ekaperi, esti iom post iom precizigitaj, ke ilia intereso en la scienca praktiko (kies fincelo, ni tion memorigu, ne estas la efikeco de nia agado super la universo kiu ĉirkaŭas nin, sed la kohereco en nia prezento de tiu universo) povis esti demonstrita. Sed kiam tiu longa laboro estis efektivigita, ĝia rezulto povas esti diskonigita per minimuma klopodo. La sciencisto devas en tiu fazo, sen ion perdi el sia specialigo, disponigi al la aliaj la konceptilon, kiun li forĝis ; tiu ilo povos esti uzata de tiuj aliaj sen bezono de la tuta sciado, kiu estis akumulita por ĝin realigi. (Sed endos, ke ili ne malstreĉu sian atenton koncerne la ĝustecon de la konceptoj kaj terminoj tiel uzataj. Ni ĝin rediru, en nia esplorado de la universo la esenca instrumento estas la vorto ; unu vorto malbone difinita aŭ malbone komprenita estas pli danĝera ol breĉigita skalpelo).

En tio la sciencisto estas en la situacio de la arkitekto antaŭe elvokita, kiu ne kreis por la aliaj, sed metis la aliajn en situacio de kreipovo ; ne temas pri jeno : kompreni anstataŭ la aliaj, sed meti la aliajn en situacio de kompreno ; (kompreni estas same grave por ĉiu el ni, kiel ami ; ĝi estas aktiveco, kiu ne sin delegas ; ni ne ŝarĝas Kazanovon per niaj amoj, ni ne ŝarĝu la sciencistojn per nia kompreno).

Konsentante pri tiu diskonigo malpli de la faktoj ol de la eksplikaj modeloj, la sciencisto ja perdos sian statuson de mistera kaj ĉiopova "sciinto", sed vere praktikos sian metion, li ludos sian rolon, igante kapabla lin kontroli la ensemblon de la socio.

Por realigi tiun necesan rompon, oni devas rekonsideri la tutan edukadan sistemon (kaj eble ankaŭ la statuson de la serĉisto).

### 3. EDUKADA SISTEMO

Pli ol abstraktaj konsideroj, la rakonto pri kelkaj personaj rememoroj kontribuos, ŝajnas al mi, precizigi la problemon starigitan per la enŝovo de edukada sistemo en nian socion.

#### **Kursoj malmulte majstraj.**

Doktoro F., animanto de la "popola universitato" de Moyeu-vre-Grande, petis min animi vesperkunvenon dediĉitan al la

genetiko. Veninte serĉi min en Messo, li estas maltrankvila ; en tiu urbeto de la industria Loreno, kiom da personoj kuraĝos eliri ĉi-vespere por veni aŭskulti traktadon pri tiel severa temo ? Tridek, kvardek, li esperas.

Kiam ni alvenas sur la placo de la urbodomo, homamaso transportanta seĝojn sin direktas al la festsalono, kiun oni devis tuthaste malfermi kaj sonorigi ; venis pli ol kvincent personoj, laboristoj, instruistoj, lernantoj. Dum pli ol tri horoj post rapida traktado, la demandoj sin intersekvas, ĉiuj trafaj : temas pri gravaj aferoj, la raso, la gravaj difektoj, la biologia fataleco. Ĉu la lecionoj alportitaj de la scienco pravigas - kiel tuta opinifluro, tiel bone subtenata de la gazetaro kaj radioelsendado, provas tion kredigi - la brutalan selektadon, la subpremon, la malestimon, la hierarkion inter la homoj ? Malgraŭ kelkaj disvolvoj necese iom teknikaj, la kvalito de aŭskultado estas nekomparebla. Ja malfruas, kiam ni disiĝas.

Pro iniciato de profesoroj pri sciencoj, matematiko kaj filozofio, mi pasigas unu tagmezon kun la tuta lernantaro de la "finaj klasoj" de liceo en la orienta ĉirkaŭaĵo de Parizo ; la ĉeestantaro estas pli multnombra ol antaŭvidite, ĉar la "unuaj klasoj" forlasis siajn kursojn por partopreni en la debato. Pro manko de lokalo, oni amasiĝas en la manĝejo ; la akustiko estas veinda! sed ĉu tio gravas ? La atento ne malstreĉiĝas dum la tuta posttagmezo : temas pri la "fabrikado" de infano ; ne, kompreneble, pri la necesaj gestoj - ili konas ; sed pri tio, kio vere okazas : kio estas trandonita ? Kiel oni fariĝas, kio oni estas ? Kio estas kunnaskita, akirita ? Denove la demandoj, kiuj boras ĉiun el ni, determinismo, fataleco, libereco, estas elvokitaj kun seriozeco. Mi ne forgesis tiun rimarkigon de unu el la profesoroj, kiuj elakompanis min post la kunveno : "Necesas multigi tiujn renkontojn. Tiom da niaj lernantoj en situacio de fiasko forlasas ĉian lukton, akceptas sian tute difinitan destinton de estontaj O.S.\*, kaj venas diri al ni : "Valoras mi neniom".

Atingi tiun senesperan konstaton : "Valoras mi neniom", ĉu tio ne estas la plej malbona fiasko de la instruado, kies celo estas helpi ĉiun disflori ?

La piratoj de "Radio-Lorraine-Coeur d'Acier"\*\*\* decidis dediĉi al la genetiko la esencon de la elŝendo de tiu jaŭdo de junio 1979. Ili petis min ĝin partopreni. Ĉirkaŭ la 20a horo la

\* Ouvrier Spécialisé = specialigita laboristo. \*\* Radio-Loreno-Koro el Stalo.



elsendo komenciĝas. En pli ol duono el la hejmoj, je kvindek aŭ cent kilometroj ĉirkaŭe, laŭ la kapricoj de la ondopropagado, oni elŝaltas la televidaparaton kaj oni ekaŭskultas la "radion de la hejmlando". Perturba elsendilo instalita ĉe la televida relajo kiu superstaras urbon Longwy, strebas igi LCA-n neaŭdebla ; sed ĉie oni aranĝetis la antenojn ; la lokaj teknikistoj iniciĝis pri la regulado "en kontraŭo de fazo", kaj oni finfine sukcesas aŭdi LCA-n en bonaj kondiĉoj, samkiel la BBC-on en la bona malnova tempo.

Kabano el tabuloj instalita en la halo de la urbdomo servas kiel elsenda studio ; la embaraso, la malordo, la senĉesa cirkulado surprizas la kutiman vizitanton de la studioj de la Radiodomo. Tie ĉi la pordo konstante restas malferma ; kiu ĝin deziras povas eniri, aŭskulti, esprimiĝi. Premitaj ĉirkaŭ ronda tablo hirtigita de mikrofonoj, ĉeestas du ĵurnalistoj, Marcelo kaj Jako, la solaj "profesiistoj" en la afero, du edukistinoj, du enmigrintaj laboristoj, juna virino sur rulfotelo, juna knabo, kelkaj amikoj venintaj kiel najbaroj, kaj la invitito de la tago ŝargita respondi al demandoj pri rasismo, heredeco de la inteligento, pri la t.n. "superdotitoj"... Malantaŭ la tablo la teknika konzolo estas manipulata de Leonardo : ok horojn ĉiutage li transportas sakojn da skorioj en unu el la laborejoj, la plej polvoplena el la ŝtalejo ; fininte lian laboron, li venas al LCA roli kiel radioteknikisto, konekti la mikrofonojn, reguligi la intensecojn ; iafoje li ankaŭ faras anoncojn ĉe la mikrofono ; lia eta balbutado ne malhelpas trapason de la mesaĝo, tute male. ("Ni estas la en la mondo sola radio havanta anonciston-balbutulon!").

La kurso pri genetiko komenciĝas, rapide interrompita per demandoj, kiuj revenigas la traktadon al la esenco : la mal-estimo suferata de la Arabo aŭ la Nigrulo, la "selektado" trudata al la infanoj por ilin orienti al la mallongaj cirkvitoj, la fataleco de malriĉigita vivo ; ĉu tiu fataleco estas biologia, "denaska", kiel tiom da libroj ĝin pretendas ? La debato serioze komenciĝas inter personoj, kiuj scias, ke ili estas implicitaj kaj klopodas por informiĝi, kompreni.

Maljuna virino eniras, turniĝas ĉirkaŭ la tablo, kaj decidiĝas, malvolvas kiel standardon grandan broditan tablotukon. Oni forgesas la genetikon, oni admiras la brodaĵon. "Mi scias nenion fari ĉe la radio ; nu, en du monatoj da laboro mi brodis por vi ĉi tiun tablotukon. Vi ĝin aŭkcios." Poste, ĉe la mikrofono, ŝi klarigas sian brodatoteknikon.

Alia interrompo : instruisto, amanto de moderna poezio, komparis tion traktatan de la genetikisto kun freŝdata poemo ;

li eniras en la studion kaj legas - rimarkinde - kelkajn versojn. La biologio dank'al li alprenas alian amplekson.

Ĝis la 22a30 genetiko, poemoj, aktualaĵoj intermiksiĝas. Poste la materialo estas ordigita kaj la tuta skipo iras vespermanĝi ĉe amika familio.

Unu vorto karakterizas tian eksterordinaran sukceson, kiu iras for trans la originaj celoj : la fervoro. Tio ne plu estas nur sindikato kiu diskonigas siajn gvidvortojn, plu nur iu korporacio kiu sin defendas kontraŭ senlaboreco ; tio estas tuta loĝantaro, kiu ekkaptis tiun esencan povon : informiĝi, esprimiĝi ; kaj kiu ĝin praktikas.\*

Informite pri tiu mia aktivecosfero, ĵurnalista, kiu deziras al mi malmulte da bono, prezentis min al siaj legantoj kiel personon, kiu "montriĝas en la lernejoj ŝirmkortoj". Tio volis esti insulto ; ĉu male ĝi ne estas komplimento ?

Ni jam insistis pri tio : la komunikado estas nuntempe tre malbone establita inter la sciencaj serĉistoj kaj la publiko ; tiu fosaĵo povas havi danĝerajn konsekvencojn por nia socio ; por ĝin ŝtopi necesas konverĝaj streĉoj, kaj unue la streĉoj de la sciencistoj mem. Turnante sin al tiuj koncernataj de la rezulto de iliaj serĉadoj kaj pripensoj, ili simple praktikas sian veran metion. La devigo sin esprimi per ordinara terminoj, sen helpo de la specifa ĵargono uzata kun iliaj kolegoj, estas por ili bonega trudo, okazo pli bone enigi sian penson en la realan mondon. La tempo dediĉita al tiu "popularigo" vere ne estas por ili tempo perdita ; ili kompanse pliriĉiĝas per la veraj demandoj, tiuj, kiujn la ĉiutaga vivo metas al la plejparto el ni, sed kiujn la sciencistoj ŝirmitaj, do flankenigitaj, riskas forgesi.

Certe povas ŝajni malpli prestiĝa sin turni al aŭskultantaro el laboristoj dezirantaj informiĝi pri la evoluciaj teorioj ol fari kursojn al studentoj de la 3a ciklo pri la ekvacioj de Kolmogorov, sed la posttempa rezulto certe estas pli grava. Precipe, oni tiel respondas al apetito, al malsato pri sciado, kiuj ŝajnas al mi pli evidentaj en iuj medioj t.n. "popularaj" ol en la universitatoj.

Inter la rompoj necesaj en nia socio, tiuj koncernantaj la instruadan sistemon estas eble la plej urĝaj.

### La instruadmaŝino.

Laŭ procezo eble natura, spontanea, tiu sistemo iom post iom specialiĝis, "profesiigis" kaj plene perversigis sian celon.

\* Tiu teksto estis verkita antaŭ ol la animantoj de Radio-LCA estis likviditaj kaj ke ĉio "reordiĝis".

Origine konceptita por alporti al ĉiu la elementojn necesajn al ties disflorado, ĝi fariĝis enorma maŝino ŝarĝita liveri al la socio individuojn pretajn plenumi la taskojn necesigitajn de ties mekanismoj.

Ĝi funkcias kiel fabrikĉeno same malhumana kiel tiu de aŭtomatigita uzino ; je ĉiu etapo, la nura celo estas prepari la sekvontan etapon. Ne plu temas por ĉiu pripensi, meti al si demandojn, elekti, sed ensorbi tion, kio estas en la programo kaj alveni antaŭ la aliaj kaj armitaj kontraŭ ili, al la mallarĝa enireja pordo de la sekvanta laborejo.

Fariĝis ĉefa vorto, la vorto "selektado", t.e. la iompostioma elektado de la elementoj supozitaj konsistigi la "eliton". Sed por la grandega plimulto tiu vorto devas prononciĝi "eliminado", t.e. forpuŝado. Ĉio okazas kvazaŭ la lernantoj kaj studentoj estus injektitaj en enorman distilturon forĵetantan el ĉiu el siaj etaĝoj la plej volatilajn produktojn ; estas juĝataj indaj aliri al la sekvonta plataĵo la elementoj respondantaj al specifa kvalifiko ; la aliaj estas orientitaj al cirkvitoj malpli postul-emaj kaj al rezulto malpli promesplena.

La administrantoj, la profesoroj, la gepatroj de lernantoj, la lernantoj mem, ĉiuj kontribuas per sia ĉiutaga agado al plifortigo de tiu mekanismo, eĉ kiam ili perceptas ties absurd-econ kaj denuncas ties pereigan rolon.

Anstataŭ helpi en la malkovro de ĉiam pli larĝaj horizontoj, la instruado kontribuas, por la grandega plimulto de la junuloj, al iu fermo, al orientigo al senelirejoj eventuale komfortaj kaj, eĉ pli malbone, al akceptado de blokita destino. Elcirkvitigite per la mekanismo selektado-eliminado nome de siaj nesufiĉaj "kapabloj", ili akceptas kaj fariĝas la konsentantaj predoj de la brutarofarantoj.

Troviĝis sciencistoj por pravigi tiun mekanismon kaj eĉ por nomi ĝin per sciencoplana vorto : "meritokratio". Sendube, - argumentas ili - la sorto de la eliminatoj estas vea, "sed neniu povas ion por tio ; ĉiu estas juĝata laŭ siaj meritoj kaj ricevas de la socio disolveblojn adaptitajn al tiuj meritoj. La naturo donis al ĉiu malsamajn kapablojn ; la selektado ne havas alian funkcion ol tiri la konsekvencojn de tiu ĉi fakto."

Kio estas la parto de vero en tiu rezonado ?

### **Meritokratio : mitoj kaj realeco.**

En libro, kiu ricevis grandan famon en Usono, la usona psikologo Hernstein\* asertas, ke la okcidenta socio direktiĝas al meritokratia modelo, en kiu la merito estas mezurata per

\* R.J. Hernstein, **IQ in the Meritocracy**. Boston, Little Brown, 1973.

la intelekta kvociento. La loko de ĉiu en la socio estus, laŭ li, pli kaj pli antaŭdeterminita de la "kunnaskita inteligento" tia, kia ĝin rivelas la I.K. En Francio tiu tezo estas adoptita de la pediatro-psikiatro, kiun ni plurfoje citis :

**"Kial estas tiom malmulte da infanoj de laboristoj en la Universitato? [...]. La hereda karaktero de la intelektaj kapabloj ludas sian rolon. Estas nature ke, en socia klaso en kiu la meza I.K. situas sub 100, la nombro de la infanoj respondantaj al la postuloj de la Universitato estas relative malalta. Endas rekte rigardi al tiu realeco. Ĝin bedaŭri ŝanĝas nenion. Ankaŭ ne pligrandiĝi la parton de la handikapo t.n. socikultura."\***

Ni antaŭe indikis, kiel malpreciza estas la koncepto pri "kunnaskita inteligento" aŭ pri "intelekta potencialo", kaj insistis pri la malfacileco pasi de la nocio pri inteligento al iu mezuro kiel la I.K. Sen reparoli pri tiuj problemoj, ni eniru en la logikon de la adeptoj de la I.K.-meritokratio, kaj ni provu kontroli ties koherecon.

Tiu analizo estis antaŭ nelonge realigita de Michel Schiff\*\*, kiu komparis la meritokratian hipotezon kun la nuntempa franca realeco, baziĝante sur la oficialaj statistikoj de la Nacia Edukado. Tiuj tre detalaj statistikoj ebligas kalkulon de la probableco por ĉiu "socia klaso" atingi al la diversaj niveloj lernejoj kaj universitataj ; la donitaĵoj ja estas publikigitaj, sed ne la signifaj ciferoj, kies kalkulon ili ebligas.

Nu, la nombro de la abiturientoj, "gefiloj de laboristoj kaj submastroj", kiuj enskribiĝis dum 1978 en universitato (ekskluzive de la I.U.T. kaj de la altaj lernejoj) estas 17000. Tiu ĉi nombro povas ŝajni ege alta kaj pravigi la deklaraciojn pri la progresoj de la demokratiigo de la supera instruado. Sed tiu ĉi kategorio reprezentas 40 % de unu aĝklaso, t.e. proksimume 350 000 gejunulojn. La probableco de aliro al Universitato povas do esti taksita por tiu kategorio je 17000/350000 = 5 %.

Se oni faras la saman kalkulon por la socia kategorio plej favorata, la gefiloj de la "superaj kadroj kaj liberalaj profesioj", tiu probableco estas 58 %, t.e. dekunuoble ĝis dekduoble pli. Tutevidente nur tiuj du procentoj, 5 % kaj 58 %, ebligas argumentadon pri la koncerna demokratiigo, kaj ne la absolutaj nombroj.

\* P. Debray-Ritzen. **"Lettre ouverte aux parents des petits écoliers"** (Nefermita letero al la gepatroj de la lernantetoj). Parizo - Albin Michel, 1978.

\*\* M. Schiff. **"L'échec scolaire n'est pas inscrit dans les chromosomes"** (La lernejana malsukceso ne estas enskribita en la kromosomoj). Psychologie, dec. 1980, p.51-56.

Kiel provizoran laborhipotezon ni konsideru, ke la konstato tiel farita estas ĉe la gefiloj de la superaj kadroj la konsekvenco de meritokratiia determinismo bazita nur sur la I.K. : tiuj, kies IK transas iun sojlon, eniras en la Universitaton ; kiuj estas klasifikitaj sube, tiuj estas forpuŝataj. Estas eble kalkuli tiun sojlon dank'al enketoj jam de tridek jaroj kondukita de la Instituto nacia por demografiaj studoj (INED) pri la intelekta nivelo de la lernejaĝaj infanoj\*. Specimenaro el pli ol 100 000 gelernejoj aĝaj de ses ĝis dek kvar jaroj estis studita. Ĝi ebligis interalie precizigi la dispartigon de la I.K. de la infanoj laŭ la karakterizoj de la gepatroj. Oni konstatis, ke por la tuto de la "kadroj", tiu dispartigo estas konforma al iu "normala leĝo" (tiu, kiu estas reprezentita per la klasika kloŝforma kurbo), kies meznumero egalas 111,5, kaj la tipa diferenco 13,6 (kio signifas, ke la du trionoj de la notoj situas inter 111,5 - 13,6 = 97,9 kaj 111,5 + 13,6 = 125,1).

En tia dispartigo la I.K. superasita de 58 % de la tuto (proporcio de la gefiloj de "kadroj", kiuj eniras la Universitaton) estas 108,8 ; laŭ la meritokratiia mekanismo, aliro al la Universitato estus do rezervita al la IK superaj al 108,8.

Nu, la samaj enketoj sciigas nin pri tio, ke la gefiloj de laboristoj kaj submastroj havas IK-ojn dispartigitajn laŭ la "normala leĝo" kun meznumero 96,7 kaj tipa diferenco 13,5 ; oni el tio deduktas, ke la proporcio de tiuj inter ili superasantaj 108,8 estas 19 % ; ni vidis, ke fakte la proporcio de tiuj infanoj enirantaj la Universitaton estas nur 5 %.

Alidirite, la hipotezo, ke la IK-meritokratiio efektive praktikigis en Francio inter la gefiloj de la superaj kadroj, estas neakordigebla kun la hipotezo, ke ĝi praktikiĝas inter tiuj de la laboristoj. Endus multipliki per 4 la nombron de tiuj lastaj enirantaj la Universitaton, por ke tiu egalecformo estu realigita.

La klopodo plenumenda por realigi la faman "ŝancegalecon", pri kiu oni tiom parolas, estas eĉ pli grava, se oni kalkulas kun la efiko sur la IK de plibonigo de la edukondiĉoj. Ni rememorigis en la ĉapitro 5 pri la rezultoj observitaj ĉe infanoj naskitaj en familioj klasifikitaj ĉe la "malsupro" de la sociekonomia skalo, sed varbitaj en familioj klasifikitaj ĉe la "supro" de tiu skalo. Eĉ se oni konsentas, ke la origina handikapo manifestita de tiuj infanoj povus esti nur duone kompensita de pli bona ĉirkaŭantaro (kio estas hipotezo tre pesimisma,

\* Cahiers "Travaux et Documents" (Kajeroj "Laboroj kaj Dokumentoj") de INED 1950, n°13 - 1954, n° 23 - 1969, n° 54 - 1978, n° 83.

laŭ la observitaj faktoj) la dispartigo de la I.K. de laboristaj kaj submastraj gefiloj havus meznombron 104,1, kaj la proporcio de tiuj superasantaj la universitatan "sojlon" estus 36%.

Malantaŭ la sekeco de la nombroj, ni provu distingi la homan realecon. Se paroli klare, dum almenaŭ 36 % el la laboristaj gefiloj povus en IK-meritokratiio aliri la Universitaton, nuntempe nur 5 % tien aliras, t.e. sepoble malpli. Alidirite, la kondiĉoj, en kiuj ili disvolviĝas - kaj en kiuj ili estas starigitaj kontraŭ la diversaj obstakloj kiuj signadas la lernejan vojiron - eliminis en tiu socia klaso 6 infanojn el 7, sen tio ke oni povus preteksti ajnan biologian fatalecon. Tio ĉi ne estas pledo inspirita de "egalecismaj" opcioj, sed la konkludo de rigora observado. Ĝi povas mirigi, ĉar ĝi kontraŭas al tiom da antaŭjuĝoj, kiuj ĉiutage esprimiĝas kiel evidentajoj. Tiuj antaŭjuĝoj klare aperas en iu analizo de eksrektoro skribanta : **"Eĉ se estas malplaĉe tion agnoski, la genetika potencialo por sukceso estas statistike pli granda en la idaro de individuoj, kiuj sciis pli bone ol aliaj, certigi al si sukceson"**\* Neniu neas tiun evidentajon : la socia sukceso transdoniĝas de generacio al generacio ; sed ĉu la kaŭzo de tiu transdono estas "genetika" ? Jen kio starigas problemon laŭŝajne ignoratan de tiu aŭtoro.

Kaj tiuj ciferoj donas nur tre malgravigitan mezuron de la intelekta malŝparo en nia socio ; la skalo mem de la IK-notoj inkludas gravan parton de la efikoj de socia diskriminacio. Apogante sin sur statistikoj de dek tri landoj de OCDE, M. Schiff opinias, ke 80 ĝis 90 % el la infanoj, kies gepatroj apartenas al klasoj situantaj en la malsupera duono de la socia skalo, estas forigitaj for de la universitataj studoj pro kialoj aliaj ol iliaj IK-oj.

Tiuj rezultoj montras la malmultan gravecon de la pridemandoj pri heredobleco : **"Sin demandi ĉu la genetikaj diferencoj inter sociaj grupoj klarigas 0%, 50% aŭ 100% de la IK-diferencoj, egalas sin demandi, ĉu la malŝparo de la intelekta kapablo estas je 97%, 94%, aŭ nur 87%"\*\***. Ili precipe montras la gravecon kaj urĝecon de la klopodoj realigendaj en la perspektivo de vera **"ekologio de la spirito"**\*\*\*.

\* J. Capelle, "Les C.E.S. ont-ils échoué?" (Ĉu fiaskis la kolegioj por duagrada instruado?). Le Monde, feb. 1977.

\*\*\*I. Illich, "Une société sans école". Parizo, Seuil, Kolekto "Points", 1971.

\*\* M. Schiff. Communication au 6-ème congrès de génétique humaine (Komunikado al la 6a kongreso de homa genetiko), Jerusalemo, 1981.

## Ĉu "socio senlerneja" ?

Analizante la pereigan rolon, kiun povas ludi la eduka sistemo, Ivan Illich donis al libro tiun provokan titolon : "Socio senlerneja"\*\*\*. Sendube la lernejo tia, kia ĝi estas organizita, ludas ian rolon en la malegaligo de la ŝancoj, sed ĝi estas nur elemento en strukturo multe pli vasta.

Kio estas koncernata, tio estas ĉies rajto aliri al la kono. Por ke tiu rajto estu respektata kaj kontentigita, samkiel la rajto por la malsanuloj aliri al la kuracoj, strebado de la tuta socia korpuso estas necesa. Prefere ol socion sen lernejo, endas deziri socion, en kiu ĉio estu lernejo.

La nuntempa organizado estas finfine pereiga por ĉiuj, inkluzive de tiuj, kiujn ĝi ŝajnas privilegii. Certe, la studentoj en altaj lernejoj ĝuas sukcesajn karierojn, komfortajn monat-finojn kaj iafoje partoprenon en la regpovo ; sed tiuj kontentigoj estas por la plejparto el ili kompensitaj de intelekta rigidigo, pri kiu ili restas sufiĉe konsciaj por mezuri ties tutan pezon ; ili malmulte partoprenas en la idearmovado ; ili pleje povas, per sia burokrata inerteo, oponi al tiu ĉi movado.

Ilia antaŭtempa kaj absurde definitiva klasifiko en la kategorio titolita "elito" faris ilin home viktimoj.

La kulturo, la "inteligenteco" estas same fragilaj kiel la sano. Ĉu oni povas imagi socion, en kiu kelkjara restado en hospitalo estus proponata al ĉiuj gejunuloj, post kio ili estus supozataj profiti dumvive iun sankapitalon tiel akumulitan ?

Lerni, demandi, kompari la respondojn, iom post iom nin konstrui mem, sekvigante nian hazardan kaj pasive ricevitan naskiĝon per kun-naskiĝo organizita kaj volita, estas bezonoj por kies kontentigo la socio devas organiziĝi tuj post solvado de la materialaj problemoj pri la pluvivo. Tiuj bezonoj estas senlimaj ; nuntempe ni respondas ilin nur karikature. Ekzemple la turismo t.n. "popolamaso" prezentita kvazaŭ ĝi kontentigus la bezonon koni aliajn landojn kaj kulturojn, estas tiamaniere organizita, ke ĝi enfermas la vizitanton en ties okulkaŝiloj, kaj plifortigas lin en ties antaŭjuĝoj, dum ĝi ludas kontraŭ la vizitaton (laŭ la esprimo de M. Ki-Zerbo) la rolon de "kultura senfoliigilo".

La necesa rompo en tiu sfero koncernas la tutan socion ; tiu ĉi devas fariĝi vasta eduka sistemo. La prilibertempa depostulo estas malpli tiu pri malpliigo de la laboro ol tiu de ebleco por senhezite elektita laboro. La rolo de la sciencisto en tia ŝanĝo konsistas precipe en tio : fariĝi modesta ; en

\*\*\* Illich, "Une société sans école". Parizo, Seuil, Kolekto "Points", 1971.

socio, en kiu ĉiuj lernas, la scienco fariĝas religio sen klerikaro.

## 4. KOLEKTIVAJ MALESTIMOJ

Sub multoblaj formoj, la plej brutalaj kiel la plej insidaj, severas rasismo ; ni povas ĉiutage ĝin konstati. La fakto ne estas nova ; ĝi ne estas proprajo de nia socio.

Sed la formo, sub kiu nuntempe disvolviĝas tiu alvoko al netolerecaj refleksoj, estas sufiĉe specifa ; oni pretendas pravigi la klasifikon de la homoj laŭ hierarkiigeblaj kategorioj nome de "freŝdataj malkovroj de la moderna scienco", nome de modeloj ĝustigitaj de la biologio".

Se la sciencaj progresoj reale kondukus al tiaj konkludoj, estus necese kalkuli kun ili, kiaj ajn estus pri tio niaj opcioj moralaj, filozofiaj aŭ religiaj. Nuntempe okazas, ke la enhavo de la scienca dirado estas ekzakte kontraŭa al tio, kion oni volus, ke ĝi diru. Vera kontraŭseno estas necesa por fondi elitismajn teoriojn sur la biologio, ĉu la elito konsistus el iuj individuoj interne de ĉiu grupo, aŭ el iuj grupoj.

La nuntempa situacio postulas reagon de la sciencistoj, kies devo estas precizigi kaj diskonigi la kontribuojn de la diversaj studobjektoj ; endas batali kontraŭ la rasismoj ne per la solaj argumentoj koraj, sed per la argumentoj raciaj. Por tio necesas antaŭ ĉio esti klara, do zorge difini la sencon de la uzataj terminoj, kaj, komence, tiun de la vorto "rasismo".

Esti "rasisto", tio estas malestimi la alian nome de lia apartenado al iu grupo.

Tiu grupo povas esti difinita rilate tre diversajn kriteriojn : haŭtkoloron, lingvon, religion, genetikan aŭ kulturan heredaĵon. Por fondi ĉiun el tiuj rasismoj, endas, precizigi, unuparte, kiel la homoj povas esti klasifikitaj laŭ kategorioj relative homogenaj, kaj distingaj unuj de la aliaj ; aliparte, kiel valor-skalo povas esti starigita inter tiuj kategorioj ; alidirite difini la "rasojn", poste ilin hierarkiigi.

Ni plurfoje konstatis en tiu verko, ke la biologia stato ebligas samtempe montri la vanecon de la prirasa koncepto, kaj la neeblecon fondi hierarkion inter individuoj aŭ inter grupoj laŭ ilia biologia heredaĵo. Kaj tamen "rasismo" estas fakto.

La natura reago antaŭ fizikaj aspektoj aŭ kondutadoj malsamaj ol la niaj devus tamen esti la admiro. Ankoraŭfoje la elvokado de kelkaj precizaj rememoroj estos pli efika ol principa aserto.

## Artifikaj paradizoj

Sude de oazo Adrar de la Ifoghoj, montara masivo borde de la dezerto Tanezruft, je kelkaj centoj da kilometroj de rivero Niĝero, mi pasigas longan posttagmezon sub la tendo de Amatu **amenukal** de la Tuaregoj Kel-Kummer. La tuta skipo veninta por kompletigi la sangelprenojn en tiu tribo foriris por la tuta tago en alian kampadejon ; pro ajna kialo mi restis. Nenia vento, senkompata suno ; ĉirkaŭ la tendo, kelkaj fuŝkreskaj dornarbustoj alkroĉitaj al la sablo ; nenio moviĝas ; kameloj kaj kaprinoj, sternitaj, atendas. Apud mi du maljunulinoj ludas, puŝante siajn peonojn sur damtabulo desegnita per la fingro sur la sablo ; unu havas la blankajn ; ŝtonetojn ; la alia la nigrajn : kamelajn fekbuletojn. De tempo al tempo la malpli maljuna iras levi la bazon de la tendo ie, ĝin mallevi tie, kreante bonfaran aerfluon preskaŭ freŝan. El pelveto mi finas, pluigante la plezuron, reston de kamelina lakto. Mia bonstato estas senlima...

Billiam, unu el la lastaj fokĉasistoj de vilaĝeto Tileqilaq, igas nin almontiri la Kulusuk-on, grandegan fjordon de la orienta bordo de Groenlando ; li gvidas nin inter la glacimontoj vertiĝodonaj masoj el glacio malsupreniĝintaj el la glacia kaloto, malrapide derivante al Atlantiko. Sub julia suno, ili fandiĝas kaj alprenas fantastajn formojn ; imagon oni ne bezonas por vidi sin ĉirkaŭita de fabelaj, rigidaj bestoj, por kredi sin en la ruinoj de ia forgesita civito kun ekstravaganca arkitekturo. Billiam kondukas nin ĝis la enirejo de cirko, apud rojo kiu malsuprenfluas de la montaro ; li etendas siajn retojn ; baldaŭ dek, dudek salmoj tie kaptiĝas. Ni kuiras kelkajn. Estas la 1-a matene ; la suno, malaperinte de kelkaj minutoj malantaŭ montopinto, reaperas kaj ĉion revivigas ; tiom akras la malvarmo, ke ni estas frostorigidaj. Sed la gusto de la salmo estas nekomparebla, la suno ŝie fajrerigas la glaciojn ; kiel esti pli bone ?...

Tiu senkompata dezerto, kien dum dek sinsekvaj monatoj falas eĉ ne unu pluvero, tiu reĝlando de la glacio kaj vento, kie nenia arbusto sukcesas kreski, ĉu landoj malfavoritaj ? Ne, dank'al la homo, iafoje paradizoj. Artifikaj paradizoj, ĉar la naturo ĉi tie malmulte donacis, krom la neimagebla beleco de la pejzaĝo ; ĝi donis nur troan varmon aŭ troan malvarmon, troan sekecon aŭ troan humidecon, la harmatanon\* kiu sekegigas, aŭ la blizardon kiu traboras.

\* harmattan : afrika nomo de tre varma kaj seka vento, kiu blovas de la oriento, en okcidenta Afriko

Ni, homoj, sciis invadi la planedon kaj ĉie krei la kondiĉojn de nia pluvivo kaj, eĉ pli bone, de nia bonstato. Ne adapti nin, t.e. adapti nian organismon al la kondiĉoj de la medio, kiel tiom da specioj sciis tion fari, tio ĉi estus tro longtempa, sed adapti nian estomanieron kaj transformi la medion, antaŭgardante la esencon : nian kapablon rigardi tion, kio ĉirkaŭas nin, de ĝi distigante.

Robert Gessain, kiu longatempe vivis kun la Eskimoj de Ammassalik, montras al ni kiel, antaŭ ol esti lamenigitaj de nia civilizacio, ili estis venkintaj la morton\* : ĉiu bebo, ricevante la nomon de mortinta parenco, tiun ĉi revivigis ; la senfina ciklo de la animoj certigis la eternecon de ĉiu kaj la eternecon de la grupo. Eĉ pli mirinde, tiu eterneco etendiĝis al la fokoj, kiujn oni ja devis ĉasi kaj mortigi ; la animo de la foko ankaŭ reenkarniĝis en estonta fokbebo ; la morto por ĝi estis nur donaco de ĝia provizora korpo, kaj antaŭ ol manĝi la Ammassalikanoj ĝentile diris kiel antaŭmanĝan preĝon : "Dankon, foko, pro tio ke ci donis al mi cian viandon."

Por la Tuaregoj Kel-Kummer, la morto estas mistero tiel maltrankviliga, ke la nomo mem de la mortintoj ne povas esti prononcata : ĉiu bebo ricevas nomon, kiu neniam estis ies nomo, kaj neniam plu estos atribuita\*\*. Tie, kie oni mortas, oni estas enterigita, sen ceremonio, sen frazoj : eta tumulto apenaŭ signas la lokon, kaj ĉiu evitas, dum ĝi estas ankoraŭ videbla, ĝin preterpasi.

Ĉu interŝanĝo estas ebla inter tiuj, kiuj klopodas familiarigi la morton, neante la evidentajojn (sed la evidentajoj estas tiel ofte trompaj) kaj tiuj, kiuj forpelis ĝin for de sia ĉiutag-eco, strebante ĝin ignori ? Se la Kel-Kummer kaj la Ammassalikanoj, tiuj geniaj elpensintoj de gestoj, iloj kaj klarigoj de la mondo, renkontiĝus, kiel ili reagus ?

Estas probable, ve!, ke ili sin reciproke malestimus, samkiel ni malestimas tiujn, kiuj kondukadas alimaniere ol ni. Kio do estas tiu veneno, kiun ni distilas kontraŭ la alian ? Ni, kiuj scias tiel bone rigardi la mondon ĉirkaŭ ni, ĝin profiti, ĝin modifi, kial ni tiel malbone rigardas la "alian" ? Ĉu la plej necesa progreso ne estas tiu nova rigardo, kiu faros nin ensorĉitaj de la diferenco ?

## Kontraŭbatali la malestimojn.

Ni, disaj sur nia planedo, sciis ĉie fariĝi venkintoj : kian

\* R. Gessain, "Ammassalik ou la civilisation obligatoire" (Ammassalik aŭ la deviga civilizacio). Parizo, Flammarion, 1970.

\*\* A. Craventre, "Les Touareg" (La Tuaregoj) Kel-Kummer", Parizo, INED/PUF, 1982

pli belan homan venkon imagi ol nian kapablon rideti, plene feliĉaj, en la iglo de l'poluso kaj sub la tendo de l'dezerto ? Kiel akcepti la fuŝadon de tiaj venkoj, venkoj niaj, malestimante tiujn, - "niajn malsimilulojn, niajn fratojn" (François Jacob) - kiuj ilin atingis ?

Por kontraŭbatali tian kondutadon, necesas ĝin rekte rigardi, ĝin konsideri kiel tion, kio ĝi estas : perverso ; studi ties kaŭzojn kaj serĉi la rimedojn. Necesas do sinteno reale scienca kaj UNESKO provas tion iniciati ; en aprilo 1981 ĝi kunvenigis en Ateno serĉistojn kun malsamaj studobjektoj kaj nacioj, por prepari unu "Alvokon al la popoloj de l'mondo kaj al ĉiu homa estaĵo", kiu estis unuvoĉe akceptita. En ĝi estas interalie asertita : "La genetika diverseco ekzistas multe pli inter individuoj apartenantaj al sama populacio ol inter la statistikaj meznombroj de tiuj populacioj, kio forigas ĉian eblon por objektiva kaj stabila difino de la homaj rasoj... Partopreni en scienco, tio estas posedi larĝan parton de respondeco rilate la socian iĝecon de siaj samtempuloj. Tiu respondeco implicas, fronte al la rasismo, politikajn kaj etikajn elektojn."

La sola ekpraktiko de tio sugestita per tiu alvoko konsistigus rompon en la kondutado de multaj socioj, almenaŭ en la nia.

Niaj hierarkiigitaj refleksoj, kiuj puŝas nin konfuzi ne-egalecon, t.e. diferencon, kaj senegalecon, t.e. rilaton de super-eco-malsupereco, ne rezultas nur, kiel ni tion elvokis, el la influo de la elementa aritmetiko sur niaj spiritoj. Ili estas en nia civilizacio plifortigitaj de la mona rolo. Ĉia afero povas situi sur ununura valorŝkalo : la mona valoro. Tiu ĉi ŝkalo trudiĝas al ni, ĉar ĉio en nia ĉiutaga vivo dependas de nia salajro kaj de la prezo de tio dezirata.

Ni kutimas kategoriigi kaj klasifiki la individuojn kaj la grupojn laŭ tio, kiom ili valoras, t.e. laŭ la mono pri kiu ili disponas.

Sociaj mekanismoj de dispartigo de la laboroj laŭ ties penigeco, de kreado de grupoj ĝuantaj limigitajn rajtojn (la enmigrintoj), de specialigo de la diversaj urbaj kvartaloj por la loĝado de iuj kategorioj de personoj, kreis neneigeblajn limojn inter la kunekzistantaj grupoj. Ĝenerale sata, nia socio estas timema ; ĉe ĉiu perturbo, ĝi serĉas la propekan kapron. Ĉar, ne plu suferante la praaĵn angorojn pro malsato kaj malvarmo, ĉiu restas maltrankvila, ĉar la parto de riĉaĵo, kiu estas al li atribuita, povas reduktiĝi ; ĉar, malestimate de tiuj, kies parto estas pli granda, li kompensas malestimante tiujn, kies parto estas pli malgranda.

Nia socio sekrecias rasismon. Plej ofte nekonscie, ni fabrikas tiun venenon, kiu detruas nin mem ; ni asertas : "Mi ne estas rasisto, sed..." Ni memorigis, ke redaktoro, kiu kompreneble sin proklamas kaj sin kredas nerasisto, povis antaŭ nelonge aserti la necesecon distingi en la homaro : "la fekaĵon disde la diamanto".

Ni ne povas malebligi, ke tiuj, kiuj pri tio sentas deziron aŭ bezonon, faru tian distingon. Sed kiam ili pretendas ĝin fari nome de la scienco, la devo de la sciencistoj estas denunci la friponaĵon. Por la biologiistoj tiu devo antaŭas eĉ tiun pli ĝenerale agnoskita progresigi la konon ; ĉar ili povas lernigi al ni, kiel pli bone rigardi la "alian".

## 5. ALIA RIGARDO AL LA HOMO

Kiel ĉiuj vivantaj estaĵoj la homido jam de la komenco ricevas heredaĵon el genetikaj informoj, al ĝi konfidantaj ĉiujn sekretojn, dank'al kiuj ĝia organismo povas konstruiĝi, disvolviĝi kaj lukti por sin tenadi. La kompleksaj substancoj, kiuj ĝin konsistigas, la subtilaj reguligaj mekanismoj, kiuj ĝin stabiligos, la internaj horloĝoj, kiuj ritmos la sinsekvajn fazojn de ĝia disflorado kaj poste de ĝia maljuniĝo, estas neŝangeble difinitaj de la kolekto da genoj ricevataj duone de ĝia patro, duone de ĝia patrino.

Sed tiuj genoj, ĉar izolitaj, estas mutaj. Ili povas esprimiĝi nur dank'al la alportadoj de la ĉirkaŭo. Dum la naŭ monatoj de la feta vivo, tiu ĉirkaŭo estas la patrina sino ; poste ĝi plilarĝiĝas ĝis ĉio kaj ĉiuj, kiuj alportas nutraĵon, energion, informojn, amon.


Ankaŭ la vivantaj estaĵoj aperintaj antaŭ kelkaj miliardoj da jaroj, niaj foraj prauloj, bezonis tiun duoblan alporton : la genojn kaj la medion. Sed ili estis nur "genetikaj aŭtomatoj", senlace ripetantaj la kondutadojn difinitajn de siaj genoj. Iom post iom aperis ia supleco, ebliganta la transdonon al la generita estaĵo de la spertado de ties generinto ; iu lernado certigis la transdonon de informoj ignorataj de la genetika heredaĵo.

La daŭro de tiu lernado estas aparte longa en nia specio, sed ĝi ne estas de ni specifa. Iuj birdoj devas lerni de siaj gepatroj la kanton de la specio : tiu ĉi ne estas enskribita en iliaj genoj. Por la primatoj ne homaj, niaj plej proksimaj kuzoj, la lernado daŭras plurajn jarojn.

Sed ni estas la solaj vivantaj estaĵoj, kiuj sciis krei trian fonton de informoj : krom siaj genoj kaj la medio kiu ĝin ĉirkaŭas, la homido, dank'al la lingvo kaj la skribo, disponas

memoron eksteran al si mem kaj al la aliaj, kie estas en-skribitaj la tuto de la homa spertado. La infano, kiu konstruiĝas, estas riĉa ne nur je la biologiaj receptoj alportitaj de ĝiaj genoj, ne nur je la substancoj alportitaj de ĝia medio kaj la kondutadoj lernitaj el ĝia ĉirkaŭantaro, sed ankaŭ je virtualaj trezoroj akumulitaj per la parolaj tradicioj aŭ kuŝantaj en ĉiuj bibliotekoj de la mondo.

Ĉe la kunfluejo de tiuj tri fontoj la homo povis, dank'al ilia interagado, profiti eksterordinaran privilegion : esti mem fonto. Se ni prezentas tiun procezon de realigo per skemo, endas aldoni al la tri sagoj simbolantaj la alportojn de la genoj, de la medio kaj de la socio, kvaran sagon ekirantan de la individuo kaj revenantan al li mem. Tiu ĉi sago simbolas la kapablon de memstrukturado, kiu rezultas de nia komplekseco.



Tiu nocio pri komplekseco estas nuntempe valorigita de la biologoj, sed ankaŭ de la fizikistoj\*. La plej simpla organismo prezentas tian kompleksecon samtempe en sia strukturo kaj en sia funkciado, ke neblas priskribi ĝin per priskribo de ĝiaj elementoj. Propraĵoj specifaj al la ensemblo devas esti konsiderataj ; ili koncernas nome la povon, kiun posedas materiala strukturo sufiĉe kompleksa, profiti la perturbojn, kiujn tiu strukturo

suferas, por memstrukturigi, pliriĉigi kaj preparigi al reagoj eĉ pli efikaj kontraŭ la venontaj perturboj. La hazardoj, la agresoj, la "bruo" anstataŭ esti detruivaj, povas fariĝi fontoj de pliriĉigo.

Ni provu precizigi tiun veran spitgeston ĵetitan de la nuna scienca pripensado al la klasikaj teorioj, kiuj tiom longatempe servis kiel tolfono al nia kompreno de la universo.

### Tempo falĉanto kaj tempo semanto

La rolo de la daŭro, de la tempopaso en la strukturo de la materialaj ensembloj estas priskribita per centra koncepto forĝita en la XIX-a jarcento, tiu de "entropio". Per tiu termino la

\* Tiel H. Atlan, "Entre le cristal et la fumée" (inter la kristalo kaj la fumo). Parizo, Seuil 1979, aŭ Prigogine kaj Stengers en "La nouvelle alliance" (La nova alianco) Parizo, Gallimard 1979.

fizikisto nomas la erodaĵon ŝajne neinvertigeblan, rezultantan de la maljuniĝo : ĉia organizaĵo estas iom post iom detruata per la uzado, ĉia informo estas parte misformata dum sia transdonado, ĉia ordo estas iom post iom perturbata de sia propra interna dinamiko. La malordo sencece instaliĝas ; laŭ sciencaj terminoj "la entropio kreskas".

Nu, la daŭro, kiam ĝi intervenas en nia vizio de la reala mondo, prezentigas kiel faktoro de eluzado, de senesprimiĝo, de detruado ; ĝia bildo estas tiu de tempo-skeleto armita de sia falĉilo, disŝutante la morton ĉirkaŭ si. Tiu vizio estis dotita per scienca formulado, fare de Sadi Carnot vortiganta en 1824 la "duan principon de la termodinamiko". La unua, t.n. "principo de konservado de la energio" asertas, ke la totala energio de izolita sistemo restas konstanta ; ĝi formulas konstaton kvantan La dua koncernas la kvaliton de tiu energio ; Carnot montras, ke ĝi povas nur difektiĝi. Je ĉiu transformo, energio malpli "nobla" substituiĝas al la antaŭa energio. Je la ekstremo, ĉe la fino de tiu procezo, ĉia strukturo malaperis, ĉia organizaĵo disfalis, ĉia ligilo rompiĝis, ĉia objekto diluiĝis ; la universo estas plu nur granda grizaĵo nediferencigita, pli sinistra ol la nenieco.

Tamen tiu rezulto, kiun ĝeneraligi oni akceptas sen tro pripensi, tutrigore valoras nur por la izolitaj sistemoj. Nu, unu sola "sistemo" estas rigore izolita : la universo mem en sia ensemblo. Ĉu ĝi vere interesas nin, dum ni estas nekapablaj ĝin difini ?

Fakte, ĉiuj sistemoj, pri kiuj ni interesiĝas, kiuj reale estas parto de nia travivata spertado, estas partoj de la universo ; ili ne estas izolitaj ; ili estas trairataj de energifluro kaj ĉe siaj limoj elmetataj al perturboj ; ili konsistigas, laŭ la terminaro de Ilya Prigogine, "disigajn strukturojn". Por ili la dua principo de la termodinamiko alprenas tute alian formon : la akcidentaj fluktuadoj, kiujn ili suferas, povas estigi en ili la aperon de novaj strukturoj pli kompleksaj, pli ebloriĉaj je reago ol la antaŭaj strukturoj.

La daŭro tiam ne plu estas necese detruiva, ĝi alportas oportunojn por kreado. Ĝi ne kreas mem, sed ĝi malfermas la pordon al spontaneaj kreoj. Ĝia bildo fariĝas tiu de tempo kreanta, de tempo semanta. Al la klasika prezento de skeleto armita per sia falĉilo, endas substitui kamparanon antaŭenirantan laŭlonge de la sulko, ŝarĝitan per sako da grajnoj, kiujn li disŝutas ĉirkaŭ sin, promesoj pri novaj vivoj.

La historio de la vivanta mondo estas la evidenta ilustraĵo de tiu kreiva rolo de la daŭro. La unuaj balbutoj de la vivo, molekuloj kapablaj sin reprodukti mem, ebligis la aperon de

strukturoj pli kaj pli kompleksaj, de organizaĵoj kapablaj je funkcioj pli kaj pli diferencigitaj, de estaĵoj disvolvantaj novajn povojn. La plej stranga kazo sendube estas tiu de nia propra specio, kiu troviĝis dotita, laŭ la esprimo de Boris Vian, per troo "da fosforo iom mola, cerbo kiu ebligis tion, ke ni antaŭvidu nin senvivaj". Dank'al tiu cerbo, ni posedas la povon nin mem detruiri individue aŭ kolektive, sed ankaŭ memstrukturi nin, kaj nin mempensi.

La necesaj saltoj por iri de la blua algo al la homo estis ĉiuj rompoj ege riskaj; sed tiuj rompoj alportis pro bonŝanco novajn eblojn. Kiom da fuŝaĵoj, da pereoj, da katastrofoj laŭlonge de la evoluado, kiu foroferis miliardojn da specioj por finatingi per diverĝaj vojiradoj, al kelkaj milionoj da specioj pluekzistantaj, inter kiuj **Homo sapiens sapiens** !

La aventuro de ĉiu el ni daŭras nur malpli ol unu jarcenton, sed ĝi estas tiel same fabela kiel la historio de la vivanto dume de tiuj 3 miliardoj da jaroj. Ankaŭ ĝi estas farita el saltoj kaj rompoj ; ĝia rezulto ne estis enskribita en ĝia unua stato : la hazardo de la sinsekvaj transformoj konsistigas de ni mem iun teneblon, kiun ni povas ekpreni.

#### **Memstrukturado kaj libereco.**

Estas do pripensu inspirita de la kondutado de l'reala mondo kiu kondukas nin desegni - en nia skemo montranta la alportojn kaj la influojn, dank'al kiuj unu homo konstruiĝas - la kvaran sagon kiu bukliĝas sur lin mem. Tiu sago simbolas lian kapablon utiligi por memstrukturigi, la hazardajn perturbojn, kiujn trudas al li la ekstera mondo ; kio povus esti detruiva, fariĝas kreiva.

Ĉu oni ne povas vidi en tiu lasta sago la simbolon de la libereco ? La individuo estas ne nur objekto fabrikita de siaj genoj, de sia medio kaj de la socio al kiu li apartenas ; li estas ankaŭ subjekto, kiu parte sin fabrikas mem.

Tamen endas, ke la alportoj de la tri aliaj fontoj estu sufiĉaj, por ke li atingu sufiĉan kompleksecon, kaj precipe ke la eksteraj influoj, tiuj de la familio aŭ de la socio, ne malhelpu la disvolviĝon de tiu memstrukturado. Socia sistemo estas, ŝajnas al mi, "faŝisma" laŭmezure kiel ĝi neas tiun kvaran sagon, kaj konsideras ĉiun estaĵon kiel rezulton de la nuraj eksteraj alportoj. Eĉ se li profitas de ĉiuj necesaj zorgoj por ke li havu viglan korpon kaj bone plenigitan kapon, li finfine estas nur fabrikita objekto, se oni ne permesas al li eniri mem en la procezon de sia propra kreado, aŭ se oni lin kndiĉas por eviti tiun memkreadon.

Ĉiuj klopodoj devus male strebi al estiĝo de tiu ekdirektado

fare de ĉiu, de sia propra iĝeco. Sur tiu vojo la scienca aktiveco tia, kia ĝi reale disvolviĝas, kaj ne tia, kia ĝi estas prezentata de tiuj, kiuj ĝin neas por kamufli sian ideologion, povas ludi decidigan rolon, rolon vere liberigan. Estas la scienco, kiu ekzercas nin pli bone starigi niajn demandojn, do pli bone "esti", ĉar esti, ĉu tio ne estas unue sin demandi mem ?

**Albert Jacquard**

\*\*\*\*\*

**VALO**

Vortoj de maljunulo



#### **LA CELO, AL KIU KURAĜE NI IRAS**

*Se vi permesas, hodiaŭ - kiel ofte - mi parolos pri mi. Estante de okcitana deveno (langvedoka kaj provenca), mi komprenas, kaj pli-malpli flue parolas du aŭ tri okcitanajn dialektojn. Sed mia gepatra kaj hejma lingvo estas la franca, kiu finkonkeris Okcitanion en la du lastaj jarcentoj. Profunde influita de franca kulturo, mi amas la francan lingvon kaj la francan literaturon.*

*De antaŭ pli ol 70 jaroj mi aspiras al sennacieca kulturo, kaj ankoraŭ ne atingis ĝin. Eble **Lanti** estis la sola homo, al kiu la lingvo internacia iĝis pli intima ol la nacia. Li estas por mi imitinda, sed malfacile imitebla modelo. Sendube, eĉ kiam mi pensas senpere en esperanto, mi restas, pli-malpli nekonscie, sub influo de francaj parolturnoj kaj pensmanieroj : kiel ĉiuj homoj mi estas infektita de nacieco, se ne eĉ de naciismo. Vane mi penas elradikigi tiun naturan inklinon. Sed ju pli malfacile, des pli ni devas celkonscie strebi al tiu idealo.*

*Eble nur denaskaj mondlingvanoj povus plene akiri ekster-nacian sent- kaj penskapablon, kaj en ĉiu cirkonstanco kapablus ekster-nacie agi. Ni almenaŭ penadu akiri tiun trioblan kapablon. Por tio ne troas tuta longa vivo. Sed la celo valoras la penon.*



Praktike, kion fari ? Legi kiel eble plej multe da esperantaj tekstoj, mem skribi koresponde kun alilandaj samideanoj, kaj precipe ĉiam paroli esperante, kiam ni troviĝas inter esperantistoj, eĉ samlandaj. Ĉar nur tiel ni akiras la parolpraktikon, la ŝlosilon, kiu malfermas la pordon al sennacieco.

### Majo 1986

Jus mi eksciis pri la morto de mia malnova amiko Julien Piron, du jarojn malpli aĝa ol mi, kiun mi ekkonis en 1928. Li estis celkonscia esperantisto kaj sennaciulo.

Por ni maljunuloj la lastaj jaroj estas markataj per tiaj funebroj. Feliĉe ni vidas levigi la novajn generaciojn, kiuj anstataŭos nin.

### Pri freŝdata historio. Kion ĝi instruas al ni.

En Francio antaŭ kelkaj jaroj la socialistaj parlamentanoj, tiam opoziciaj, elmetis sinsekve du leĝproponojn por enkonduki esperanton en la programojn de la duagrada lernejoj. Tiuj proponoj restis ne nur ne adoptitaj, sed eĉ ne diskutitaj. Poste, en 1981, la socialistoj akiris absolutan plimulton. Ili regadis dum kvin jaroj. La du sinsekvaj ministroj pri nacia edukado, subskribintoj de la du leĝproponoj, rifuzis esperanton.

Nun lasta baloto alportis alternon. Plimulton akiris dekstraj "liberaluloj", kiuj multon reprenas de la ŝtato, kaj favoras en ĉiaj entreprenoj la privatan iniciaton. Nu bone, ni akceptu la popolan verdikton, kaj sekvu la instruon. Ni nenion plu esperu de la ŝtato. La novaj instancoj konfirmas por ni la vortojn de la Internacio :

"Ne ekzistas superega savonto,  
nek dio nek cezaro nek tribunuso.

Ni savu nin mem !"

Ni plene ekkonsciu, ke ni povas atendi nenion de supre.

Ni devas kalkuli nur pri nia propra forto, kiel ajn malgranda ĝi estas. La venko ne estas al ni donacota : ni ĝin elakiras nur per nia ĉiutaga batalado : kontraŭ la rutinemon, la senbazajn antaŭjuĝojn, la paralizantan tradicion. Per nia nesufok-ebla persistemo. Per la potenco de "l'espero, l'obstino kaj la pacienco".

La tempo de venko ankoraŭ ne venis. Ni maljunuloj ne kapablis triumfi nian aferon. La tasko ankoraŭ staras antaŭ vi, junaj amikoj. Kuraĝe ! La celo valoras la penon.

VALO

La 1-an de majo subite mortis 72-jara, en Sabadell (Hispanujo), s-ro Luiso Mimó Espinalt, aŭtoro de tri Esperanto-lerolibroj kaj tradukinto de diversaj verkoj en Esperanton. Per tre objektivaj artikoloj prilingvaj li kunlaboris en LAŬTE kaj aliaj E-periodaĵoj. Nian kondolencon al lia esperantista edzino, gefiloj, nepino kaj cetera familio.

Komunikis V. Hernandez Llusera.

## ANAĴIZA GRAMATIKO (11)

## La refleksivo (C)

\*\*\*\*\*

2-a Funkcio : - POSESIVO NE REFLEKSIVA RILATE AL LA SUBJEKTO EN ADJEKTA EPITETO.

Ĉi tie la elipso estas evidenta. Per la subkomprenata verbo esti, kiun mi intermetis, la signifo fariĝas klara.

Ekzemploj :

- ili ne defalis de la Eternulo, (kiu estis) dio de iliaj patroj(Z) (Kies dio estis la Eternulo?)
- Paŭlo vivas kun edzino (kiu estas) maloportuna al si kaj al li (Kia estas la edzino?)

3-a Funkcio : - POSESIVO NE REFLEKSIVA EN OBJEKTA PREDIKATIVO.

Same. Per la verbo esti la objekto fariĝas subjekto.

Ekzemploj :

- La registaroj trovas la demandon de lingvo internacia (estanta) inda je ilia enmiksiĝo (Z). (Kia estas la demando?)
- La Eternulo bonvolis fari vin (ke vi estu) lia popolo (Z). (Estanta kio ?)

4-a Funkcio : POSESIVO NE REFLEKSIVA EN OBJEKTA EPITETO.

La epiteto, en akuzativo, havas identan signifon kiel se la kvalifiko estus farita per la kopula verbo.

Ekzemploj :

- Ili metis kunaj la formojn plej similajn (= kiuj estis plej similaj) inter si. (Kiaj estis la formoj ?)
- Ŝi konis viron malkontentan (= kiu estis malkontenta) pri si mem kaj pri sia tuta familio. (Kia estis la viro ?)

5-a Funkcio : - CIRKONSTANCA KOMPLEMENTO KIEL OBJEKTA PREDIKATIVO.

Kiel en la 3-a funkcio, la subkomprenata verbo esti faras la objekton subjekto.

### Ekzemploj :

- Ŝi rimarkis la reĝon de la maro (estantan, irantan) kun sia krono (Z). (Kia estis la reĝo?)
- Li vidis anĝelon (starantan) kun glavo en sia mano (Z). (Kia estis la anĝelo?)

### 6-a Funkcio - POSESIVO POST ADJEKTIVA PARTICIPO.

Eĉ kiam ĝi estas nur subkomprenata, la participo funkcias kiel predikato kaj faras la substantivon, kiun ĝi kvalifikas, subjekto.

### Ekzemploj :

- Ŝi restis tie kun la manoj ligitaj sur ŝia dorso. (Kiaj estis la manoj?)
- Johano akceptis ilin kun la leporhundo (kuŝanta) ĉe liaj piedoj. (Kia estis la hundo?)
- Li restis tie kun la kapo (tenata aŭ estanta) inter liaj manoj. (Kia estis la kapo?)

### 7-a Funkcio : - ŜANĜO DE ORDO ŜANĜAS LA POSESIVON.

Refleksiva epiteto antaŭ substantivo ŝanĝiĝas al ne refleksiva se oni translokas ĝin post la substantivon, tial ke, pro subkompreno de la verbo esti, ĝi kvazaŭ fariĝas predikativo, kaj la senco aliĝas.

### Ekzemploj :

- Ŝi venis kun sia frato Felikso. (Kun kiu ŝi venis?) - Ŝi venis kun Felikso, (kiu estas) ŝia frato. (Kiu estas Felikso?)
- Venis la brava Roldano rajdante sur sia potenca ĉevalo, (kiu estis nomata) Briadoro. (Sur kio li rajdis?) - Venis la brava Roldano rajdante sur Briadoro, (kiu estis) lia potenca ĉevalo. (Kio estis Briadoro?)

### 8-a Funkcio : - REFLEKSIVO EN PASIVO NE RILATAS AL LA SUBJEKTO.

En pasivo, refleksivo ne rilatas al la propozicia subjekto, sed, en nerektaj aŭ cirkonstancaj komplementoj dependaj de la pasiva verbo, al la aganto de pasivo, en plena konformeco kun la aktivo ; neniam refleksivo estas aplikebla al la aganto de pasivo mem, kiu funkcias kvazaŭ dua subjekto ; t.e., oni neniam povas diri "-ita, -ata, aŭ -ota de sia -o, aŭ de si."

### Ekzemploj :

- Ŝi estis amata de ŝiaj najbaroj = Ŝiaj najbaroj amis ŝin.
- Ŝi estis elhospitaligita de la kuracisto kontraŭ ŝia volo = La kuracisto estis elhospitaliginta ŝin kontraŭ ŝia volo
- Li estis liberigata de la provoso kontraŭ sia volo. (de la provoso) = La provoso liberigis lin kontraŭ sia volo.

Tamen, kompreneble, refleksivo rilatas nerekte al la propozicia subjekto en la nerektaj aŭ cirkonstancaj komplementoj kiam la propozicia subjekto estas mem la aganto de la pasivo.

### Ekzemploj :

- Ŝi montris al mi la leteron senditan de ŝi al sia patro = La leteron, kiun ŝi estis sendinta al sia patro.
- Ili montris al ni la fungojn trovitajn (de ili) dum sia ekskursado. = Ili montris al ni la fungojn, kiujn ili estis trovintaj dum sia ekskursado.

### **L.Mimó**

\*\*\*\*\*

La fino de tiu ĉi rubriko, ricevita antaŭ la morto de la verkinto, aperos en du venontaj numeroj. (Red.)

\*\*\*\*\*

Por nia medito :

**Fragmentoj  
el leteroj de E. LANTI**

### **ĈE LA KRISTANOJ**

*Kiel ĉiu scias, Ĉeŭrĉil kaj Rusvelt neniam preterlasas la okazon aserti en siaj paroladoj, ke ili defendas la kristanismon kontraŭ la Hitlera paganismo. Eble tiel estas : la kristanismo ja plenigis multajn paĝojn de la Historio per kruelaĵoj kaj abomenindaĵoj kaj sekve povas konkuri kun la paganismo. Sed konvenas almenaŭ ne malatenti la **fakton**, ke ne ĉiuj kristanoj samopinias kun la du menciitaj estroj de la anglolingva pluto-kratio. Kaj pri tio oni eĉ povas trovi tre karakterizan pruvon en esp-aj tekstoj mem. Jen unu tre citinda :*

*"...la ĉiopova Dio ekaŭdis kaj finaŭskultis la preĝegojn de la hungaraj koroj kaj animoj, senĉese daŭrantajn de 22 jaroj kaj faris juston al la Hungararo, maljuste suferinta kaj turmentita. Li redonis al la Hungara Sankta Krono la plej belan trezoron de la lando : parton de Transilvanio... Ni, hungaroj, en la unuaj momentoj apenaŭ povas trovi vortojn, por danki la potencan Dion pro la graco, pro la bonvolo, per kiu Li nin distingis... Sed samtempe ni dankas kun sincero kaj dankema koro niajn bonvolajn amikojn najbarlandajn ! Sed ne nur la popolojn de la landoj, sed ankaŭ iliajn gvidantojn eminentajn : Beniton Mussolini kaj Adolfin Hitler pro tio, ke ili ne nur kun vera amikeco, sed ankaŭ kun profunda saĝo kaj kun vera sento de la rajteco kaj justo arbitraciis al ni en Vieno provizore nur tiun ĉi parton de Transilvanio". (El la ĉefartikolo en "Cirkulero, sciigilo por la anoj de la Hungarlanda Katolika*

Esperanto-Societo". Budapeŝto, oktobro 1940). - Ĉia komento superfluas, ĉu ne vere ?...

(Tiu artikolo aperis en "Satana Bulteno", n°6, Novembro 1941 kun la subskribo Herezulo).

## ĈU H.G. ŬELS KOMPRENAS LA ANGLAN LINGVON ?

Malsprita demando ! kredeble pensos kelkaj legantoj. Eble. Tamen, legante la komentojn, kiujn faras tiu mondfama verkisto brita pri la 8 punktoj de Rusvelt-Ĉeŭrcil, mi emis fari tian demandon. En la 6-a punkto estas dirite : "...paco, kiu ebligas al ĉiuj nacioj vivi sekure en siaj propraj limoj..." Kaj Ŭels komentas jene : "...Danio, Finnlando, Norvegio, Bohemio, Bulgario, kaj Etiopio devas agnoski, ke por sia propra bonstato kaj por la sekuro de l'mondo ili devas jure stati kiel Teksas, Alabama aŭ Nov-Jorko en Usono..."

Prave ! Mi tute konsentas kun Ŭels pri tio, sed nenie en la 8 punktoj estas parolite pri tia ordigo de l'mondo. Male en la 3-a punkto estas menciita la "deziro vidi la restarigon de la suverenaj rajtoj kaj la propran registemon de la landoj subpremitaj".

Nu, se oni konsideras, ke la menciitaj landoj estas malsamlingvaj, eble Ĉeŭrcil kaj Rusvelt havas pli praktikan solvon ol Ŭels pri la demando. Estas iel malsaĝe kompari ilin kun la usonaj "ŝtatoj", nesuverenaj, rilate mondpolitikon, kaj kie la angla lingvo estas la oficiala.

Tiom longe, kiom en Eŭropo regos multlingveco, same longe ekzistos tie favora grundo por regaviduloj, kiuj agitos por nacia sendependeco, ŝtata suvereneco ktp.

Ŭels estas certe larĝmensa homo, sed lia ignoro al espokauzas, ke li diras foje sensencaĵojn. Kaj ni ne laciĝu ripeti, ke ni, esp-istoj, faras pli efike konstruan laboron ol ĉiuj famuloj, kiuj provas konstrui per neprilaborita materialo, per ne alĝustigeblaj ŝtonoj...

Herezulo.

(Tiu artikolo aperis en "Satana Bulteno", n°6, Novembro 1941)

## LUDFRIPONECO

La registroj diversspecaj kutime ludas inter si laŭ la regularo diplomacia ; kiam ili perdas en la ludo, tio ne domaĝas al ili persone. Sed iafoje okazas fripona ludo per la interveno de spionaj aŭ similaj aparatoj kiel la angla "Intelligence Service" aŭ la rusa G.P.U. Ŝajnas, ke Petro Laval el Francio estis viktimo de tiu fripona ludo.

Eble kelkaj legantoj ankoraŭ memoras, ke, antaŭ ses jaroj tiu ekssocialista registro estis ĉefministro de Francio. Tiam li veturis al Moskvo kaj tie interkonsentis kun Stalin. La teksto de tiu interkonsento estis tiel signifa, ke ĝi aperis en la burĝaj ĵurnaloj diklitere kaj frontpaĝe, dum en la bolŝevista **Homaro** ĝi estis kaŝita meze de malgravaj informoj. En la Stalina deklaro estis ja dirite, ke la Kremla diktatoro "...plene aprobas la armadprogramon de Francio...", kiun antaŭe kontraŭbatalis plej akre la franca kompartio.

Nu, tempo forpasis kaj la filudo diplomacia daŭris. Siavice Hitler interkonsentis kun Stalin, kaj Laval estis preta interkonsenti kun Hitler, post kiam ĉi tiu lasta estis rompinta sian interkonsenton kun Stalin, kiu poste alianciĝis kun la Brit-Usona plutokratio. Tiam la spionaparatoj angla kaj rusa intervenis en la ludon laŭ fripona maniero...

(Tiu artikolo aperis en "Satana Bulteno", n°6, Novembro 1941, kun la subskribo Herezulo).

## MASKO FALIS

Oni ja povas senti nur abomenon por la hitlerismo, sed la brita plutokratio ĉiam naŭzis min pro sia hipokriteco. Sub demokratia masko tiu grandega imperio, armile, ruze aŭ mone akirita, kaj ne per demokratiaj rimedoj, ĉiam penadis kredigi, ke ĝi respektas la "sendependecon" de l'malgrandaj nacioj. Kaj ŝajne tiel okazis - sed kondiĉe, ke ili obeu al la "sugestoj" kaj instigoj de l'brita diplomatio.

Nu, okazis, ke Persio ne volis obei. Oni ja scias, ke Britio petis al tiu petrolriĉa sed armile malforta lando, ke ĝi forpelu la germanojn, kiuj turiste aŭ negociste troviĝis inter ĝiaj limoj. La legantoj scias, kio okazis : Persio estis invadita de Britiaj kaj Sovetiaj trupoj kaj finfine la persia suvereneco obeis...

Kiam Hitler invadas landon, tio estas krimo, sed kiam Ĉeŭrcil faras la samon, tiam la "demokratoj" riverencas aprobe aŭ silentas.

(Tiu artikolo aperis en "Satana Bulteno", n°6, Novembro 1941, kun la subskribo Herezulo).

"...Mi bone komprenas vian melankolion, tial ke mi mem spertas ĝin. Kaj, strange! ĝuste en la momentoj, kiam mi spertas tiun malagraban senton, mi emas verki ironie, ŝerce. Eble tio savas min. Sed ne nur en milita tempo mi estas melankolia, pesimista ; fakte dum mia tuta vivo mi estis tia. Kaj kiam mi estis malpli aĝa ol 20-jara ne malofte mi emis

al sinmortigo. Ĉiam mi estis malkontenta pri mi mem, morale kaj fizike. Kaj ĉiam mi estis mirigita, ke virino povas esti logita de mi. Tial verŝajne mi emas moki min mem kaj aliajn.

Tre interesis min via rimarko pri tiuj, kiuj ne sentas sin tuŝataj de la hombuĉado, se ili mem ne suferas de tio. Antaŭ kelkaj tagoj mi ja skribis en mian notlibron: "Se la popolo (la grego) kiel tuto havas sufiĉe por manĝi kaj trinki, ĝi ne suferas pro sia sklav- servut- aŭ proleteco. Nur relative mal-multaj sentas sian submetecon kaj estas ribelemaj. En aliaj cirkonstancoj tiuj ribelemuloj estus la mastroj. Kaj tio facile klarigas, kial hieraŭaj proletoj estas hodiaŭaj mastroj"

Via tute ĝusta rimarko klarigas la tialon de la nuna stato en la movado. Neniel ni devas miri. Kaj ne vane paroli al tiauloj pri nia idealo. Relegu okaze la artikolon **Ĉiu plenumo sian devon**, en la novembra n-ro de "S-ulo" 1937 (\*). Relegante ĝin antaŭ kelka tempo mi tamen emus fari ne nur stilajn ŝanĝetojn, sed tute forigi la parton, kie estas dirite, ke sen-naciisto devas konsenti "morti aŭ mortigi nur por defendi sian homecon". Mi konvertiĝis al la pacismo, al la senperforteco, kio ne signifas rezignon je paca batalo, kontraŭstaro kontraŭ la maljusto..."

(\*) Tiu artikolo estas represita ankaŭ en "El Verkoj de Lanti. 1", p.149.

(El letero al A.C.H., Aŭstralio, 19.4.42)

\*\*\*\*\*

## A. Lopez Luna :

### HOMOJ, KIUJN MI NE KONIS

Mi ne estas juna (al mi ne plaĉas uzi la vorton "maljuna") kaj mi estas je la fino de mia kariero sur la tero. Sed la travivitaj jaroj donas al mi certan spiritan trankvilecon por rigardi en la pasinton.

Mi pensas pri ĉio, kion mi plenumis, pri miaj ideoj, pri mia vivkoncepto kaj mi povas aserti, ke preskaŭ ĉio, kio mi estas, estas "verko" de homoj, kiujn mi ne konis.

Tiuj homoj, pere de siaj skribaĵoj - multaj el tiuj skribaĵoj estis publikigitaj antaŭ jarcentoj - nutris min intelekte kaj kontribuis al la formado de tio, kio mi estas intelekte. Ili estis Platono, Lao-Tse, Konfuceo, Sofoklo, Aristofono k.m.a.

Kaj pli proksime al nia tempo mi povas mencii D-ron Zamenhof, ĉar sen kono de Esperanto mia vivo estus estinta tute alia, ol ĝi estas. Mi ne scias ĉu pli bona ĉu pli malbona, sed tute alia.

Alia homo, ankaŭ tre proksima al ni, kiu influis mian vivon, estis E. Lanti. Mi estis fizike juna, kiam hazarde venis al miaj manoj **Leteroj de E. Lanti** (eldono : Parizo 1940). Tiu legado influis mian tutan postan vivon kaj ĝis la hodiaŭa tago.

Poste mi legis aliajn Lantiajn verkojn ; kaj mi posedas, interalie, ekzempleron de **Vortoj de Kamarado E. Lanti** (eldono : Leipzig, Germanio, 1931), kiun donacis al mi iu SAT-ano nomata J.M. Duran (li vivas, sed ne okupiĝas plu pri Esperanto). Tiu ĉi ekzemplero nun ĉe mi havas dediĉon de la aŭtoro al iu S-ro nomata Pereira, kaj diras jene :

"Al S-ano A.A. Pereira mi donacas ĉi tiun libron, kiel memoraĵon pri interkonatiĝo en Meksikio (kio sekvas estas surstrekita de Lanti : "fine de la jaro 1942"), kun la espero, ke ties legado helpas, ke li fariĝu, kiel la aŭtoro mem, ĝismedola esperantisto ; kio estas la unua, sed nepre necesa paŝo, kiu kondukas al daŭra paco, per la starigo de mondregno...E.Lanti, 29-12-1942"

Kaj sur paĝo 32-a Lanti skribis ĉe la margeno de la 3-a kaj 4-a paragrafoj ĉi tion :

"Ne ĝuste prezentita demando : oni devus forlasi *ec*, kiam la radiko estas adjektiva. En **Plena Vortaro** tiaj radikoj estas signataj per **a** ĉe la fino".

Eugène Aristide Alfred Adam (E. Lanti) vizitis Buenos Aires, ĉefurbon de Argentino, ĉirkaŭ 1938 - mi ne bone memoras la daton -, sed mi ne konis lin persone, eĉ se mi jam de la jaro 1934 estis Esperantisto. Sed samideano, kiu vizitis lin, rakontis al mi, ke Lanti ricevis lin side surplanke kaj kun krucigitaj kruroj kiel kutimas Orientanoj.

Bone, mi invitas vin, legantoj de **Laŭte!** (ĉefe tiujn, kiuj ne estas tro junaj) sidi trankvile ĉe vi en pluva tago kaj rerigardi en vian vivon kaj pensi al tiuj homoj, kiujn vi ne konis persone kaj kiuj, pere de siaj verkoj, influis nedubeble vian vivon, kaj faris el vi tion, kio vi estas intelekte.

Ĉi tio, kion vi legis, estas mia unua kontribuo al **Laŭte!** kaj mi esperas, ke gelaŭtuloj trovos ĝin malpeza.

A. Lopez Luna.

---

Memorige : En Pau (sudokc. Francio) de la 22a de julio ĝis la 29a de julio '86 : Internacia Kultura kaj Turisma Semajno. Prezo inter 1400 kaj 2200 FF laŭ aĝo kaj aliĝdato entenas la tutan restadon kun ekskursoj kaj urbvizitoj. Plenaj informoj kontraŭ 2 irpk. al: Esperanto Pau-Adour, C.S. Pépinière av. R. Schuman, F 64000 PAU.

GBEGLO Koffi (Togo) :

## KOMPATINDULOJ

Leganto, pri kiuj vi pensas, kiam vi aŭdas pri kompatinduloj? Ĉu popoloj el la tuta mondo aŭ el iu difinita kontinento? Pripensu, la problemo estas pli simpla, ol vi ĝin konsideras. Estas kompatinduloj en ĉiuj kontinentoj sed en la triamondaj landoj kaj aparte en Afriko, la vivo de tieaj anoj malkaŝas iliajn mizerojn kaj kompatindecon. Ĉi tie mi prenos ekzemplon el Afriko, kie stariĝas fenomenoj, kiuj suferigas afrikanojn.

Afriko dronas en malagrabraĵoj, kiuj devenas unue de la naturaj kondiĉoj, kaj poste de koloniismo.

La plimulto da afrikanoj estas kamparanoj. Ilia vivo estas ligita al (dependas de) terlaboro. Oni devas kultivi por vivteni sin. Tio estas evidenta, laŭmezure kiel la vivo de kia ajn gento dependas de la mondregiono, kie ĝi vivas. Tial, ĉie en Afriko, oni trovas kamparanojn tre kontentajn je sia sorto, ĉar estas samtempe facile kaj malfacile al ĉiuj homoj vivi. Antaŭe, afrikanoj ne suferis, ĉar la vetero estis ĉiam promesplena, la pluvoj venis dum la taŭgaj tempoj kaj la agrikulturo, la sola potenciga laboro afrikana ĉiam estis fruktodona. Flanke de la agrokulturo, afrikanoj praktikis fiŝkaptadon. Tiel ili bone manĝis, ĉar kaj la terkulturado kaj la fiŝkaptado fruktodonis, kvankam la teknikoj kaj iloj estis arkaikaj. Ĉu tia etoso konserviĝas ĝis nun? Ne, oni diru, ĉar necesas, ke ni rigardu nunan Afrikon por tiri konkludon: afrikanoj, ekz. etiopianoj, saharaanoj, ktp, mortas kvante pro malsato kaj malsano, ĉar pluvoj ege mankas kaj ne estas plu akvo en la fluejoj. Kion povas fari ĉi tiuj popoloj vidalvide de ĉi tiuj problemoj? Helpon ili petu, sed kiuj povas ilin helpi? Nur tiuj, kiuj estas je la bazo de la vea situacio, la Blankuloj, koloniistoj kaj sklavigistoj.

Kial Blankuloj venis en Afrikon? Ili dirus: por helpi Nigrulojn venki suferojn. Ne, ili havis alian ideon sub tio, kion ili diris, ilia ĉefa celo estas ekspluati la NigrMONDON. Tiel prenis ili Afrikon, sendis afrikaĵojn al siaj landoj, uzis sklave afrikanojn en siaj plantejoj kaj uzinoj. Kiel ili povas voli, ke afrikanoj ne suferu? La grajnoj, kiujn ili semis, ekfruktoportas.

Afrikanoj suferas kaj tio estas normala, ĉar la samaj ekspluatemaj nehomamaj koloniistoj estas kaŭzoj de la aliigo de la klimataj kondiĉoj, kiuj malbonigas la agrikulturon kaj fiŝkaptadon en Afriko; ni vidu kiel: antaŭe ne estis multspe-

caj industrioj en la mondo kaj tiel la naturo normale kondukis kaj ĉiea vivo estis agrabla. Nune, ĉiaj industrioj ĉie instalitaj kaj instalataj eligas rubojn kaj polvojn, kiuj kombiniĝas kun la nuboj pluvaj; ĉi tiuj fremduloj en la lando de nuboj aliigas la vivon de ĉi tiuj kaj rezultas fenomenoj nekomprenblaj: pluvoj ne formiĝas plu bone kaj la sekeco ĉie stariĝas.

Ni kune imagu, kion faru popoloj en ĉi tiu situacio. La vivo ilia estas nevivibla sed ili ne devas sin mortigi, tial ili klopodas vivi laŭ siaj manieroj. Rigardu ilin inter la malagrabraĵoj tiaj, kia longa sekeco kaj malsato, malsano, ktp. Plie plu rigardu en Sudafriko: ĉu homa homo povas tion akcepti? Blankuloj riparu kion ili malbonigis. Afrikaj prauloj alvokas kompatemulojn, kaj precipe la koloniistojn **mem, partopreni al ĉi tiu riparado. Oni sciu, ke oni ne devas plu ekspluati Afrikon, kaj kaŝe starigi en ĝi hegemoniojn kaj sangajn luktojn.** Jes, suferuloj estas kompatindaj kaj helpindaj kaj kompatemuloj kaj helpemuloj dankindaj. Tial al homamaj homoj estas dediĉita la ĉi-suba artikolo poemforme verkita.

### AL CI BONFARULO

Ĉu ci konas tiujn, al kiuj ci faras bonon?

Ĉu ci tion faras por esti poste kompensata?

Mi opinias, ke ne, ĉar cia intenco estas savi vivon.

Ci ege pravas, ĉar ĉiu kompatindulo estu helpata.

Ciaj oreloj perceptu aŭdindaĵojn,

Ĉar malbonuloj povas deviigi cian menson.

Ciaj okuloj klare kaj ĝuste vidu vidindaĵojn,

Ĉar fiaj kaj aĉaj konsilantoj detruos cian intencon.

La vivo estu tia, ke posedantoj helpu povrulojn.

Ĉiu devas kontribui al la savo de vivo.

Tiel, agu malkaŝe, ke ciaj faroj trafu malfeliĉulojn.

Iru antaŭen kaj je sukcesoj pleniĝu cia vivo.

Homo sciu, kial proksimuloj suferas kaj ploras.

Ciaj bonfaroj plibonigas ankaŭ cian vivon.

Popoloj cin dankas kaŝe, ĉar ili ne plu suferas.

Daŭrigu ciajn agojn, ci savas homan vivon.

\*\*\*\*\*

Al la posedantoj de PLENA ANALIZA GRAMATIKO (4a eldono).

Aperis la 5-a eldono de tiu verko kun kelkaj korektoj aŭ aldonoj. Kontraŭ unu respond-kupono kaj koverto kun via adreso vi povos ricevi la liston de korektoj, petante ĝin al LENTAIGNE, 3 av. Gaillarde, F 34000 MONTPELLIER.

## LA FLORO DE L' VIVO

La homoj diras pri mi, ke mi estas kruela. Ili asertas, ke mi ne havas kompaton. Sed tio ne estas vera. Kiam iuj hombestoj ekzemple murdis Zapata aŭ Che Guevara, tiam mi pli ploris ol multaj homoj. Kiel triste estis al mi, kiam mi devis meti la tolon sur ilin. La homoj timas min kaj rakontas strangajn aferojn pri mi. Fojfoje oni eĉ kredas min ia diu, supozante, ke mi scias ĉion, ke mi neniam delasas de miaj decidoj. Aliaj supozas, ke mi scias nenion, ke mi nur faras tion, kion pli alta potenco postulas de mi. Ĉio ĉi estas sufiĉe konfuza kaj klare montras, ke la homoj min imagas laŭ homaj mezuroj. La homa imagokapablo estas tre limigita, ja eĉ terure limigita, por diri la tutan veron. Kial ili insultas min kruela? Ĉar la kruelecoj apartenas al la surteraj ĉiutagaĵoj. Kial ili timas min? Ĉar la homoj timas multajn aferojn. Ili timas la najbarojn. Ili timas la leĝojn. Ili timas la sciencon senreligian. Ili timas la policon kaj la ekzekutiston. Ili timas ĉiujn fremdajn aĵojn. Nokte ili timas fantomojn. Kaj se iu nur ekparolas pri tio, ke ilia avino estas sorĉistino, tiam ili ĝenerale tuj kredas tion. Kaj se alia, la frato de la unua, diras: "Ek, tranĉpiku la sorĉistinon!", jen ili tuj tranĉpikas ŝin per dika tranĉilo sen perdi eĉ nur ploron pri tio. Komprenoble ili tiam ne estas kruelaj. Ili tiam nur agis laŭ la sankta devo. Ke sankta devo ne ekzistas kaj fine ĉiam nur funkcias per ilia akcepto, tion ili ne kredas. Se iu diras tion al ili, tiam ili tuj suspektas, ke mankas klapo en ties kapo. Kial oni metas tiel nomatajn frenezulojn en frenezulejojn? Sufiĉe ofte, ĉar ili ne akceptas iujn sanktajn devojn. Se tiaj homoj tiam preferas morti ol ree akcepti iun sanktigitan skemon, jen ili skuas senkomprene la kapojn. Ne estu ofendita, leganto. Estas bedaŭrinde la pura vero. Mi devas scii tion. Mi ja estas la skeletulo. Do, mi estas tiu, kiu laŭfame vagas kun falĉilo kaj horoglaso, por kolekti tiujn homojn, kies tempo pasis laŭ homa saĝo. Ĉu la tempo vere ĉiam pasis? Ĉu vere ĉiam estas jam tempo marŝi en la ombran mondon? Tute ne, eĉ male. Multaj homoj sen kontraŭdiro mortbatas, venenas, trapikas, disŝiras kaj distretas sin reciproke. Ili strangolas aliajn kaj atentis pri tio, ke oni ne forgesu ankaŭ pri la mortkondamnoj. Ili lasas malsatmorti aliajn kaj mem mortas pro pli ol mil stultaĵoj. Ili mortas kiel herooj kaj pro tio, ke

ili ne kuraĝas rezisti iujn vivdangerojn. Ili rifuzas ĉiun manĝon kaj saltas pro perdita amo el fenestro. Ili perdas la vivivolon, ĉar aliaj homoj lerte sukcesis pri tio enflustri al ili, ke la vivo ne valoras. Kaj se ili mortis, tiam oni enterigas ilin per multe da vento kaj vantaĵoj. Mi neniam komprenis, kial ili ceremonias pri mortintoj kaj samtempe ĉasas vivantojn kiel sovaĝajn rabobestojn. Estas strange. Multaj malamas la ĉion vivantan kaj fuŝas al si la kurtan vivon per tre diversaj enkapaj frenezajoj. Mi ja ne kontestas tion. Mi ne povas kompreni tion, ĉar mi devas suferi la turmentojn de eternulo. En tiu ĉi jarcento tio ne facile estas eltenebla. Se oni komparas ĝin al la jarcentoj de la sankta inkvizicio, jen oni devas diri, ke la inkviziciuloj estis nur beboj rilate la nunajn "progresojn". Mia laboro estas hodiaŭ pli dura ol kiam ajn. Ĉu vi eble pensas, ke faras ĝojon al mi raketi pri la militkampoj por kolekti amase mortulojn? Vi konas min kiel la skeletulon, kiu kun olda ĉevalaĉo kaj ĉareto ekmarŝas. Ho, naiwa homo! Tio pasis. Tio jam delonge pasis. La erao de la industrio ankaŭ min ne preteriris. Ĉu ni miru pri tio? En tempo, en kiu la individuo ne pli valoras ol olda ĉifonresto, en tempo, en kiu la militistoj faras la politikon?

Mi invitas vin. Estu kuraĝa kaj foje kunvenu. Akompanu min al la urbo BONFARTO. Ni nun devos rapidi. Donu al mi la nigran tolon. Dankon! En BONFARTO la homoj mortas kiel muŝoj. Apenaŭ ili ekvivas, jen oni jam oferas ilin sur la altaroj de la sangaj dioj. Oferoj estas necesaj, diras reĝo la Brava. Nur al vi: ankaŭ la reĝo drinkas sangon. Plaĉas al li fortranĉigi al la knaboj la kapojn, por ke ili ne iam povu ribeli kontraŭ lin. Sed interrompu min. Mi parolas tro multe. Ekzemple la lasta estas ja "severa sekreto". Rapide kunvenu. Nia celo estas la placo de LIBERO. Jen tien, kaj nun laŭ la stratoj de la NECESO kaj PACAMO. Nun ankoraŭ tra la strato de SCIENCO. Tre bone, nun ni jam atingis la placon. La ŝvito gutas de mi, sed ni alvenis ĝustatempe. Kaj nun bone observu. Jen, meze de la placo la svelta damo kun la longa hararo apud la puto. Jes tiu, kiu ĵus intencas kliniĝi super la putorando. Observu bone ŝin. Ŝi estas nur unu el multaj memmurdistoj en nia tempo, kaj nur tial mi montras al vi la dramon. Pro iu senbaza espero ŝi kredas, ke estas la puto de l'vivo, ja vere. Ŝajnas ridinde, sed ŝi tute firme kredas, ke estas la puto de l'vivo. Estas klare, tia puto ne ekzistas. Tio ja estas olda fabelo por trompi la homojn. Sed ŝi kredas. Ŝi neniam lernis, ke la floro de l'vivo nur interne de

ŝi mem povas kreski. Ŝi kredas, ke ŝi nur unufoje devas trinki el la puto - kaj tuj la vivo ekbrilas. Rigardu la grizan vizaĝon de la damo. Ĉu ne estas vizaĝo eterne atendantanta ? Ĉiun tagon ŝi atendas ĝis la moŝtoj lasas enflui la akvon. Kaj nur tiam ŝi provas trinki. Ĉiufoje, se ŝi intencas trinki, venas la leon-simila homavida bestaĉo. Vidu, tie ĝi jam denove alpaŝas. Kiel alglitas la dorson post ŝi !

Ĉiun tagon, se la knabino ektrinkis, la monstro hurlis kaj montris la dentojn. La knabino tial neniam kuraĝis trinki.

Vidu, kiel ŝi tremas ! Tiel kaj helpe de la puto ŝi neniam sukcesintus, eĉ ne, se la besto iam estintus fora. Tion kreu al mi.

Hodiaŭ la dramo finiĝos. Rigardu nun : la damo provas trinki. Sed observu la monstron. Kiel hirtiĝas, kiel minace hurlas, kiel klake grincigas la dentojn ! Ĉu ne estas terure ? Kaj nun, nun la monstro ĵetas la knabinon en la puton. Restu ĉe mi, vi ne povas helpi ! La knabino provas saviĝi. Sed vi ja vidas kiel la bestaĉo ĉiam denove puŝas la kompatindan en la akvon. Tuj ŝi dronos. Kaj tiam mi devos forporti ŝin. La homoj diros, ke mi, ke la kruela kaj senkompata faris tion. Sed ja ne estas mia kulpo. Tremas eĉ miaj ostoj, se mi devas vidi kiel homo mortas antaŭ ol tiu vere ekvivas. Kion fari ? Mi estas senpotenca kiel vi en tiu afero. Sed pardonu, nun mi devos forporti ŝin.

Kiam ni revidos nin ?, vi demandas.

Kiel mi sciu ?

Iam, iam certe.

HAGEN HIRTE

\*\*\*\*\*

Lina Gabrielli :

## LA MILUNUA NOVELO LAŬ DEKAMERONO

Longa vojaĝo de Svislando al Francujo, por atingi vilaĝon, kie loĝas komuna amiko. Longa vojaĝo sub forte frapanta suno. Malgraŭ ĉio ili estas kontentaj kaj kiam survoje ekvidas lagon, la lagon de Ĝenevo, ili bremsas la aŭtomobilon, prenas la bankostumojn kaj marŝas laŭlonge de la mallarĝa vojeto serpentumanta tra la seka herbo, por atingi la bordon de la lago. Plezure ili sin mergas en la varmetan klaran akvon kaj laŭte ridas. Poste, denove ili marŝas ĝis la aŭtomobilo por daŭrigi la vojaĝon. En Ĝenevo ili tagmanĝas ekster restoracio kaj pli viglaj transiras la landlimon, por esti sur la franca teritorio. La suno ĉiam pli varmigas. Venas jam vespera horo

kaj necesiĝas hotelo por tranokto. Ĉar estas somera sezono, pro la timo trovi nenion alian, ili akceptas ĉambron por tri personoj. Ili estas polo, francino kaj italino, kiuj partoprenis la Lucernan Kongreson, kaj ridas pro la hazarda kombinendo. "La granda lito estos la internacia fundamento kaj ankaŭ pruvo de nia internacieco", diras la polo. "Ni poste verkos la milunuan novelon laŭ Dekamerono". La italino alproksimiĝas al la larĝa fenestro, ĉe kiu staras vazo kun rozkoloraj diantoj kaj rigardas la ĵus elirantajn geamikojn en la ĝardenon. Nun ŝi, ĝis nun iom malgaja, sentas sin pli bone. En tiu gaja etoso ŝi montriĝas iom aŭdaca. Ŝiaj kunuloj diras : "Ha, ŝi progresis de hodiaŭ matene!". La francino estas pli libera en siaj movoj: tute senĝene senvestigas sin kun gestoj spontanaj kaj naturaj. Same agas la polo. Amuzas ĉiujn la projekto dormi triope en la sama lito, li en la mezo, la francino dekstre, la italino maldekstre. Post abunda vespermanĝo kaj pieda promenado sur la monteto de la vilaĝo, kie ili parolas pri sia por-esperanta laborado, ili eniras la dormoĉambron, malfermas la fenestron kaj kuŝiĝas sur la lito. Susuras la vento ekstere, balanciĝas la branĉoj de la arboj, silentiĝas ĉio. La italino ĝojas pro la nedirita saluto "Bonan nokton", ĉar tiu saluto signifas, ke kurteno ne falis inter ili, ke la dialogo povas kontinui. Kaj ŝi aŭskultas la susuron de la venteto tra la branĉoj de la arboj. Poste ŝi emas dormi, pro tio sin turnas sur la dekstran flankon. La viro en la mezo, pro pli peza korpo, formas en la lito kuveton kaj la italino penas ne gliti sur lin, kvankam, instinkte, ŝi ŝatus tion, ĉar ŝi bezonas delikatan homan proksimecon, kiu certigas al ŝi malfremdecon. Tio konfirmus la belegajn vortojn, kiujn li ofte diris al ŝi. Ho jes, ŝi volus konfirmon, ke ŝi ne estas fremda, ke ŝi estas familieca ne fora homo, kiu baldaŭ reatingos sian propran landon. Fakte, baldaŭ ĉiu el la triopa grupo disiĝos kaj iros en tri diversajn partojn de Eŭropo, malproksimen unu de la alia, kun dubo pri la revido kaj pri la ripetiĝo de komunaj travivaĵoj. Ŝi, tre sentema, ĝojus je la certeco, ke ŝi ne estas iu ajn. Ŝi povus finfine ĝui la nunon sen nostalgio por la pasinto, sen angoro por la estonto. Subite aŭdiĝis la francino diranta : "Mi penas ne fali sur vin, samideano, ĉar la lito estas tiel aranĝita, ke tio povas okazi". "Ankaŭ mi penas ne gliti sur lin", aldonas la italino, dum la vortoj de la francino liberigas la animon de la timo, ke li povas supozi, ke tio ĉi okazas intence. Jen, nun se pli da proksimeco okazos, ne bezoniĝos klarigo. Kaj se ia kareso venos, tiu ĉi kareso montros simpatian. Ankaŭ "La Dekamerono" havas delikatajn noblajn travivaĵojn ! Kial ne la milunua novelo ?

## KAJ RIDETO

Nokto neniam tute mallumas  
Ĉiam estas (ĉar tion mi diras  
Ĉar tion mi asertas)  
Fine de l' ĉagreno malfermita fenestro  
Lumigita fenestro  
Ĉiam estas maldorma revo  
Plenumenda deziro kvietigenda malsato  
Donacema koro  
Etendita mano malfermita mano  
Atentemaj okuloj  
Unu vivo : la vivo duope ĝuenda.

Paul Eluard (1895-1952)  
el la franca : Daniel Luez

## EN MAJO mil naŭcent okdek ses

(poemo okaze de la 75-jara jubileo  
de la NLa L.E.A.)

Printempo nova, nov-melodi'  
Kiel knaba fajfo eksonas ĝi  
La vintro fuĝis kaj kun plezur'  
Pro nova vivo en la natur'

Jarmulto pasis, ni nombris ĝin  
kaj jaroj lasis, jam sepdek kvin  
Post fest' kaj danco pro la memor'  
Laboro sekvos kun la fervor'

Sed nun futuron rigardu ni !  
Pri la estonto ja fidis vi.  
Ni fosu sulkon la nian, ĉar  
por semi semon en nova jar'

En ĉi kongreso memoru vi  
la fondon de la federaci'  
Nun asocio en ĝia nom'  
en harmonio kun ĉiu hom'

Per nova sento kaj energi'  
La maja vento, nin puŝas ĝi.  
En periodo plej nova nun  
pli varme brilos la maja sun'


El historio forgesu ni  
mal-amikaĵojn pro la envi'  
Sed la amikoj kun foja plor'  
ke ili restu en nia kor'

Per sepa strofo de ĉi poem'  
nun laŭte sonas pri nova tem':  
Sur nova vojo al nia cel'  
Jen idealo sub verda stel'.

Printempo nova, nov-melodi'  
Per knaba fajfo eksonu ĝi.

[19860314 (3K12) *iea iu*]

Ĉi poemon mia edzino deklamis en la 3a de majo en jubilea kunveno de F.L.E.  
en Hago. *iea iu*.



Nia dokumento :

**DISSENDLETERO de Wim Koolhoven**  
militservrifuzanto kaj politika malliberulo

Deklaro de la 5a de novembro 1985

En la printempo de 1980 mi faris mian kredkonfeson. Tio ne nur signifas, ke nun mi estas praktikanta ekleziano, sed pli ke mi dediĉis min al Kristo. Mi estas kristano, tio estas sekvanto de Jesuo, la Nazaretano. Ekde la tiama eldiro mi demandas min kion tio signifas, ankaŭ konkrete en la agoj kaj faroj Ĉu tio signifas vivi honeste kaj virte, kaj ĉiam esti obeema ? Nu, veturi pli rapide ol 100 sur la aŭtoŝoseo kaj iomete eviti la imposton ne gravas. Esti kristano signifas por la plej multe da civitanoj niaj, ke ili estas plenkonformigitaj kaj ege obeemaj, kaj, ho jes, dimanĉe iras preĝejen. "Gott mit uns" sur la germanaj soldatrimenoj, "God zij met ons" sur la guldenrando. La preĝo je la fino de reĝa parolado. Tio estas la dio de la potenculoj, la riĉuloj, la dio de la rajto de la plej forta. Tio estas la dio, kiu diras ke ĉio estas bona, kia ĝi nun estas. Tiu ne estas mia Dio !

Mi kredas je Dio, kiu elirigas popolon de sklavoj kaj malriĉuloj el sklavejo, tra la dezerto jes, sed al lando de lakto kaj mielo. Mi kredas je Dio, kiu vidas la vidvinojn, orfojn kaj fremdulojn. Ne ulo, kiu malaitigas la subtenpagojn kaj forsendas Tamilojn. De Jesuo, la Nazaretano, ni scias ke reguloj estas favoraj al la homoj kaj ke la homoj ne estas kreitaj por plenumi la regulojn. Leĝoj de Medujo kaj Persujo nur subpremas la homon. Amo estas pli forta ol malamo, tial oni devas ami la malamikon, tiam oni mortigas la malamikecon kaj gajnas amikon. Tiamaniere Jesuo interrilatis malkaŝe kaj honeste kun ĉiu, la riĉuloj kaj potenculoj suspektis lin pro tio. Li interrilatis kun putinoj (kiujn ili mem vizitas nur kaŝe), impostistoj (kiuj prostituis sin malkaŝe al la okupantoj), Samarianoj (iliaj malamikoj malnovaj), sammaniere kiel li interrilatis kun ĉiu alia, unu ne estas pli valora ol alia.

En la komenco de nia epoko la unuaj kristanoj klopodis do sekvi Jesuon. Ili havis ĉion komune, dividis ankaŭ inter fremduloj kaj ne adorkliniĝis antaŭ la imperiestro. Estis revolucia, ŝtatdanĝera organizo. Ne senkiale ili persekut-iĝis sange. Post kiam ekleziestroj estis falintaj por la potenco, soldatoj permesiĝis al la sankta manĝo. Post la "konvertiĝo" de imperiestro Konstantino



militrifuzantoj malpermesigis. La oficiala eklezio iĝis parto de la monduma potencilito. Tamen ĉie kaj ĉiam estas malgrandaj grupoj, kiuj kontraŭbatalas tiun ĉi sadukeismon kaj fariseismon kaj defendas la interesojn popolajn. En la Mezepoko ĉi tiujn herezulojn oni forbruligis sur la brulŝtiparo. Ankaŭ ankoraŭ nun estas tute normale, ke oni estas 100% lojala, obeema, virta regnato, ke oni ne kritikemas ekster la eklezimuroj kaj ke ne videblas en la ĉiutaga vivo ke oni estas ekleziano. Ĉu la socio estas tiel ideala ? Ĉu ni jam vivas en regno de Dio ? Ĉu ne plu pereas homoj de malsato ? Ĉu homoj ne plu venenigigas de danĝeraj ĥemiaĵoj ? Ĉu homoj ne plu torturigas ? Ĉu homoj ne plu en militoj masakrigas ? Ĉu ni ne preparas la neniigon de la kreaĵaro ? Ĉu ne plu la malamo regas ĉi tiun mondon ? Kaj la timo ?

Feliĉe pligrandiĝas la homoj, kristanoj kaj homoj, kiuj ne nomas sin tiel, kiuj ekrezistas. Kiuj batalas kontraŭ ĥemiaj entreprenoj, kiuj nekontroleble forfluigas restaĵojn. Kiuj batalas kontraŭ armilliveroj al militistaj diktaturoj. Kiuj batalas kontraŭ malsato, malfjusteco, subpremado, ekspluatado kaj perforto. Kiuj batalas kontraŭ la neniigo de ĉi tiu kreaĵaro. Kiuj ne kredas al la ĉiopovo de mono kaj perforto.

Nun mi ricevis alvokon por prezenti min je mardo la 5a de novembro 1985 ĉe la Chassékazerno en Breda. Mi tie ricevis instruon por la kampartilero por doni pafapogon de pafbuŝoj (haŭbizoj kaj kanonoj). Mi ne iras kaj ne iros.

Mi ne kredas al perforto. Perforto ne povas protekti nian socion, kontraŭe detruu. Mi ne volas lerni por mortigi. Mi ne volas lerni kiel roboto senvole ordonojn realigi. Mi sentas min libera kaj volas do mem decidi kiel mi agas kaj kion mi faras. Mi ne volas funkcii en organizo, kiu mokinsultas kaj subpremas homojn, kiuj estas aliaj (kolorituloj, pripensantoj, virinoj kaj pederaŝtiuloj). Mi ne volas plenumi la postulojn por esti vera viro : forta, fortika, havi amikindon kiu emas fari ĉion, multe drinki kaj precipe sin estimi pli supera ol aliaj.

Per tuta rifuzado, mi atakas ne nur la armeon, sed ankaŭ, aŭtomate, la socion kaj civilizon, kiu produktis ĉi ĉion. Ne nur produktis niajn armilliverojn al Irano, Argentino, Sudafriko, Ĉilio ktp aŭ nian koncernecon ĉe NATO, per kio ni kunkulpas pri la hodiaŭa kaj eventuala estonteca definitiva detruo de la tero. Sed multe pli ke ni, kiel riĉa Okcidento, ke ni pensas esti elektita popolo dia, ke ni disponas pri ĉiuj krudmaterialoj kaj laborpotenco ĉie ajn en la mondo, ke ni opinias esti terestroj. Ĉi tiun potencon ni uzas nur por nia propra feliĉo kaj gloro, malgraŭ ĉiaj aliaj konsekvencoj. Ĉu homoj pereas pro malsato, aŭ simple pro senatenteco, tute ne gravas al ni. Se ni nur gajnas pli da mono kaj konservas nian prosperon.

Preĝu al Dio kaj ĉio, kion vi bezonas, donaciĝos al vi. La birdoj de la ĉielo ne semas, nek rikoltas, nek kolektas en grenejoj. Rigardu la liliojn de la

kampo, ili ne laboras, nek ŝpinas, tamen ili estas pli belaj ol Salomono. Ne ĉi ĉio sufiĉas por ni, ni neniam kontentiĝos. Vi ne povas servi du sinjorojn, vi ne povas servi al Dio kaj al Mamono. Ĉar kie via trezoro estas, tie ankaŭ estos via koro. Adiaŭ ĉi tiun pereigan materialismon, kiu ĉion kaj ĉiun forvelkigas. Konvertu vin !

Ĉie sur la mondo estas homoj, kiuj konscias ke la vojo de armado estas sensenca kaj danĝera. Ĉie en la mondo estas tial homoj, kiuj konsekvence rifuzas ĉian kunlaboron kun ĉi tiu mortigado. Ekzemple ankaŭ en Orient-Berlino estas 5 knaboj, kiuj ankaŭ estus devintaj alveni je la 5a de novembro kaj ne iras. Ĉie sur la mondo ĉi tiuj homoj ŝetiĝas en malliberejon kaj kriminaliĝas. Ĉie sur la mondo ĉi tiuj homoj scias ke ili sentas sin ligitaj trans kaj malgraŭ ĉiuj limoj kaj konfidas plenmondan socion.

#### Okazintaĵoj

Dum la vespero je ĵaŭdo la 30a de januaro 1986 la armeopolicio arestis min. Ili kunportis min al la militistmalliberejo en Nieuwersluis (inter Utrecht kaj Amsterdam). La sekvintantagon mi rifuzis surmeti militistajn vestaĵojn, tio estas ege granda krimo. Je lundo mi vidis por la unua fojo la militan tribunalon, tie mi ricevis miajn unuajn tridek tagojn. Mia procezo estos je la 22a de aprilo, la rezulton mi jam scias : 12 monatojn en malliberejo. Ekde merkredo la 5a de februaro mi estas en civila malliberejo.

#### Dissendleteroj

Ekzistas ankaŭ nederlandlingva dissendletero, kun pli da artikoloj, eĉ el ĵurnaloj. Se vi ŝatus ricevi tiun revuon, skribu al : Steungroep Wim, Vrijhof 033, Postbus 217, NL 7500 AE Enschede, bonvolu skribi nederlandlingve !

La plej granda parto de ĉi tiu dissendletero unua estas mia deklaro de la 5a de novembro. Roel kaj Marwine korektis mian esperantan tradukon, multe dankon. Eble mi faros pli da esperantlingvaj dissendleteroj, mi vidos.

#### Aliaj rifuzantoj

En Nederlando nun estas, laŭ mia informo, ok rifuzantoj en malliberejo. Jare 3000 personoj uzas la leĝan eblecon de anstataŭa servo por ne eniri la militservon.

#### Reagoj

Se vi volas reagi, vi povas skribi min. Se tre multe da homoj skribos, mi ne povos reskribi al ĉiu persone, tiam mi faros dissendleteron.

Wim Koolhoven, politika malliberulo

Pacon, Wim.

p/a HvB, Markstraat 7

Almelo, Nederlando.

Noto de la red. : Wim estas abonanto de "Laŭte!".

"Laŭte!" ?... Rabie antikomunista...  
aŭ : **STALINISMO NE MORTIS**

Ke en la t.n. popoldemokratioj la E-gazetaro devas konformiĝi al la tie reganta politika tendenco, kiu pretendas reprezenti la interesojn de la tuta popolo - inkluzive de la esperantista popolo - tion mi volonte komprenas. Sed ke en aliaj landoj, kie povas sin esprimi diversaj vidpunktoj pli bone spegulantaj la diversajn tendencojn ekzistantajn en la esperantistaro, la E-redaktantoj mem cenzuru la E-gazetaron por konformigi ĝin al la ŝanĝigemaj deziroj de politiko diktata de Moskvo, tion mi opinias almenaŭ stranga, kaj certe danĝera por la estonteco de Esperanto mem.

Kio estus fariĝinta la E-movado, se, ekzemple, la stalinismo en la antaŭmilita Sovetio kaj la hitlerismo en samepoka Germanio, krom likvidi la E-movadon en tiuj landoj, estus sukcesintaj silentigi la E-istojn en la ceteraj mondregionoj ? La nunaj redaktantoj de "La Internaciisto" - organo de Kolektivo Esperantista Komunista (KEK) - kaj naturaj heredintoj de la komunista E-istaro likvidita de Stalin kaj Hitler, ja ne povus hodiaŭ uzi E-on por diskonigi sian ideologion, kiu cetere estas same pridiskutebla kaj kritikebla kiel ĉiu ajn alia, tiel per esperanto kiel per naciaj lingvoj. Kiel oni nomas idearon, kiun oni ne rajtas pridiskuti ? Dogmo, ĉu ne ?

Kial tiu ĉi longa enkonduko ? Jen. Ne plaĉis al la ĵus menciita K.E.K., ke "Laŭte!" publikigis en sia januara n-ro la tekston "Nia angorplena socio" de la ĉeĥa disidento Milan Šimečka, tradukitan de Aldo Revel. Tio ne estas miriga. Same kiel ne mirigas la fakto, ke la anonimulo de "Internaciisto" vidas en tio kvazaŭan komploton. Mi citas : "...sed en tiu kazo temas pri akordigita komploto inter la elkuirita antikomunista Lapenna kaj kliko da SAT-anoj" kaj "...provinca organo de SAT 'Laŭte!' faras orgiojn el tiu temo superante eĉ la skribmanieron de Julius Streicher en 'Stürmer' konata antijuda gazeto en la Tria Regno..."

Sed fulmotondro! Kion do celas la "eldonistoj" de "Laŭte!" ? La anonimulo de "Internaciisto" senhezite skribas : "...La franca esperantisto leganta tiun teruran tekston (de Šimečka, red.) opinias legi kriminalan romanon kaj skuite pri tiom da teroro en komunisma lando decidas baloti ne la komunistojn - sed la liston kun Le Pen. Do, la longa artikolo plenumis la intencojn de la eldonistoj..."

Tute logike, la anonimulo tiras la konkludon : "El tiu vidpunkto oni devas kompreni, ke ne eblas kongresi por SAT en Pollando, tiel longe daŭras la kampanjo antisocialisma." Kaj hipokrite : "Al kiu utilas laste tiu malsimpatia sinteno ? Al Esperanto ? Tute ne!"

Nu, se mi bone komprenis, por utili al E-o, la legantoj de "Laŭte!" (la "eldonistoj" ja publikigas tion ricevitan de legantoj kaj tion la anonimulo nomas "burga demokratio") devas al si mem malpermesi uzi E-on por la temoj, kiuj ne plaĉas al "Internaciisto". Sed, ĉar (feliĉe) ekzistas en la legantaro de L! granda diverseco de opinioj pri multaj temoj, kial ne tutsimple malpermesu iu ajn al iu ajn - nome de netuŝeblaj dogmoj - sin esprimi pri io ajn ? La nova formulo de "Laŭte!" anstataŭigus la titolon per "Mallaŭte..." kaj ĉiuj paĝoj estus blankaj ! Kaj en kunvenoj kaj kongresoj same mallaŭte, de buŝo al orelo, la E-istoj povus interŝanĝi strikte memcenzuritajn banalaĵojn, tute same kiel kiam regis, antaŭ kelkaj jardekoj, la jam prialuditaj Hitler kaj Stalin. Kaj tiel prosperus Esperanto, ĉu ne ?

Koncerne la situacion en Ĉeĥoslovakio, kial kredi sendiskute, ke pli pravas la nuna registaro ol tiu de Svoboda/Dubček en 1968 ? Kiu eraras aŭ eraris ? Kaj ĉu eraris aŭ ne la okcidenteŭropaj komunistaj partioj, kiuj okaze de la tiama "vizito" de tankoj al Prago, esprimis mallaŭdon al la intervenintoj ? Se gvidantoj de komunista partio neniam povus erari, tio estus bonŝanco por la popoloj loĝantaj en la paradizoj nomataj popoldemokratioj. Sed kiam tiuj KP-gvidantoj malsame opinias inter si, kiu(j) pravas ?? Ĉu Ĥruĉov aŭ Stalin, ĉu Maŭ aŭ Breĝnev, ĉu Tito aŭ Hodja ? Kiu povas esti certa, ke la nuna gvidanto politikumas laŭ la ĝusta linio ? Kiu fiksas la linion ? Kaj laŭ kiu evangelio ? Ĉu la skriboj de Marks (de la juna aŭ de la maljuna Marks ?) ? Ĉu tiuj de Lenin, aŭ ĉu de Stalin ?

Politika analfabeto loĝanta ekzemple en Francio povas legi ĉion kaj ĉion kompari kaj fariĝi iom malpli analfabeta. Homo dresita laŭ ununura dogmeca "literaturo" povas nur bleki kontraŭ ĉio nekonforma al la dogmo. Li ŝanĝos "sian" vidpunkton nur kiam aliuloj decidis lialoke, ke venis la tempo ŝanĝi la kredon.

Mi timas, ke la plej "rabia antikomunismo" fontas ja el iaj "komunistoj" mem, kaj ke komprenis tion la "burga demokratio", kiu mallice permesas al ili sin esprimi libere en okcidentaj landoj.

Sed ĉio ĉi-supra estas nur mia opinio de ordinara abonanto de L!.

Kribo

El letero el aŭstralia leganto :

"...Plezure mi regule legas **Laŭte!**. Estas interese vidi diversajn vidpunktojn pri nuntempaj aferoj en unu gazeto. Interesaj artikoloj preskaŭ ĉiam rilatas al la politiko ; tio estas neevitebla. **Laŭte!** estas interesa pro tio, ke ĝi havas politikajn tendencojn. Bedaŭrinde, ni devas miksi nin en la politiko pro tio ke la politikistoj kaj registaroj ne lasas nin en paco. Ili minacas nian liberon (nenecesaj, burokrataj leĝoj, milit-servo), atakas nian vivnivelon (ĉiam cedas al postuloj de kapitalismo), endanĝerigas nian vivon (ŝajnas, ke ili ne volas pacon). Sekve estas multaj "kontraŭ-artikoloj" en **Laŭte!**. Mia opinie, bona afero. Ekzemple, leginte artikolojn kontraŭ nukleaj armiloj, oni povas kompari ilin, diskuti ilin, eble ŝanĝi sian propran ideon. Novaj ideoj ja naskiĝas el tia komparo kaj argumentado, kaj povas konduki al renoviĝo. Jen la grava rolo de **Laŭte!**.

La kamarado, kiu kontraŭas la artikolojn de la "anti-uloj", kredas - kaj mi citas : "ke la homoj povas interkonsenti kaj interkompreni unu la alian". Bedaŭrinde, tio ne eblas. Ĉu la sklavo povas konsenti kun la ekspluatanto ? Ĉu la laboristo kaj la estro ĉiam same opinias ? Ĉu la pacamanto povas konsenti kun la militemulo ? Ĉu ni sufiĉe komprenas sociajn problemojn kiel rasismon, seksismon, virinajn rajtojn ? ktp. Ne. Ni neniam vivos en paca socio. Bedaŭrinde ne. La batalo estas parto de la vivo. **Laŭte!** foje respegulas tion tre milde..."

R. Smeets

El letero de brazila leganto :

"...Mi intencas menciigi artikolon de nia kamarado Koffi el Togo kaj mi devas konsenti kun li. Delonge mia frato korespondas portugale kun Angolano el Luando. (Mia frato diskonigis al li nian mirindan L.I.). Kaj tiu Angolano skribis, petante paron da ŝuoj por kuri, klarigante ke en Angolo la sportuloj ne havas la necesajn sportŝuojn... Do mia frato respondis, ke li ne povus sendi tion, ĉar li mem uzas malnovajn ŝuojn por kuri kaj ke la nuna brazilia situacio ne estas bona por sendado (la pakaĵo povus malaperi) kaj ankaŭ ke li nun estas senlaborulo, kio kutimas en Brazilio. Sed mia frato parolis kun mi pri la afero kaj ni eniris en la tempon de Historio kaj farinte grandan retrospektivon de la angola historio kaj ankaŭ de la tuta historio de nia suferanta Afriko, pri iu afero ni ambau interkonsentis, nome ke Afriko ĉiam estis, estas (estos?) eks-

pluatata de ĉiuj landoj (blankuloj?). Do kion ni faris ? Mi estas blankulo (mi ne estas certa pri tio...) kaj kiam nia kamarado idealisto Zamenhof kreis E-on, li parolis pri komprenemo, neekspluatemo, neceso unuigi tutmondajn popolojn sen baroj, sen limoj, sen diskriminacio (Ni devas ĉiam memori pri la infero Sudafriko). Ni alvenis konklude al sendado inter du poŝtkartoj de du dolaroj kaj kelkaj francaj frankoj, kaj, se tio povus utili al li, kelkaj antikvaj kruzeiroj (nun kruzadoj). Ni kredas, ke nia Angolana amiko ĝojas pro la donaco. Kompreneble ni ne donis por aĉeti "LE COQ SPORTIF" sed almenaŭ por aĉeti sovetajn ŝuojn aŭ iam aĉeti libron el UEA kaj aboni **Laŭte!** kaj iam trovi riĉulon, kiu povas helpi niajn fratojn el Afriko, kiuj ankoraŭ tre suferas pro la imperialismo de Blankuloj. (Mi ne forgesas, ke mi estas blankulo kaj ankaŭ mi estas ekspluatata de blankuloj). Mi almenaŭ konsentas kun Koffi, ke oni devas ĉesi nomi Afrikanojn ekspluatemuloj. Ĉi tiuj blankuloj ne sentas, ke la komforto ekzistanta nuntempe en riĉaj landoj fontas el la sufero de aliaj popoloj. (Ne miskomprenu mian frazon, mi ne deziras malestimi la laborulojn el riĉaj landoj...). Esperanto estas paco, amo, komprenemo, amikeco..."

Aleksandro.

### PRI SENĈAPELAJ LITEROJ

Evoluo ne estas reformo. Anstataŭigi **j** per **y** estas necesa ŝanĝo. Anstataŭigi **ĵ** per **j** estas ja ne akceptebla reformo. Male, se oni simple nur anstataŭigas **ĝ** per **y** estas nur evoluo, tio estas progreso bazita sur gravaj motivoj : uzado de la plej multaj el la ekzistantaj tajpiloj kaj preskarakteroj ; internacieco : hispane : ley = leĝo, rey = reĝo, angle : pray = preĝi... ktp.

Konsiderante ke multaj literoj havas diversajn formojn :  
 $a = \alpha, f = \mathfrak{f}, r = \mathfrak{r}, z = \mathfrak{z} \dots$  oni povas facile akcepti, ke :  
 $\ddot{u} = w, \mathfrak{g} = y, \mathfrak{e} = x, \mathfrak{e} = q.$   
(kompreneble **ĵ** kaj **ĥ** multe malpli oftaj devas esti traktataj aparte, se necese). La solvo per fabrikado de specialaj maŝinoj estas utopio. La solvo per uzo de la franca klavaro estas falsa solvo. Francaj maŝinoj estas malmultaj en la mondo kaj nur la minusklaj literoj povas ricevi la  $\mathfrak{a}$ , la majuskloj ricevas ĝin tiel malbone, ke necesas korekti mane kaj forgeso eblas (vidu L! n°65 p.55, l. -2 kaj -7). Por ke Esperanto povu vivi kiel interlingvo, necesas ke ne nur Esperantistoj uzu ĝin, sed ankaŭ duon-esperantistoj, eĉ ne-esperant-

istoj kaj estas grave faciligi tion, proponante simplan kaj efikan solvon al la problemo de la supersignoj.

### ZAMENHOFA aŭ REYNOLDSA ESPERANTO ?

Laŭ multaj esperantistoj la nuna maniero skribi Esperanton estas pure Zamenhofa kaj iu provo simpligi aŭ progresigi, aŭ simple evoluigi pro praktikaj motivoj estas kontraŭzamenhofaj aŭ nov-idistaj reformoj.

Nu, post la kritikoj de la fama lingvisto Reynolds pri la "infanaj kunmetaĵoj" de Esperanto, la E-istoj vigle ŝanĝis la vortaron, enkondukante "memstarajn vortojn", dum Zamenhof ofte diris, ke li preferas siajn "logikajn kunmetaĵojn". Fakte, Esperanta teksto kun multaj "memstaraj" estas pli Reynolds-a ol Zamenhofa malgraŭ siaj supersignitaj literoj kaj ne multe helpas al la disvastiĝo de Esperanto. Facila Esperanto, kun la Zamenhofaj kunmetaĵoj pli facile disvastiĝus kaj eĉ pli facile sen supersignoj !

P.M.G.



Cirklokvadrato...

### PRO KELKAJ DEKONOJ DE MILONO

O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O

La legado de L!-n-ro 66 certe ebligis al la legantaro ĝuste apreci la amuzan fantaziecon de la afablaj asertoj de K-do Valo. Tiu fantazieco des pli reliefigas, kiam temas pri ciferoj. Ekzemple pri  $\sqrt{2}$ , kiun mi neglektis, ĉar ĝi nerekte rilatis al la cirklokvadrato. Sed, ĉar K-do PMG kaj Valo ne interkonsentis pri la temo, mi ekscivolis pri ĝi. En L!-n-ro 64 K-do Valo asertis, ke  $\sqrt{2} = 1,41414$ , kaj ke  $\sqrt{2} / 2 = 0,70707...$  Al tio K-do PMG rebatis en L!-n-ro 65, ke  $\sqrt{2}$  kaj  $\sqrt{2} / 2$  ne estas periodaj ; ke  $\sqrt{2} = 1,414213562$  kaj  $\sqrt{2} / 2 = 0,70716781$ . Responde, K-do Valo en L!-n-ro 66 konsentas, ke li eraris, kaj ke K-do PMG pravas. Tio instigis min, mem kalkuli la kvadratan radikon de 2, kaj konstatis kun surprizo, ke tiu radiko ne estas 1,41414 nek 1,414213562 sed 1,416581, kaj, kompreneble, ke  $\sqrt{2} / 2 = 0,7082905$ . Ĉu mi ne scias ekstrakti kvadratan radikon ? (\*) Ĉu ĉi tiu mi ne komprenis ? Ĉu K-do PMG kaj Valo konfuzis du malsamajn aferojn ? Al tiuj demandoj la sekvo mem respondos. K-do PMG surpriziĝis pro tia absurdaĵo, ke 1,414141 povas esti egala al 140/99. Tamen K-do Valo pravis, dirante tion, la kvociento de 140 per 99 efektive estas 1,414141... senfine, nur 140 kaj 99 estas neĝustaj. Sed kion fakte reprezentas 140/99 ? Pri tio K-do PMG kaj Valo ne klarigas. Se mi ĝuste komprenis tion, kion ili ne diris, 140 estas la diagonalo de la hipotenuza kvadrato, kies latero estas 99. Tiu latero mem estas la hipotenuzo de la ortangulo, kies lateroj estas 7. Mi diris en L!-n-ro 66, ke la diagonalo de tiu kvadrato estas 14,015575 (erare mi tajpis 14,05575), kaj, konsekvence, ke la rilato kun ĝia latero (hipotenuzo de la ortangulo) estas  $14,015575 : 9,905 = 1,415$ . Mi aldonis, ke per tiu rilato eblas rekte kalkuli la diagonalon de ĉiu kvadrato per la multipliko de la latero per ĝi. Tie necesas substreki la neprecizecon de la procedo kutime uzata por ekstrakti kvadratan radikon. Tiu procedo fakte estas preciza nur por la nombroj multiplikitaj per si mem. Pro tio la rilato 99 (aŭ 9,9) radiko de 98, sumo de  $(7 \times 7) + (7 \times 7)$ , areoj de ambaŭ lateroj de la hipotenuzo, ne estas ĝusta. Ĝi estas tro granda, kvankam ĝi lasas reziduon, kiu ebligas kalkuli ĝis 9,905. Tion pravas la multipliko de 9,9 per 9,9, kies produkto estas 98,01. Laŭ tiu rilato la diagonalo de la hipotenuza kvadrato estas  $9,9 \times 9,9 / 7 = 14,0014285$ , kaj la rilato inter la diagonalo kaj la latero estas  $14,0014285 : 9,9 = 1,4142(857)$  kun reziduo. La sinsekvaj multiplikado kaj dividado nuligan la ioman troon de 9,9 sed, se oni reduktas 14,0014285 al nur 140, la ioma troo de 99 ne plu estas nuligata, kaj la rezulto kompreneble estas 1,414141... senfine. Tion ne demonstris K-do PMG kaj Valo, kiuj, konstatende, ne nete distingis inter siaj abstraktaĵoj, kaj atribuis al  $\sqrt{2}$  la rezultojn de la rilato inter la diagonalo kaj la latero de la hipotenuza kvadrato.

(\*) Noto de la kompatinda tajpanto : mia propra kalkulileto konsentas kun K-do PMG, sed ne kun K-do B.G.D. Eble temas pri sammarka aparato...

La ĝusta kvadrata radiko de 98 estas 9,89959 rondigita al 9,8996. Eblas ricevi ĝin per la uzado de la rilatoj 1,273642 kaj 7/7,9. Mi lasas al la interresatoj la plezuron trovi, kiel tio eblas. "La tuta homa scienco estas ja en la arkivo", do, per konsultado de la arkivo, nepre eblas retrovi tiun procedon.

Sed, ĉar la troo de 9,9 sin nuligas per sinsekvaj multiplikado kaj dividado, do eblas kalkuli la rilaton inter la diagonalo kaj la latero de kvadrato, rekte dividante la hipotenuzon (diagonalo) per la latero 7, kaj tiel facile establi la ĉi-sekvan tabelon "empirian", por alveni al la ĝusta rilato inter la diagonalo kaj la latero de la hipotenuza kvadrato :

9,9000 : 7 = 1,4142 kun reziduo 6.	Diagonalo kun lat. 14 =	19,8000
9,8999 : 7 = 1,4142	5	19,7998
9,8998 : 7 = 1,4142	4	19,7996
9,8997 : 7 = 1,4142	3	19,7994
9,8996 : 7 = 1,4142	2	19,7992
9,8995 : 7 = 1,4142	1	19,7990
9,8994 : 7 = 1,4142	0	19,7988
9,9050 : 7 = 1,415	0	19,81

La plej ĝustaj rilatoj estas tiuj, kiuj ne lasas reziduon, do, ĉi tie, 9,8994/7 kaj 9,905/7. La produto de la kvadratingo de 9,8994 estas 97,99812036, kaj tiu de 9,905 estas 98,109025. Do, la produto de 9,8994 pli proksimas al 98, kaj la rilato 9,8994/7 devus normale esti konsiderata la ĝusta rilato inter la diagonalo kaj la latero de la kvadrato. Sed la celo ne estas la kongruenco de la kvadratingo de 9,8994 kun la areo de la kvadrato, sed, precipe, tiu de 9,8994 kun la longeco de la "efektiva" diagonalo. Tiurilate, 9,8994 aspektas ne sufiĉa, negativa. La diagonalo estas ja "fortolinio" naskita de simultana kvarflanka kunpremado de la du cirklomedianoj, kiu strebas al "teoria longeco", kio implicas streĉecon fronte al la rezisto de la cirkonferenco al rektiĝo, kaj, konsekvence, aldonas iom pli da longeco al la "efektiva" diagonalo.

Temas fakte pri ekvilibriĝo de fortoj, pri kies ekzisto la kunaranĝo de geometriaj linioj nomita cirklokvadrato, estas nur la demonstra simbolo. La "efektiva" diagonalo necese konsistas el plilongiĝo de la diametro + latentata streĉeco, aŭ fiksita energio, naskita de la ekstera kvarflanka kunpremado. La rilato 9,905/7, apriore iom tro granda, sed fontanta el la aritmetika kaj geometria solvoj de la cirklokvadrato, pli pozitive respondas tiun postulaton pri la diagonalo.

Ni ja konstatis en antaŭaj artikoloj, ke la diagonalo de kvadrato kun latero 14 konsistas el 15,8 (diametro de la responda cirklo) + 3,6 (kvar mallongiĝoj de la medianoj) + 0,41 (duono de la longodiferenco inter la efektiva kaj la teoria cirkonferencoj, t.e. : 49,62 - 48,80 = 0,82) = 15,8 + 3,6 + 0,41 = 19,81. Do, dum ne estos demonstrita per tre zorga mezurado, ke la "efektiva" diagonalo de la kvadrato kun latero 14 ne estas 19,81 sed 19,7988, mi opinias, ke tiu rilato estas la ĝusta.

Cetere, inter la rilatoj 1,4142 kaj 1,415 estas diferenco de nur 8 dekonoj de milono, kaj estas facile kalkuli per ambaŭ kaj dividi la sumon de la produktoj per 2 por ricevi mezan dimension, t.e. : 19,8044. Persone mi ne konsentas pri tiu procedo, sed tie necesas rimarkigi, ke laŭ la procedo proponita de mi en L!-n-ro 66, t.e. : ke multiplikante la diametron de la responda cirklo per 7,9/7, kaj aldonante okonon de la diametro al la rezulto, eblas ricevi : 15,8 x 7,9/7 = 17,831 + 1,975 = 19,806. Do, ĉu tiu procedo estas la pli taŭga por kalkuli diagonalon ? Pri tio fakte nur zorga mezurado per tre precizaj iloj povas findecidi.

Finfine, la longecoj de la diagonaloj de kvadrato kun latero 14 povas esti nur 19,7988, 19,8044, 19,806 kaj 19,81. La tuta diferenco inter la ekstremaj lokiĝas fakte en "forketo" ampleksanta 11,2 dekonoj de milono, t.e. : proksimume unu triono de la dikeco de cigareda paperfolio. Do, praktike neglektebla.

Tamen, mi esperas, ke tiuj miaj propraj procedoj, kalkuloj kaj konkludoj eble plifaciligos la klopodojn de tiuj, kiuj zorgas pri mezurado de diagonaloj, kaj pri pli preciza ekstraktado de kvadrataj radikoj. Cetere, ĉiam eblas al ili sin turni al la "arkivo" de la Scienco, se ili tion preferas. Tion faris K-doj PMG kaj Valo. Nur necesas kompari la rezultojn kaj mem konkludi.

**B.G.D. el EYMET.**

## KVAZAŬA RESPONDO AL JAKELINO

En 1983 aperis en la revuo "Sciences et Avenir" (Sciencoj kaj Estonteco, speciala eldono n-ro 42) enketo pri "Dio kaj la Scienco". Pluraj scienculoj klarigis sian sintenon koncerne Dion, religion aŭ kredon en rilato kun la scienco. La granda "scianto", fama profesoro Pierre P. Grassé, Sciencakademiano, verkis artikolon, en kiu oni povas legi :

"Ateismo ne apartenas al tio homeca ; ĝi regresigas al la **Homo sapiens**, al la kondiĉo de la besto ; ĝi memvole forprenas de la homo plurajn el ties atributoj, inter kiuj la soifon kompreni, koni la Makrokosmon kaj - kio ne estas la malplejo - la kialon de la ekzistanta.

"Ĝi iras kontraŭ la naturan leĝon de la evolucio ; ĝi stultigas la Homon sed ne povas ĝin regresigi al ties animala stato por ĉiam perdita. La evolucio estas neinvertigebla.

"La vivanta mondo ne kompreniĝas, se la principo de kontinueco estas forĵetita aŭ ignorata. Koncerne la Kosmon, tiu ĉi estas nekomprenebla ekstere de la ekzisto de kreiva volo kaj ordiganta principo. Kaj tiu principo havas nomon : Dio."

Ĉu diri, ke la revuo ricevis lavangon da protestleteroj ?

Ni konstatas, ke, se la ateistoj atakas la kristanojn, la kristanoj, eĉ se grandaj profesoroj, agresive atakas la ate-

istojn ; se la ateistoj asertas sen scii, la kristanoj, eĉ se grandaj profesoroj, asertas sen pruvoj. Kiu povas aserti, ke la Kosmo ne povas ekzisti ekstere de kreiva volo ? La honesteco postulas, ke oni diru : "mi kredas". Kiel P-ro Grassé povas aserti, ke la ateistoj ne soifas kompreni, koni la Makrokosmon, ignoras la evolucian kaj regresigan la homon al besto ?

"Instruire sur l'Homme" (Instrui pri la Homo) de Jean Rostand. Eldonisto : "La Diane Française", Nice 1953. Tiu libro arigas multajn diversajn tekstojn de Jean Rostand kaj atestojn, rememorojn de tre diversaj scienculoj kaj eminentuloj.

P-ro Pierre P. Grassé (denove li!) post longa laŭdado al Jean Rostand, skribas :

"Sed kiu ne estus impresita de la kontrasto - kion mi diras? - de la opozicio inter tiu malhela koncepto pri la vivanta mondo kaj la sentiveco, kiu travidiĝas en libroj tiaj, kiaj "Vivo de la bufoj" kaj "Vivo de la libeloj" ?

"La aganta boneco, la grandega indulgo de Jean Rostand ja malbone alkonformiĝas al la pesimismo, kiun ellasas la "Pensoj de iu biologo". Mi kredas, ke tiun kontraŭdiron mi povas klarigi. Sub la fakta personeco de Jean Rostand, la artisto tute vibranta pro sentiveco malpermesas al si influi la scienculon, kiu sen malsevereco volas juĝi pri la realo kaj nur pri la realo."

Albert Vandel, profesoro en sciencfakultato :

"Kio ne estas unu el malplejaj allogoj de tiu tiel alligiteca homa naturo, estas rimarki la konstantajn paradoksojn naskitajn el la kolizio inter delikata sentiveco kaj tro rigora logiko : paradokso de nekredanto tute penetrata de kristana kompatemo ; de konvinkito praktikanta plej ekstreman toleron, de racionalisto animata de aganta simpatio, de pesimisto plena de entuziasmo."

Albert Delaunay, kuracisto :

"Per stranga mistero tiu homo, kiu timas la homaron kaj rifuzas kredi je dia helpo, kiu, multe observinte, multe suferis, tia homo tamen scias resti por siaj familianoj plej sentiva kaj amanta."

Kompilis kaj trad. D.C.

Maljunulo rakontas :

## LA POPOLO...

Dum riparo de aŭtomobilo, en Pariza ĉirkaŭaĵo, mi iris al iu gastejo por malgranda manĝaĵo. Survoje mi renkontis maljunan preĝfilinon elirantan el la preĝejo.

Ĉar ni iom kuniris, mi demandis al ŝi :

- Por kio vi voĉdonas dum la balotoj ?

- Ho!... - ŝi respondis - je mia aĝo mi voĉdonas DEKSTRE...

Mi diris :

- Se venkos la dekstro, vi perdos multe da avantaĝoj, ekzemple la luo de via loĝejo kostos pli, la pensio malgrandiĝos, vi pagos ĉion, eĉ la plej etan bagatelon.

- Ne! - ŝi respondis. La MALDEKSTRULOJ tion ne permesos.

Per tiu ĉi respondo, mi komprenis la hodiaŭan dekstran vojon de nia popolo...

-nn-

## 50a datreveno

### KIO OKAZIS EN FRANCIIO EN 1936

Antaŭ 50 jaroj okazis la popola fronto en Francio. En 1934 komenciĝis imponaj sociaj agitadoj. La dekstraj ligoj (junaj patriotoj, fajraj krucoj, rojalistoj ktp) pretekste, ke kelkaj parlamentanoj estis kunkulpuloj de famaj trompŝtelistoj, ĉefe de la plej fama Staviski, organizis manifestaciojn kontraŭ la nacia asembleo. Okaze de la plej ampleksa, la 6an de februaro, okazis pafado sur la ponto antaŭ la asemblea palaco (Palais Bourbon). Kelkaj manifestaciintoj estis mortpafitaj. Tamen ĉio estis iom konfuza, ĉar ankaŭ la komunistoj kaj la militintoj el ĉiuj medioj vokis por manifestacii. La sekvantaj tagojn la komunistoj manifestaciis kontraŭ la dekstraj asocioj. Sed ja la 12an de februaro, post alvoko de la sindikatoj, okazis la plej impona manifestacio, iuflanke C.G.T.U (Unuiga ĝenerala konfederacio de Laboro) kaj komunistoj, aliflanke C.G.T. kaj socialistoj. Sed la du manifestacioj kunigis sur la granda placo de la Nacio. La laboristoj tre deziris unuigitan agadon. La agado de la dekstruloj iom sukcesis, ĉar oni ŝanĝis la registaron.

Tiu unuigita laborista agado kontraŭ la faŝisma danĝero estis la komenco de pli da batalemo kaj unuigemo ĉe la laboristoj. En 1936 la komunistoj, socialistoj kaj maldekstraj respublikanoj subskribis interkonsenton pri unuigita agado sub nomo popola fronto. Ĉe la baloto de majo 1936 por elekti la deputatojn, tiuj partioj akiris la plimulton. Komenciĝis ankaŭ

strikoj kaj okupado de laborejoj en granda unuiĝa etoso. Iom post iom partoprenis ĉiuj industriaj branĉoj, eĉ profesioj, kiuj ne kutimas al tiu agado, ekz. magazen-vendistinoj, oficistoj, funkciuloj. Tiel la nova registaro vole-nevole devis plenumi la promesojn kaj ankaŭ la mastraro estis premdevigata diskuti pri la depostuloj kaj fine subskribi la interkonsenton "Matignon" en junio 1936 kun la sindikatoj (C.G.T., en kiu intertempe kunigis ĉiuj sindikatoj). La laboristaro akiris : pli bonajn salajrojn, 40-horan laborsemajnon, 2 semajnojn da pagitaj ferioj, pli grandan respekton de la sindikataj rajtoj, kaj, laŭ branĉoj, kolektivajn konvenciojn.

Kian lecionon tiri el tiuj eventoj ? Kiam la laboristaro estas kapabla agi en unuiĝo, ĝi estas granda potenco. En tiu okazo ĝi zorgis pri la produktaj rimedoj, sed ĝi ankaŭ asertis rajtojn pri ili. Certe estas la teknikaj progresoj, kiuj ebligis plibonigi la laboristan kondiĉon, sed por tio necesas ankaŭ agado, ĉar neniam la mastraro donus ĝin bonkore. Sed ne sufiĉas momenta agado, ĉar iom post iom la mastraro trovas manieron por malpliigi la akiritajn avantaĝojn. Ankaŭ la ĉeesto de faŝismaj reĝimoj ĉe la landlimoj malfavoris la eblecon pace ĝui tiujn avantaĝojn.

La problemo ne plu estas tute sama. Nun la laborantoj havas sufiĉe bonan staton, la teknika progreso tion ebligas, sed tiu produktiveco estas tiom granda, ke okazas maldungeco kaj mizero flanke de abundo. Necesus trovi alian ekonomian sistemon, kiu ne plu permesu tion.

Kian ? Ĉu socialismon ? Laŭ mi, necesas difini kian socialismon. Ankaŭ estus malfacile ŝanĝi nur en unu malgranda lando. Oni bezonus solidaron de tutmondaj laboristoj, almenaŭ de tiuj de la disvolviĝintaj landoj. Necesus komprenigi al ili pri kio okazas, ĉu ili agos same, ĉu ili almenaŭ ne permesos fiagojn kontraŭ tiu ŝanĝo. Do necesas bona internacia komunikado, kiun povas helpi esperanto.


JoPo

### PRI NEPERFORTA AGADO NEDISKONIGITA

En la tuta mondo okazas neperfortaj agadoj. Bedaŭrinde, la amaskomunikiloj tro ofte silentas aŭ misinformas la publikon.

Tamen kelkaj gazetoj preskaŭ nekonataj subtenas la agadojn de la subpremataj popoloj. Jen eltiraĵoj, kiujn mi legis en "Solidarité Palestine" :

"... Tiu neperforta manifestacio kuraĝplena okazis en vilaĝo Qattana (nord-okcidente de Jerusalemo, Cisjordanio) la 25an de januaro 1986.



Plurfoje olivarbaro estis elradikigita kaj la tereno nivelita per buldozoj antaŭ konfisko de palestinaj bienoj.

...La palestina centro pri neperforta esploro, la araba-juda asocio pri neperforto kaj paco, kun partopreno de multaj Palestinanoj, Israelanoj, alilandanoj kaj loĝantoj de Qattana, decidis denove planti olivarbojn en la koncernan terenon.

Ili elektis la "Tubeshuat"-tagon, plantad-tago por la judoj. Venis pli ol cent personoj.

... Sur la tereno restas nur olivarbaj branĉoj. Milita ŝipo kaj tri ŝipoj de civilaj Israelanoj armitaj per mitraletoj ĉirkaŭas la manifestaciantojn. Advokato de "Jonathan Kuttab"-centro instrukciis la laborantojn armitajn per ŝpatoj, pioĉoj, por planti 400 alportitajn olivarbidojn.

Armitaj viroj atendas, ke dudeko da arboj estas plantitaj por interveni. Samtempe soldatoj kontrolas identecojn de Palestinanoj kaj la kolonianoj eltiras la ĵus plantitajn arbidajn... du-trifoje, dum la advokato interparolas kun la kolonianoj.

...Fine la laboro estas finita sed la vilaĝon kaj la plantejon ĉirkaŭbaras la soldatoj. La manifestaciantoj sidas surtere, la vetero estas belega. Vilaĝanoj donacas al ili tion, kion ili posedas : olivojn de la pasinta rikolto (nun ili ne plu havas olivarbojn) kaj "zaatar"(timion) kun pano.

Ĉiuj manĝas en fervorega etoso sub furiozaj rigardoj de la kolonianoj kaj soldatoj, kiuj tamen ne intervenas. Ili eĉ promesas, ke la arbidoj ne plu estos elradikigitaj.

Sed post la foriro de la manifestaciantoj la olivarboj estis denove elterigitaj kaj forprenitaj.

Ni certe decidu rekomenci la plantadon."

Jen bela ekzemplo de homa agado. Digna, kuraĝa kaj "responza", ĉu ne ?

Ginette G.



## LAŬTAJ PETOJ KAJ INFORMOJ

### Ekologia politiko :

"AVENO", espereble kvaronjara bulteno de la Asocio de Verduloj Esperantistaj, aperigis sian 3an numeron. Eblas ĝin ricevi, sendante 2 irpk-ojn al J.C. Thumerelle, Place de la Station 16, B 7790 WARNETON, Belgio.

Enhavo de la 16 paĝoj : La jarkunveno de AVE okaze de la 70a U.K., Kiel la Verdaj Movadoj taksas Esperanton? Kiuj estas membroj de AVE? Pri la filozofio de Henriko George, ekstrakto el "Letero de la Eŭropaj Verduloj", Ĉu Esperanto en la Eŭropa Parlamento? Ĉu ekologiaj ideoj estas ĉiam senkompare? Por nova E-Oazo, Pri la Verda Movado en Usono...

La apero de la bulteno ne estas ankoraŭ tre regula, sed espereble plu daŭros la publikigado. Pro tio estas necese, ke multaj esperantistoj legu ĝin kaj kunlaboru kun ĝi.

Ekologio : En kadro de TEJO okazos inter la 11a kaj la 18a de aŭgusto '86 **NATURAMIKA TENDARO** en la nord-hungaria montaro Matra, en fagoarbara regiono. La laborlingvoj estos la angla kaj Esperanto. La tendaro celas la naturprotektadon, ekologian edukadon de E-istoj kaj pliprofundi kontaktajn inter ne-Esperantistaj naturprotektadaj organizoj, movadoj, kaj la E-movado. Por ricevi ĉiujn informojn kaj aliĝilon, kontaktadreso : R.BAROSS, TEJO/KSA\*KoKo, H-1136 Budapest, Balzac u.11.

Kontraŭ nukleaj armiloj : "TERO-SIMO, NE!" estas la titolo de 8-paĝa faldebla dokumento eldonita 10000-ekzemplere de Japana Esperanto-Instituto en 1985. La eldonintoj esperas, ke la tutmonda esperantistaro tradukos tiun apelon (originale verkitan en Esp.) en naciajn lingvojn kaj plu informos pri la afero. Jen titoloj de la diversaj partoj de tiu dokumento : Por la futuro de l'homaro, Kio okazis en Hirosima kaj Nagasaki, Postefiko de la atombombo, Kiel nun statas la viktimoj, Kiel nun statas nukleaj armiloj en la mondo, Por-pacaj libroj eldonitaj en Japanio, Japanaj E-Grupoj agantaj por la paco.

Petu ekzempleron de la apelo kaj proponu vian kunlaboron al : Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162.

9a Internacia Esperantista Semajno ĉe Alpoj : Ĝi okazos de la 30a de aŭgusto ĝis la 6a de sept. '86 en feriejo "La Joie de Vivre" (alt. 1000 m) en verda valo ĉirkaŭita de belegaj alpoj. Diversnivelaĵoj, ekskursoj, amuzaj kaj kulturaj programoj. Informojn kaj aliĝilon peti de : Centre Culturel Esperanto, 5 rue Dr Roux, F 34000 MONTPELLIER.

## De ESPERANTO-OAZO al MONDHEJMO Evoluo de Esperanta-ekologia projekto

Akiles Sanz

Post la apero en "Laŭte!" pasintan aŭtunon de mia unua alvoko pri starigo de nova Esperanto-Oazo, la projekto akiris konkretan formon kaj ni jam faris la necesajn oficialajn paŝojn por progresigi ĝin, nome ni fondis asocion kaj malfermis bankkonton. La influo de aktivaj apogantoj estigis kelkajn ŝanĝojn : ekzemple la nomo transformiĝis en "Mondhejmo" kaj la ekologia aspekto akiris pli da graveco.

Kiel eblajn sidejojn por Mondhejmo ni ricevis sugestojn kaj proponojn por la regionoj de Ardèche, Agen, Bretonio kaj forlasitaj vilaĝoj en Sudfrancio. Ni vizitis ĝis nun du el tiuj regionoj - Agen kaj Bretonio - kaj konsideris netaŭga proponon rilate la insulon Groix. Je la fino de aŭgusto 1986 ni vizitos forlasitajn vilaĝojn, speciale Cauduron, apud St.-Chinian (Béziers), kie la instruista movado ICEM jam posedas bienon.

Jen la teksto de nia definitiva informilo. Ni ellaboris jam germanan, hispanan kaj francan versiojn, kaj intencas traduki ĝin al multaj eŭropaj lingvoj por atingi ankaŭ ne-esperantistajn grupojn.



# MONDHEJMO

## EKOLOGIA-CENTRO INTERNACIA

*Mi ne volas florojn sur mia tombo  
aŭ en iu ajn imaga paradizo,  
sed dum mia vivo  
kaj sur nia planedo.*

Justo

Same kiel Justo, ni ne volas atendi ĝis nia morto por havi florojn, nek deziras vivi ĉiam en nehumanaj kondiĉoj. Tial ni serĉas gesamideanojn, kiuj kune kun ni volas konstrui aŭ subteni ekologian hejmon internacian.

Por atingi tiun celon ni fondis asocion, kies statuto aperas sur la dorso de tiu ĉi informilo (aŭ p.65 de Laŭte!).

La bazaj principoj de nia projekto estas jenaj :

- Ekologio staras antaŭ financa profito ; t.e. naturo estas pli grava ol mono.
- En MH (Mondhejmo) regas frateco, amo kaj racio, kaj ne havas spacon la krueleco, kiu jam speguliĝas en la stulta germana proverbo "ĝojo pro alies malfeliĉo estas la plej granda ĝojo". Ni ne volas nome esti ŝajne



- feliĉaj je la kosto de aliaj, sed vere feliĉaj kune kun niaj samideanoj.
- Ni penos eviti la maljustojn kiujn kutime suferas la virinoj kaj ni aspiras disdoni la taskojn kaj decidrajtojn ĉiam duone inter virinoj kaj viroj.
- Sur la tereno de MH rajtos veturi nur nepoluciantaj kaj senbruaĵaj veturiloj, kiel ekzemple bicikloj kaj elektraĵaj aŭtomobiloj. Esceptoj, nur kiam ili ne estas eviteblaj.
- Ni uzos kiel eble plej multe nepoluciantajn energifontojn, kiel ekzemple sun- kaj ventenergiecojn.
- Fumi en MH estas konsiderata kiel agreso ago kontraŭ la kunloĝantoj, kontribuado al aermalpurigado kaj damaĝa ekzemplo por la infanoj.
- Ĝenerale, neniu ĉe ni kulpas pri via malfeliĉo ; la responsuloj regas ekstere. lasu do vian agresemon antaŭ nia pordo kaj estu en nia hejmo pacema, amema kaj aminda.
- Konsciante, ke nuntempe ne ekzistas pli taŭga lingvo ol Esperanto por ludi la rolonde mondlingvo, ni konsideras Esperanton kiel nian oficialan lingvon, instruos ĝin regule kaj subtenos ties disvastigon interalie per kulturaj aranĝoj.

Por subteni finance MH-on povas ekzisti du enspezofontoj : luigado de ĉambroj kaj parceloj, kaj kontribuado de gemecenatoj, finance fortaj geverduloj kaj gepensuloj, kiuj volas loĝi ĉe ni por longa tempo aŭ por ĉiam.

Klimate kaj geografie, Francio estas konvena lando por starigi nian hejmon. La loko estu neindustria kaj nature bela. Granda bieno kun renovigendaj konstruaĵoj en akvo- kaj laŭeble sunoriĉa regiono estus taŭga. La kapitalo de la asocio konsistas el la aliĝkotoj. Minimuma kontribuado : 300 FF. Finance malfortaj simpatiantoj povas grupiĝi sub la nomo de unu el ili kiel responsa membro. Finance fortaj asocioj bonvolu kontribui per pli alta kotizo. (La asocio konsideros kaj kvitancos la superkotojn kiel pruntedonitan monon seninteresan, tiel ke, kiam bona financa situacio permesos tion, aŭ male en okazo de malsukceso, tiu mono restos je la dispono de la donintoj.) Ĉiu membro ricevos kvitancon pri sia pago, kaj minimume unu fojon jare informilon pri la evoluo kaj financa situacio de la asocio, same kiel enketilon pri gravaj asociaĵaj aferoj. Antaŭ la fino de 1987, la asocio investos la kapitalon por plenumi la unuan celon, kaj esploros la konvenecon transformiĝi en kooperativon. Por depreni monon el la ŝparkonto de la asocio necesas la komuna subskribo de 2 estraranoj.

La jara kotizo estas 20 FF, kiuj la unuan jaron estas entenataj en la aliĝkoto. Per la jaraĵ kotizoj kaj poste la interezoj de la kapitalo, la estraro kovros la kurantajn elspezojn por informado, propagando, administrado kaj serĉado de taŭga sidejo. La unua kotizpago validas kiel aliĝdeklaro.

Kontaktadreso: Akiles Sanz Hafensplatz 6 D-1000 Berlin 61	Asocia konto : B.F.A.C.M., 21 bd. Maiesherbes, F 75008 Paris pour Caisse de Cr�dit Mutuel de Compi�gne, code banque 15629, code guichet 60036. ASS. MONDHEJMO, compte 102 4115 188509
--	---

Alia uzebila konto : Catherine Samain, 9 av. de Verdun, F-60200 Compi gne  
 Poŝtkonto : 1980939A Paris

-----  
 Ekologia Centro Internacia "Mondhejmo"

1986-04

### STATUTO

1. La subskribintoj fondis asocion laŭ la franca leĝo de 1-7-1901.
2. Ĝi havas la nomon "Mondhejmo - Ekologia Centro Internacia".
3. Celoj : 1) Starigi hejmon en Francio por ekologie konsciantaj homoj el ĉiuj landoj.  
 2) Uzi Esperanton kiel oficialan lingvon de la asocio pro la kono, ke nuntempe ne ekzistas pli taŭga lingvo por la internaciaj rilatoj.  
 3) Organizi kulturajn aranĝojn kaj pri Esperanto kaj pri la ekologia scienco, same kiel pri ties aplikoj favore al la internacia kompreniĝo.
4. Ĝia provizora sidejo estas jena : Catherine SAMAIN, 9 av. de Verdun F-60200 Compi gne.
5. Povas esti membro ĉiu persono, ankaŭ ne-esperantistoj, kiu akceptas ĉi tiun statuton kaj pagas la kotizon.
6. La servoj de la asocio estas rezervataj al ties membroj.
7. La asocio estas administrata de estraro konsistanta el prezidant(in)o, sekretari(in)o kaj kasist(in)o. Ĝis la unua elekto, la estraro konsistas el la subskribintaj membroj. Ĉiujare dum la unua trimestro, oni elektos novan estraron per letera sekreta voĉdonado.
8. La enspezoj de la asocio konsistos - krom eblaj donacoj kaj subvencioj - el la aliĝkotoj kaj la jaraĵ kotizoj.
9. Interna regularo fiksos la kvantojn de la jaraĵ kotizoj kaj la aliĝkoton.
10. Por modifi la statuton aŭ por likvidi la asocion necesas la plimulto de du trionoj, konstatita per letera sekreta referendumo. En okazo de likvido, ĝiaj psedaĵoj estos atribuitaj al similcela asocio, aŭ - ĉe manko de tiu ĉi - dividitaj duone inter unu ekologia kaj unu Esperanta asocio, kiuj estos determinataj de la membroj per simpla plimulto en letera sekreta baloto.


Compi gne, la 28an de marto 1986. Prezidantino : Catherine SAMAIN  
 Sekretario kaj kasisto : Aquiles SANZ

\*\*\*\*\*

Arta staĝo por E-parolantaj pentristoj (temo : Kreadeco en Akvarelo) de la 1a ĝis 15a de aŭgusto '86 en la kadro de la Artaj Renkontoj de Gatti res (apud Nico). Car estos akceptataj ne pli ol 10 personoj, tial urĝas peti pli detalajn informojn de : Jean-Pierre CAVELAN, 164 chemin de Saquier, St-Isidore, F 06200 NICE, Francio. Tel: 93 29 82 25.

En Francio :

MINITELI ESPERANTE ESTAS TUTSIMPLE,  
ĈU NE ?



Atentu!

Nepre evitu tajpi  
sur aŭ post tiujn  
sagetojn...  
Se ne, parto de la  
mesaĝo estos perdita.

Janseb.

ADRESARO DE "LAŬTE!"  
Ĝisdatiga listo de junio 1986  
Novaj adresoj kaj sciigoj

**BELGIO**

- Jean TAHAY, av.V.Olivier 10,B98, 1070 ANDERLECHT
- Robert BURNAY, rue Julien Colson 29, 5000 NAMUR (27, emerita fervojisto) ŝ: esp., ĝardenlaboroj, t: 081/22.37.42)
- André MARTIN, 64 rue de Coquelet, 5000 NAMUR (39,ĵurnalisto) ŝ: pacmovado, E-movado, sindikatismo, komunismo, historio.

**BRAZILIO**

- Aleksandro CARNEIRO, str. São Vicente de Paulo,S/Nº, SANTA BARBARA, (Bahia), 44150 (62,kemi-teknikisto) ŝ: biciklado, vojaĝado, studado, interŝ. t: 2479780.
- + C. de MOURA TELLES, Caixa Postal 427, 74000 GOIÂNIA, Goiás.

**FRANCIO**

- Pierre LANDARD, Rte de Corréo, La Roche des Arnauds, 05400 VEYNES
- Léon KELLER, 33 r. du Point de Vue, 14100 LISIEUX
- + Dominique COUTURIER, Rue Basse, Bayers, 16460 AUNAC
- + Geneviève DELAGE, Ecole de Pérignac, 16250 BLANZAC.
- Jean ANGOT, 3 rue Arago, 17300 ROCHEFORT
- + R. DUMAS, ch. de la Croisette, 30121 MUS
- François MESPLÈDE, 23 r. Gustave Hameau, 33120 ARCACHON
- Guy GARCIA, 4 Imp. Marcel Pagnol, 33530 BASSENS
- + Simone BOUTINES, 33000 BORDEAUX, 212 rue Judaïque
- Claude FRAIGNEAU, 15 rue Descartes, 33150 CENON
- + Gilberte LASSALLE, 21 rue Blanqui, 33150 CENON
- Alberto MARCHAND, 14 rue de la Concorde, 33150 CENON
- Francis PELLE, 34 rue G. Mandel, 33110 LE BOUSCAT
- \* Centre Culturel des Carmes, Club Espéranto, 33210 LANGON
- + Annie LAMAIGNERE, Gr. scolaire E.Herriot, rue d'Eysines, 33700 MERIGNAC
- + Anne-Marie PIN, 43 rue Paul Ducas, 33700 MERIGNAC
- + Ljo (n.f.i.o) ĉe Esperanto, 5 rue Dr. Roux, 34000 MONTPELLIER - provizore! loĝejo ne plu fiksebla? - (senaĝulo, falsartisto aŭ pseŭdoverkisto) t:67541543 (ptm) ŝ: nEo-PaTaFiZiKo por amuze renversi tutmondon danĝeran, harda metala roko (t.n. agresiva roko, ne ŝtonego!), libera ĵazo, hindia, eksperimenta kaj ceteraj strangaj muzikoj aŭ bruoj. senfina dialogo kun ĉia naturo kaj stranga amiko/-ino alloga. ekstermi studentojn, anark-, dada-, labor-, ekologi-, material-, individu-, total-, aŭtoritat- kaj ceterajn seriozajn -istojn kaj la akompanajn -ismojn. helpeto por Internacia Urĝa Agado. sorĉi iun. K. bonvena, certigu pri adreso.
- Remo MAGNANI, Cabrials, 34230 PAULHAN (29, pensiulo!) t: 16.67.96.77.35
- Jean-Louis HUSSE, Le Bourg St Uniac, 35360 MONTAUBAN
- + M. SCHNELLER, La Retaudière, 37130 LANGEAIS

- Edouard SCHERTZER, Charnay (Graye et Charnay), 39320 ST JULIEN, (20,em.)  
 ŝ: kontistestro, kolektanto de E-poŝtmarkoj. (jam posedas n° 60 kaj 61)
- Rob. PRÉVOST, Ch. de Rome, Trôo, 41800 MONTOIRE SUR LE LOIR
- Lucien BEOLETTI, rue du Stade, 46200 SOUILLAC, (22, em. SNCF) t:65.378887
- + Aline MAS, La Durantie, Lanzac, 46200 SOUILLAC (34,-) ŝ: modlado, lego,  
 artoj, E-korespondado, t: 65378549.
- Gilbert DUMONT, Maison de retraite, 47800 MIRAMONT DE GUYENNE
- Robert SARRUT, Saint-Sauveur de Peyre, 48130 AUMONT-AUBRAC (41,instr.)  
 t: 66 31 1945
- Jean THARRAULT, Saumoussay, Cidex 32, 49260 MONTREUIL BELLAY
- + Catherine ROUX, 9 square A.Briand, 54500 VANDOEUVRE (56, ŝtatofic.),  
 ŝ: sociaj k politikaj intereso, klas. muziko, astrologio, kol. PM. t:83555336
- J.C. PICQUET, 13 En Nexique, 57000 METZ (60, ŝtatfunkci.) ŝ: politika scien-  
 co, sociologio. t: (3)776 00 15
- \* Michel DUPRÉ - Jeanne MANIETTE, 137/47 rue Decugis, 59650 VILLENEUVE  
 D ASCQ.
- + Catherine SAMAIN, 9 av. de Verdun, 60200 COMPIEGNE (62, studentino)  
 t: 44 20 16 54
- Jacques SIMONET, 140 av. Jean-Mermoz, 64000 PAU, t:59 625565.
- Georges COMTE, 12 pl. Picasso, 66400 CERET
- Charles GÉRARD, 4 rue Dr. Rives, 66000 PERPIGNAN
- Etienne BARRIER, 35 rue de Heimsbrunn, 68720 HOCHSTATT
- Jacques DOUARD, 5 rue de la Prévoyance, 69100 VILLEURBANNE (32,salajrulo)  
 t: 78.85.85.31
- Gaston FOURNIER, 37 rue de Palestro, 75002 PARIS (17, em. ŝtatoficisto)  
 ŝ: ekologio de la fontoj kaj etaj riveretoj (amatora) Pseŭdo: Gastono.
- Petro LEMARCHAND, 43 rue Desseaux S11, 76100 ROUEN
- Jean GIBAU, 28 rue Raoul Dufy S12, 76600 LE HAVRE
- x POUPEAU-BEAUFORT, Presqu'île de Cheusse à Arçais, 79210 MAUZE sur le Mignon
- Robert ROZE, 133bis av.J.Gasquet, 83100 TOULON (31,emerito) ŝ: lingvoj,  
 muziko. t: 94.23.00.46
- Raymond GUÉGUEN, Rés. Jeanne d'Arc, 4D rue des Soeurs de la Rivière,  
 87000 LIMOGES

- + Louise MARIN, 9 rue Adrien Lejeune, 93170 BAGNOLET
- Patrick CHRÉTIEN, 144 rue Danielle Casanova, 93200 SAINT DENIS
- Octavio CASTELLVI, 79 rue C.J.Vaillant, 94600 CHOISY LE ROI
- R.A. CLABAUT, Les Gémeaux Bât.A, 2 rue de Paris, 95680 MONTLIGNON

#### GERMANIO FED.

- Didier IZACARD, Kurfürstenstr.45, 1000 BERLIN 46 (55,librovend.) ŝ: legi,  
 vojaĝi. t: 030/773 54 43
- Akiles SANZ, Hafensplatz 6, Ap.206, 1000 BERLIN 61 (36, tradukisto) ŝ: aktiva  
 nefumanto. t: 2617406
- Wolfgang GÜNTHER, Schulstr.7, 3501 AHNATAL 1
- H.D. GOERES, Viersener Str.123, 4050 MÜNCHENGLADBACH
- Otto NITSCHKE, Kammerstr. 211, 4100 DUISBURG 1

- K.H. KERSTING, Bredowstr.3, 4300 ESSEN 1
- \* Libera Esperanto-Asocio, Sossenheim, Renneroder Str. 22, 6230 FRANKFURT  
 am Main 80
- Gerhard WILBERT, Kirchenstr.2, Reinheim, 6657 GERSHEIM 2
- + Liesel NAGEL, Roseggerstr.17, 7800 FREIBURG i.Br. (25,-) ŝ: migrado, lerni  
 historion. t: 0761/709016
- Otto BERNHARD, Baslerstr.9, 7801 SCHALLSTADT LEUTERSBERG
- F. BÖHRINGER, Eisenbahnstr.5, 7415 WANNWEIL
- \* Esperanto-Freunde Herrenberg, Alois Eder, Berliner str.7, 7033 HERRENBERG

#### HISPANIO

- F.A. ANTÚNEZ ROMERO, Gavilán 28, 41006 SEVILLA (63,elektristo) ŝ: multe  
 da ili! t:(954)651848
- José A. FLETA, S.Teresa 20, -7º-, 50006 ZARAGOZA
- + Antonia LAPUERTA PALACIOS, c/San Vicente Martin 23, 50008 ZARAGOZA

#### IRLANDO

- Christopher FETTES, StColumba's College, DUBLIN 16

#### JAPANIO

- EUN Mouam, Tokio Internacia, P.O.Kesto 5075, 100-31
- KOSEKI Joŝio, Sosigaya 3-10-10, Setagaya-ku, TOKIO, 157
- + KOSINO Motoko, Hakuraku Mansion 904, Sinoharadai-mati 36-28, Kôhoku-ku  
 YOKOHAMA-si, 222
- + HAMADA Jumiko, Wakamiya 2-24, OKEGAWA-si, 363
- YUASA Norihisa, Tan'yôtyô Itukaitiba 1288, ITINOMIYA-si, 491
- OONISI Sin'iti, Singai-tyô 1213, HIKONE-si, 521-11
- YAMADA Tempu, Oozone 22-1-26, Kita-ku, NAGOYA, 462
- MIYAKE Eizi, Komura-kata, Horikawa-Sanzyo-agaru, Nakagyo-ku, KIOTO,604

#### NEDERLANDO

- G.N.M. van DIJK, Paramaribopl. 54-3º, 1058 AT AMSTERDAM
- Dies KROMBEEN, "La Tri Betuloj", Jufferswg.4B, 4421 JB KAPELLE (23,em.)  
 ŝ: antaŭe instruisto pri germana lingvo.
- W. KOOLHOVEN, Matenwg.8 - 105, 7522 LG ENSCHEDE

#### SVEDIO

- Gunnar BÖRJESSON, Marklandsgatan 65 VII, 414 77 GÖTEBORG (21, pensiulo)  
 (industria laboristo) ŝ: Esperanto kaj vojaĝoj. t: 031-412927

\*\*\*\*\*

#### ĈE SAT-BROŝURSERVO :

*Jenaj broŝuroj estas nun elĉerpitaj :*

\* *KIEL DIRI...? (Lentaïne)* \* *"Linguistique et non-violence"*  
 (H.Masson) \* *"Les 16 règles"* (troviĝas nun aldonita al EF)  
*"La Zamenhofa Homaranismo"* (Caubel). Escepte de "Les 16  
 règles", tiuj broŝuroj estos reeldonataj post kelkaj monatoj.  
 Denove disponebla post sukcesa unua eldono : **"LAŬ LA FLUO  
 DE L'INTERPAROLO"** (+ *Esprimoj sankcĉitaj de l'uzado*) de  
 L. BOURGOIS. Estas kelkaj aldonoj kaj iom pli agrabla  
 aspekto. Nova prezo : 8 FF.

## Eldonprogramo de SAT-Broŝurservo en 1986/1987

### Jam aperis :

- \* **VARSOVIO 1887** de A. LOPEZ LUNA. Facile legebla, romanigita biografio de ZAMENHOF. 76 paĝoj, 12 FF.
- \* **PENSOJ DE PASKALO**. Trad. de VALO. Ekstraktaro el tekstoj, kiujn povas ignori neniu kulturamanto. 92 p., 15 FF.
- \* **NACIIISMO**, de E. LANTI. Klasikaĵo en la laborista E-movado. 72 paĝoj, 12 FF.

### Venontaj eldonaĵoj :

- \* **ESPERANTO PER INTER-METODO** de A. SLANINA. Internacie uzebla kurslibro, kiu kunigas la avantaĝojn de la rekta metodo kaj tiujn de la t.n. gramatika. Ĝi sin turnas al ĉiuaĝaj lernantoj. Kun multaj ekzemploj kaj ilustraĵoj.
- \* **FILOZOFIO ZOOLOGIA** de LAMARK. Trad. de VALO. Duonjarcenton antaŭ Darvino, LAMARK komprenis, ke la specioj devenas unuj de aliaj per longdaŭraj transformiĝoj.
- \* **LA KONFLIKTO** de F. LE DANTEK. Trad. E. LANTI. Jen fine retrovita la manuskripto de la lasta verko tradukita de LANTI, kun enkonduko de li : "Nemaloŝte mi konstatis, ke ateistoj ne pli meritas la nomon liberpensulo ol la plej ortodoksa kredulo... Tiu libro liveras bonan ekzemplon de toleremo per tio, ke deisto kaj ateisto amike interdiskutas pri demandoj, al kiuj ili donas malsaman respondon...". Trafa antaŭrespondo al la debato "SAT kaj religioj", ĉu ne ?...

- \* **ESPRIMARO FRANCA/ESPERANTA** de L. BOURGOIS. Tiu nepre havinda kaj uzenda gvidlibro kompletigos la dulingvan trilogion, el kiu jam aperis "Laŭ la fluo de l'interparolo" kaj "Proverbaro franca-esperanta", kiu celas provizi la E-parolant-ojn per materiala uzebla en la ĉiutaga interparolo.

### Poste (nun en preparo) :

- \* **LA MORTULA ŜIPO** de B. TRAVEN en trad. de Hagen Hirte. Dika romano de aventuroriĉa aŭtoro.

Por sukcesigi tiel ambician eldonprogramon SAT-Broŝurservo bezonas kiom eble plej da antaŭmendantoj. Ankaŭ vi fariĝu subtenanto de la broŝurservo kaj ĝuu 20%-rabaton kiel monprovizanto. Sufiĉas monprovizi per minimume 100 FF al :

Cercle amical esp. agenais. P&k: 3371 74 M BORDEAUX.  
Vi ricevos aŭtomate la eldonojn de tiu programo (kompreneble, nur francoj ricevos la "Esprimaron fr./esp.")

NI PRENU NIAN BIENON, KIE NI ĜIN TROVAS (fino de p.2)

Ĝi estu la organo de la nova tutmonda kulturo. Tiu ĉi, kiel juna planto, sin nutru kvazaŭ osmoze per la substanco de la antikvaj, etnaj kaj naciaj kulturoj.

Ekde sia naskiĝo, esperanto, heredanto de la hindeŭropaj lingvoj, esprimis precipe la tradiciajn karakterojn de la okcidenta kulturo. Ni nun atendu de niaj orientaziaj, afrikaj kaj amerindianaj, samideanoj, ke ili alportu en ĝin novan sangon ĉerpitan el iliaj originalaj kulturoj. Ĉiu donaco estu bonvena. Kelkaj japanaj samideanoj prave riproĉis, ke nia esperanto estas tro esence eŭropa. Ili helpu nin etendi ĝin al tutmonda skalo, fari el ĝi tutmondan esprimilon.

VALO

\*\*\*\*\*

## BAHAANOJ TORTURATAJ EN IRANO

La 4an de majo estis strangole ekzekutata S-ro Sirtullah Vhadat, kiu estis en malliberejo ekde la 13a de februaro 1984. S-ro Firdus Shabrukh, 38-jara, kiu estis en malliberejo ekde la 26a de septembro 1983, estis ekzekutata la 9an de majo 1986. Ambaŭ estis forte torturitaj. La tria viktimo estis la 15-jara Payman Subhani kaptita kun sia patro kaj mortigita per ŝtonoj, ankaŭ en majo 1986. La registaro de Irano persekutas la bahaanojn ekde 1979. Jam pli ol 200 bahaanoj estas ekzekutitaj, 767 restas en malliberejoj, pli ol 10000 perdis siajn posedaĵojn kaj pli ol 30000 devis forlasi sian landon. La tragedio, kiun suferegas la bahaanoj pro sia religio, jam estis denunciata de diversaj organizaĵoj en la mondo. Se iu amiko deziras peti informojn aŭ korespondi pri ĉi tiu temo, li skribu al jena adreso :

Bahaa Grupo de Amikeca Korespondado, Pk. 280, E-11380 LA LINEA (Cadiz)

\*\*\*\*\*

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 SOLVO DE LA ENIGMO DE L! 66

1	D	A	K	T	I	L	A	R	B	O
2	O	L	E	O	D	U	K	T	O	N
3	K	I	N	K	O	N	A		D	
4	T	E		A	L	E	R	G	I	A
5	O	D	E	T		T	O	A	S	T
6	R	I	P	O	Z	O		L	A	R
7	E	R	O		E	N	K	E	T	O
8	D	I	K	A	N		M	O	V	
9	Z	T		M	I	L	E	P	O	R
10	I	E	N		T	O	R	S		E
11	N		L	A	O	K	O	O	N	O

Klarigoj  
Horizontale : 3.2 DD : Delfin Delmau, kies nomo kuŝas en Enciklopedio de E., E. en Perspektivo, ktp.  
7.2. Jano Karal estas la ĉefrolulo de la detektivaj romanoj verkita de Johano Valano.  
Vertikale : 1. Klara Silbernik estis la edzino de Zamenhof. 2. Alie dirite kuŝas nek en la PIV, nek en la Granda Vortaro E.F. de Waringhien sed ĝi estas trovebla en "Dictionnaire usuel F.E." de Grosjean-Maupin

## OKAZE DE LA CENTA DATREVENO DE ESP-O...

SOLIDARITÉ INTERNATIONALE ANTIFASCISTE (S.I.A.)  
(Antifaŝista solidareco internacia), helpe de SAT-Amikaro,  
eldonos siajn kalendarojn por 1987 dulingvaj, t.e. franca-  
esperanta kaj hispana-esperanta (2 eldonoj).

Temoj : Historio de la S.I.A.-Kalendaro, Historio de Esp-o  
Kosto : 25 FF plus 25 % por sendokosto.

Rabato : 10 % por 5 ekzempleroj kaj pli.

Mendoj : al S.I.A., 4 rue de Belfort, F 31000 TOULOUSE

Precizigi, ke oni deziras : aŭ la eldonon Français-Esperanto  
aŭ la eldonon : Español-Esperanto.

Jen belega donaco, kiun vi povas fari al vi, aŭ konatoj viaj!

---

## NOVAĴOJ DE SAT-BROŜURSERVO :

### Post "JULIA", ... "AŬGUSTO" !

Ĉiam estis petolema la ofsetilo, kiun mi brokante  
akiris antaŭ kelkaj jaroj. Sed nun aldoniĝas ia malico kaj la  
risko, okaze de grava pâneo, ne trovi la necesajn pecojn  
por ripari. Ĉar estas iom da ŝparita mono en la kaso de SAT-  
Broŝurservo, mi decidis aĉeti per ĝi pli freŝdatan maŝinon el  
la sama marko "Rex-Rotary" (ankaŭ brokante, sed kun garan-  
tio). "Rex-Rotary" reprenos la nun ne plu utilan stencil-  
gravurilon. Tiel la fakturo estos : 14825 FF. La nova ofset-  
ilo baldaŭ alvenos al la "Laŭtejo" kaj estos uzebla esper-  
eble ekde aŭgusto. Ĝia baptonomo estos do "Aŭgusto" !  
Espereble, bone kunlaboros "Aŭgusto" kaj la tajpilo "Julia"  
kaj liveros kune multajn idojn...

Kompreneble, la BS-kaso momente malpleniĝos. Pro  
malalta abonprezo de la bulteno, la kaso de "Laŭte!" ne  
povos helpi. Ĉar mi tamen ne volas denove peti monhelpon,  
- kiel okazis tiom sukcese por "Julia" - mi deziras instigi  
vin, gelaŭtulojn kiuj ankoraŭ ne estas broŝurabonantoj, far-  
iĝi ricevontoj de la novaj broŝuroj, (aŭ mendĉi malnovajn!).  
Vidu la eldonprogramon fine de la "adresar". **SUFIĈAS  
MONPROVIZI PER minimume 100 FF.** Vi ĝuos 20% da rabato  
kaj nia komuna "entrepreno" Laŭte/Broŝurservo povos plu  
prosperi.

Antaŭdankas, Kribo.

P.S. Kompreneble, mondonacoj estas bonvenaj. La malavar-  
uloj sciu, ke ili rekte kontribuas en la ekipado por pli  
efika eldonado de Esperantaĵoj. Se krome iam venos pli  
junaj "brakoj", eblos vere multon fari !

---

la venonta numero aperos meze de septembro

---